

Tamen★Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, JANUARO 2008, JARKOLEKTO 27

Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park, S.A. 5019

esperantobob@iprimus.com.au

Legeblas ankaŭ interrete: www.gazetejo.org

En la poŝtoŝejo la poŝtistoj trovis karton adresitan al la Kristnaskulo: “Kara Kristnaskulo ! Nia familio estas ege malriĉa. Ni ne povos donaci unu al la alia ion ajn ĉi tiun venantan kristnaskon. Ĉu vi povus sendi al ni \$ 100 ?”

Tuŝis la koron de la poŝtistoj tiu karto. Ili kolektis monon inter si. Sed ankaŭ ili ne estis riĉaj, kaj la kolektita sumo estis nur \$ 50, kiujn ili sendis al la infano.

Post la kristnaskaj festotagoj venis dankletero, kiun la poŝtistoj tre scivole legis: “Kara Kristnaskulo ! Mi treege dankegas vin pro via bonkora helpo, mi tre ĝojis. Estis nur unu problemo. La fipoŝtistoj ŝtelis la duonon de via donaco!”

Grafo Gábor

Gravaj Esperanto-eventoj:

De la 14a ĝis la 23a de januaro 2008 okazos la Oceania Kongreso en Aŭklando, Novzelando.

La Sepa Tutamerika Kongreso okazos de la 12a ĝis la 18a de julio 2008 en Montrealo, Kanado. La Kongresa Temo: Ekosistemoj, Lingvoj, Kulturoj: Diverseco por daŭropova evoluigo en la Amerikoj.

En 2008 la Universala Kongreso de Esperanto okazos en la belega ĉefurbo de Esperantujo, Roterdamo, Nederlando.

Tuj poste la Internacia Vegetarana Unio festos sian centjariĝon en Dreseno, Germanujo.

Ankaŭ TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio) festos sian centjariĝon en 2008.

La Universala Esperanto-Kongreso okazos en 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.

La Somerkursaro de Aŭstralia Esperanto-Asocio okazos de la 11 a ĝis la 25a de januaro 2009 en Sidnejo.

SinJORino al bestozorganto:

“Ho, tiuj bestoj estas tre interesaj, sed ekzemple kiel oni povas scii, ĉu tiu ĉi hipopotamo estas ina aŭ vira ?”

Bestozorganto: “Kara sinJORino: Laŭ mia opinio, tiu demando interesas nur alian hipopotamon !”

Edukado

Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam fojon, “Lingvaj Resondoj”, la Leereveld. Lian verkon Grove, Belgrave South, \$22,00!



trastudu, pli ol nur unu elstaran verkon de Marcelo mendu ĉe 12 Heather Viktorio 3160, kontraŭ nur

“Panjo, ĉu ne estas strange,” diras eta Lise. “Bovino trinkas akvon kaj donas lakton, sed nia eta suĉinfano trinkas lakton kaj donas akvon !”

Lia moŝto, Marcelo Leereveld

Nia honora Majstro, L.L. Zamenhof naskiĝis en decembro, sed ne nur li. Tio sama okazis ankaŭ al nia bona amiko, Marcelo Leereveld. Ankaŭ li naskiĝis en decembro, ne la 15an, sed la 4an. Do 11 tagojn antaŭ Zamenhof, sed Marcelo naskiĝis en 1917, dum Zamenhof naskiĝis jam en 1859. Do ili ne estas samaĝaj nek identaj ĝemeloj. Zamenhof naskiĝis en Bjalistoko kaj Marcelo en Amsterdamo. Ili ambaŭ dediĉis sian tutan vivon al Esperanto, kaj ili ambaŭ deziras nur la plej bonan por la homaro, interkompreniĝon kaj pacon. Zamenhof mortis pro troa fumado la 14an de aprilo 1917 en Varsovio, sed ŝajne renaskiĝis kiel nefumanto la 4an de decembro la saman jaron en Amsterdamo, ĉu ne ? Oni neniam ripetu la saman eraron. Tion bonestu memori, vi fumantoj !!!

La 1an de decembro 2007 niaj gesamideanoj en Melburno festis la 90-jariĝon de nia plej celebrata samideano en Aŭstralio, la estiminda Marcelo Leereveld. Partoprenis tiun ege bonegan feston multege da viktorianoj, eĉ amaso da ili, plus tri el Sudaŭstralio, kvin el Novsudkimrujo kaj unu el Okcidentaŭstralio. Ĝojige estas

vidi kaj konstati, ke tiom da geesperantistoj aŭstraliaj admiras kaj celebras nian 90-jarulon, ĉu ne ?

La festo okazis en la bonega restoracio de Caulfield Race Course en Melburno. Estis bonegaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj por ĉiuj, eĉ la vegetaranoj ne estis forgesitaj. Heather, Debra kaj Henry voĉlegadis la multajn, eĉ multegajn gratulkartojn, kiujn sendis al Marcelo la plej multaj el liaj aŭstraliaj amikoj, sed ne nur el Aŭstralio venis gratulkartoj, venis iuj ankaŭ el Eksteraŭstralio. Okazis sakŝalma muziko pli ol nur unu fojon. Prezentatis lumbildoj ilustrantaj la longan vivon pozitivan de nia granda admirinda geniulo. Festparoladon faris Makso Wearing. Franciska prezentis amuzan dialogon. Bonan, eĉ bonegan tamburadon prezentis Franciska kaj Dot akompanataj de ventrodancistino. Ĉiuj kantis la du mondfamajn kantojn: “La Internacio” kaj “La Espero”.

Kune ni ĉiuj manĝis kukon kun gratulmesaĝo donitan de Henry kaj Heather. Estis bonega atmosfero de amikeco, respektemo kaj festemo.

Ĉar 90-jarulo eble bezonas pli longe dormi post festa nokto, niaj melburnaj geamikoj decidis celebri Marcelon jam la 1an de decembro por ke li povu dormi iom pli longe la sekvan matenon.

Sed Marcelo neniam estis konata pro sia dormemo. Sian tutan vivon li dediĉas al Esperanto, kaj danke al Marcelo kaj lia neelĉerpebla energio ni havas ĉi tie en Aŭstralio unu el la plej kleraj esperantologoj. Multaj elstaraj verkoj atestas pri tio. Lia sola deziro estas plialtigi la lingvonivelon de la aŭstralia geesperantistaro. Tion li provas efektiviĝi eldonante siajn verkojn, inter kiuj elstaras la jam fame konata “Lingvaj Resondoj”. Estas tre interese trastudi tiujn liajn verkojn, oni ofte surpriziĝas lernante ion tute logikan, ion tute neatenditan. Mi rekomendas liajn verkojn al vi ĉiuj !

Multajn jarojn Marcelo instruis en niaj somerkursaroj. Tion li faris amikece kuraĝigante. Povas esti neniu dubo pri tio, ke li estas nia plej bona instruisto. Multajn jarojn li estis nia alte respektata ĉefekzamenisto, sen kiu Esperanto en Aŭstralio ne estus tio, kio ĝi fakte estas !

La 2an de decembro ni piknikis en la montaro Dandenong sur monto Olinda. Tiam prenis parton ankaŭ du pliaj gesamideanoj el Okcidentaŭstralio, kiuj ne povis preni parton la 1an de decembro.

Ni membroj de “Esperanto en Sudaŭstralio” sendas al Marcelo kaj Alida niajn plej elkorajn kaj sincerajn gratulojn kaj bondezirojn por la estonteco, kiel ankaŭ niajn plej sincerajn dankojn pro ilia profunda amikeco !


“Doktoro, mi estas tre lacega. Depost kiam mia edzo malsaniĝis mi atentis lin tage kaj nokte.”

“Sed mi ja havigis al vi helpantaron. Ĉu ŝi ne venis ?”

“Jes, kaj ĝuste tio estas la problemo !”

Mummy, why
same language?

La bonegan libron,
esperantistino, Nicole,
kontraŭ \$6,95 plus
Aŭstralio. Nicole Else,
Asquith, NSW 2077 aŭ perrete Nicole@cryogenic.net.



can't we all speak the

verkitan de tre klera
haveblas nur de la verkinto
afranko \$1,95 ene de
1/359 Pacific Highway,

S-ro Eriksen havis absceson en la nuko. Lia timema edzino pelis lin al la kuracisto, kiu ekrigardis la absceson dirante: “Kia malbela fiaĵo !”

“Jes, ĉu ne ?” diris s-ino Eriksen, sed li estas tre bona al la infanoj !”

Ĉu nova esperantisto ?

La 7an de decembro naskiĝis en Adelajdo fileto al Finnur kaj Merrilyn Larusson. Eta belega fileto nomata Hafliði John Finnsson (Halli) eniris la mondon mezurante 48 centimetrojn kaj pezante 7 pundojn kaj 6 uncojn, t.e. proksimume 3½ kilogramoj.

Ni gratulas al li kiel ankaŭ al liaj fieraj gepatroj.

Du malgrandulinoj sidis ludantaj per siaj pupoj. Unu el ili estis ĵus ricevinta novan pupon naskiĝdonace. Malfeliĉe ŝi diris: “Mi ne scias ĉu mi havos tempon por tiom multaj infanoj. Kaj mi atendas eĉ pli ĉi tiun kristnaskon !”

Nia Zamenhoffesto

Merkredon la 5an de decembro Esperanto en Sudaŭstralio honoris L.L. Zamenhof per grandioza festego en la komunumejo de Clarence Park.

Post konsumado de eminentulo Trevor gvidadon decidinte ke ni Zamenhof. Do, ni ĉiuj verkitajn de Zamenhof, kaj Trevor klarigis al ni la signifon de la poemoj. Poste ni kantis multege da kantoj, kaj ĉiuj iris hejmen post eĉ tre bonega vespero !



“Ĉar estis amo je la unua vido, vi kial ne edziniĝis ?”
“Ĉar mi rigardis duan fojon !?”

Pli pri ujo aŭ io ?

Ĉiuj, eĉ la komencantoj scias ke ŝuisto estas iu, kiu riparas, faras aŭ vendas ŝuojn, ĉu ne ? Bakisto estas iu, kiu bakas ion, eble panon aŭ kukojn ktp. Do kio, laŭ nia “logika” kara lingvo estas turisto ? Ĉu iu, kiu faras, riparas aŭ vendas turojn ? Mi nur demandas esperante ke iu en Esperantujo povas helpi min trovi pli bonan vorton por vojaĝemulo aŭ ĉu mi diru vojaĝanto ?

Imagu ke aperus nova libro (kaj ĝi fakte jam aperis) “La rusoj loĝas en Rusujo”. Nu, laŭ mia opinio tia libro tre bonvenas en Esperantujo, ĉar estas tre logike, ke rusoj loĝas en Rusujo same kiel angloj loĝas en Anglujo. Sed aŭstralianoj ne loĝas en Aŭstralujo, ili loĝas en Aŭstralio. Komencantoj demandas, kial ‘ujo’ kaj ne ‘io’ ?

Ebla respondo estus, ke en nia moderna mondo loĝas en Rusujo ne nur rusoj, sed ankaŭ multaj ĉinoj ktp. Do iuj sentas, ke Rusujo estas ne nur por rusoj, sed por ĉiuj, kiuj deziras loĝi tie. Ne estus saĝe subite nomi Rusujon Ĉinujo, do tiuj, kiuj pensas iomete alimaniere ol mi, proponas ke Rusujo nun nomatu Rusio. Kompreneble mi kontraŭas, sed – kiel vi scias - ne diras multon, ĉar la ŝtato Rusujo nomatas tiel ne pro la malplinombro de siaj enloĝantoj, sed pro la plinombro da ili. !!!

Francujo kaj Germanujo neniam povas fariĝi Francio kaj Germanio. Kaj kial ne ? Simple ĉar laŭ la Sankta Skribo “Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto” germanio kaj francio estas ne landoj, sed elementoj. “Germanio” havas la atomnumeron 32, kaj “francio” havas la atomnumeron 87. Polio estas io tute alia, kion mi eltrovis legante PIV-on, laŭ kiu: “poli” estas grekdevena vortero en sciencaj vortoj signifanta “mult” kaj “plur”. En medicino ĝi en kelkaj okazoj krome havas la sencon “tro”: “poliglobuleco” kaj “poliurio”.

Rumanoj loĝas en Rumanujo, sed kie loĝas romanoj ? Ĉu en bibliotekoj, tekoj enhavantaj bibliojn, librarejoj, pruntlibrarejoj aŭ simple sur bretoj ? Mi scias, ke kelkaj, sed evidente ne ĉiuj romanoj loĝas en Romo, la ĉefurbo de Italujo. Se oni havas kelkajn malnovajn romanojn hejme, ĉu ili estas antikvaj romanoj ? Se jes, kie loĝis la antikvaj romanoj ? Ili, laŭ logiko, loĝis en Romanujo. Kaj kie loĝas la rumanoj, nu, kompreneble en Rumanujo, escepte de tiuj multaj, kiuj jam elmigris alien.

La ekzameninto al la sinjorino, kiu ĵus malsukcesis en sia veturigezameno:

“Ne malĝoju eta sinjorino, kvankam vi malsukcesis, vi plej verŝajne plilongigis vian vivon per pluraj jaroj !”

Novaj libroj en Esperanto

“La grafo de Montekristo” de Aleksandro Dumas, “Cirkaŭ la mondo en 80 tagoj” de Jules Verne, “La sekreta miraklo” de Borges, “La dormanto vekigita” de H. G. Wells, “Origino de specioj” de Charles Darwin, “Reĝo Maĉjo” de Janusz Korczak. Ĉi tiuj kaj multaj aliaj interesaj verkoj estos aĉetebaj en la venontsomera Tago de la Libro en Roterdamo kaj en aliaj someraj esperantistaj renkontiĝoj.

Aleksandro Korĵenkof

Ĵus finiĝis la geedziĝo, kaj la ĵusa edzo devis ion doni al la pastro. Embarasite li elfiŝis 100 kronojn el la poŝo kaj enmanigis ilin al la pastro dirante:

“Mi scias, ke tio ne estas multo, sed venontan fojon mi povos doni iom pli !?”

Tulipo Esperanto

La firmao Bakker, kiu kulturas tulipojn, proponas en siaj aktualaj katalogoj en diversaj lingvoj, tulipon Esperanto (Tulipa viridiflora Esperanto).

Vidu la sekvantajn retadresojn por vidi la tulipon:

<http://www.bakker-cz-com/Catalog/Productdetail.aspx?N=27&productid=0830&start=5&R=0830-023>
<http://bakker-hillegoom.nl/Catalog/Productdetail.aspx?N=901991&productid=830&R=830-001>
<http://bakker-fr/Catalog/Productdetail.aspx?N=50&productid=0830&R=0830-005>.

Elrevigitaj gepatroj al sia filo: “Vi estas tiom malbonkondata, ke ni devos sendi vin ien, kie vi povas lerni kiel konduti bone !”

“Ĉu mi ne povas lerni tion ĉi tie ?”

Vizitanto el Japanujo

Merkredon la vizitis nin la UEA-Japanujo, NISIO S-ro NISIO estas Li estis en Adelajdo kongreso de inĝenieroj, sed tamen trovis tempon por viziti nin ĉiujn.



21an de novembro delegito el Oosaka, Tutomu. inĝeniero pri maŝinoj. pro la granda

S-ro Nisio aldonis al nia kunveno multe da ĝojo. Ĉiuj interesiĝis pri li, kaj li respondis kun bona humoro al niaj multaj demandoj.

Malgranda Trine estas en la preĝejo por vidi geedziĝon. Kiam ĉio estas farita ŝi flustras al sia patrino: “Ĉu ili havos infanojn ?”

“Jes, plej verŝajne,” flustras la patrino.

“Ho, ĉu ni restu kaj vidu ankaŭ tion ?”

“Ĉu via edzo ĝojas labori en la bierfarejo ?”

“Jes, sendube, ĉar li plulaboras ĉiun vesperon hejme !”

La Universitato Jagelona

Lastatempe estis anoncita la supera kurso de Esperanto en la malnova, fama Jagelona Universitato de Krakovo, Polujo. La universitato akceptas esperantistojn ankaŭ el aliaj landoj. Fine de la kurso oni ricevos “Certyfikat”, identan al tiuj, kiujn la universitato liveras pri aliaj lingvoj!

La ebleco estas unika, ĉar nun ne estas planoj pri estonta simila, malferma por ĉiuj supera kurso de Esperanto en tiu universitato.

Pro intereso de gesamideanoj el malproksimaj landoj (i.a. el Brazilo) oni decidis, ke por eksterlandanoj la kurso povas esti nur perreta kaj ke ONI NE DEVOS VENI AL POLUJO por studi.

Temas pri regula kaj serioza perreta studado kun parte voĉa perreta trejniĝado kaj ekzamenoprezento de parteto de la akiritaj scioj en sia lando!

Oni trovos pli da informoj en la portalo: <http://www.esperanto-reto.org> <http://www.esperanto-reto.org> Studenta Scienca E-Rondo en Jagelona Universitato, aŭ rekte en: http://docs.google.com/Doc?id=dhp3sf5p_163fp2j3gf5p_163fp23g&pli=1 http://docs.google.com/Doc?id=dhp3sf5p_163fp2j3g&pli-1

Aldoniĝos novaj anoncoj de supre. Ni dankas tiujn, kiuj publikigos aŭ transdonos la informojn al siaj konatoj.

Maria Majerczak

“Doktoro, doktoro, kion mi devas fari, mia edzo suferas pro malvarmumo.”

“Diru al li, ke li devas multon trinki, kaj ofte ripozi.”

“Se tio helpas, mi tute ne komprenas, kiel li malvarmumiĝis !”

Iam, antaŭ multaj jaroj, krimultransportilo veturigis krimulon al la pendumilo. Li sidis sur la koĉerbenko apud la koĉero. En la malfermita veturilo sidis policistoj kaj atestantoj. Fariĝis terura vetero kun pluvo kaj blovo, kaj subite la krimulo sin turnis dirante: “Mi vere kompatas vin ĉiujn, ĉar vi devos reveturi la tutan vojon reen en tiu ĉi veteraĉo !”

Tamen★Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, FEBRUARO 2008, JARKOLEKTO 27

Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019

esperantobob@iprimus.com.au

Legeblas ankaŭ interrete: www.gazetejo.org

Festas geedza paro la 50an datrevenon de sia geedziĝo. Vespere en la lito la sinjorino diras: “Karulo, ĉu vi rememoras nian unuan nokton kune antaŭ 50 jaroj, vi tuŝetis mian hararon. Ĉu plaĉus al vi fari same nun ?”

Tuŝetas la sinjoro ŝian hararon.

“Ĉu vi memoras” karulo, nian unuan nokton kune antaŭ 50 jaroj ? Vi tuŝetis miajn manojn. Ĉu plaĉus al vi same fari nun ?”

Tuŝetas la sinjoro ŝiajn manojn.

“Karulo, ĉu vi memoras nian unuan nokton antaŭ 50 jaroj ? Vi karese mordetis miajn orelojn. Ĉu plaĉus al vi same fari nun ?”

Ellitiĝas la sinjoro kaj eliras el la dormoĉambro.

“Karulo, vi kien iras ?”

“En la banĉambro por preni miajn dentojn !”

Gravaj Esperanto-eventoj:

La unua oficiala kunveno de “Esperanto en Sudaŭstralio” okazos la 6an de februaro 2008 en la Komunumejo en Clarence Park je la 18a horo.

La 5a Azia Kongreso de Esperanto okazos de la 11a ĝis la 15a de februaro 2008 en Barato.

La Sepa Tutamerika Kongreso okazos de la 12a ĝis la 18a de julio 2008 en belega Montrealo, Kanado. La Kongresa Temo: Ekosistemoj, Lingvoj, Kulturoj: Diverseco por daŭropova evoluigo en la Amerikoj.

En 2008 la Universala Kongreso de Esperanto okazos en la belega ĉefurbo de Esperantujo, Roterdamo, Nederlando.

Tuj poste la Internacia Vegetarana Unio festos sian centjariĝon en belega Dresdeno, Germanujo.

Ankaŭ TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio) festos sian centjariĝon en 2008.

La Somerkursaro de Aŭstralia Esperanto-Asocio okazos de la 11a ĝis la 25a de januaro 2009 en la belega urbo Sidnejo. La Universala Esperanto-Kongreso okazos en 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.

“Sinjoro doktoro ! Bonestu venu kiom eble plej rapide. Mia edzino suferas cekumiton !”

“Sed tio ja ne eblas. Mi fortranĉis al ŝi la cekumon antaŭ du jaroj. Neniam mi aŭdis, ke iu havas duan cekumon.”

“Sed sinjoro doktoro, ĉu vi ankaŭ neniam aŭdis, ke iu havas duan edzinon ???”

Edukado

Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, elstaran verkon de Marcelo Leereveld. Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur \$22,00!



“Karulo, diru al mi ion belan !”

“Viaj dentoj similas la stelojn sur la ĉielo !”

“Ho, bele, eĉ belege, neniam antaŭe mi aŭdis ion tiom belan. Daŭrigu, daŭrigu !”

“Ĉar ili estas flavaj kaj ili ĉiuj estas tre malproksimaj unu de la aliaj !”

Mummy, why can't we all speak the same language?

La bonegan libron, Nicole, kontraŭ \$6,95 plus afranko Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith, NSW 2077 aŭ perrete Nicole@cryogenic.net.



can't we all speak the

verkitan de tre klera haveblas nur de la verkinto \$1,95 ene de Aŭstralio.

Frumatene kamparano iras el la domo en la korton. Iom poste li revenas. Lia pantalono iom malsekas.

“Ĉu pluvas ekstere ?” demandas lia edzino.

“Ne, sed ventas !”

Esperantistaj vegetaranoj

Jam ni estas en la nova jaro kaj espereble ni ĉiuj fartas bone ! Ni ĉiuj, escepte de mi, jam decidis esti multe pli bonaj en la nova jaro. Ĉesu la malamo inter ne nur nacioj, ne nur inter homoj, sed precipe inter ni esperantistoj, kiuj montras al la cetera mondo la vojon irendan. Ni montru al la mondo cetera, ke toleremo, helpemo kaj interkompreniĝo eblas. Tamen kaj malgraŭ ĉio, jam troviĝas en la granda, vasta Esperantujo centjara asocio konsistanta el preskaŭ perfektaj homoj respektantaj la rajtojn de kaj homoj kaj bestoj. Ili abomenas militojn, ĉar tiuj estas nenecesaj kaj kruelaj. Ili abomenas buĉejojn pro la samaj kialoj. Bestoj havu la samajn rajtojn kiel homoj. Kaj la membroj de tiu asocio ĉiuj estas sufiĉe saĝaj por kompreni, ke manĝante kadavrojn oni nenion faras por plibonigi sian sanon, kaj oni certe ne plibonigas la sanon de la bestoj mortigante ilin ! Kun tiaj homoj estas bone asociadi, ĉar ni devas ja lerni unu de la aliaj !

Nu, certe vi miras scivolante kiu estas tiu asocio. Ĝi estas Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA). Ankaŭ vi bonvenas en ĝi. Tial mi rekomendas al vi aliĝi kaj ĝuu unu fojon en la jaro belegan 40-paĝan koloran revuon “Esperantista Vegetarano”. Legante ĝin vi lernos kiel eviti malsanojn. Jam tio estas io, ĉu ne ?

Sed tio ne estas ĉio. Dum la jaro vi ricevos, kiam necesos, pliajn valorajn informojn de TEVA. “La Letero de TEVA” aperadas kiam io nova informendas.

La aliĝo estas tre simpla. Sendu vian kotizon al la Landa Reprezentanto por Aŭstralio, Bob Felby, kies adresoj strata kaj reta aperas supre sur la frontpaĝo de tiu ĉi revuo. Vi mem rajtas decidi kiom da mono vi deziras pagi, sed mi rekomendas minimume \$ 10.

Bonan novan jaron al vi ĉiuj kun pliboniĝanta sano kaj bona humoro !

Viro kuŝas mortanta en malsanulejo. Vizitas lin liaj edzino kaj pastro. Tuj kiam la pastro sin sidigis sur la litorando, la malsanulo ekspiris tre strangece. Li prenis

paperon kaj krajonon kaj skribis ion. Tiam li mortis. Legis la pastro tion, kio estis skribita sur la papero: “Vi sidas sur la oksigentubo !”

Esperantistaj spiritistoj kunvenis en Rio

Okazis en la 2a de decembro la dekkvara Esperantista Renkontiĝo de Rio-de-Janeiro. Proksimume 70 homoj ĉeestis. De la 9a ĝis la 17a horoj, Spiritisma Centro “Amo al la Vero” akceptis samideanojn el pluraj aĝoj kaj urboj. Oni estigis programerojn speciale dediĉitajn al infanoj kaj al tiuj, kiuj disvastigas Esperanton en la spiritisma medio. Dum la posttagmezo la radioparolisto Givanildo Costa gvidis la artan momenton. La kantistino Neide Barros Rêgo sin prezentis kaj plaĉis al la rigardantoj. Laŭ la organizintoj la aranĝo plene trafis sian celon.

Fabiano Henrique

Sinjorino kun eta hundeto eniras buson. Jutlandano tre ĝentile demandas ŝin: “Al kiu raso apartenas via hundeto ?”

“Ĝi estas la rezulto de sekskuniĝo inter simio kaj jutlandano”, malĝentile respondas la sinjorino.

“Bone, eĉ bonege, ĝi do estas familiano de ni ambaŭ”, diras la jutlandano !

Forpasis bona esperantisto kaj instruistino

Sylvia Burkitt forpasis. Dum la dua mondmilito ŝi servis en la aŭstralia armeo kiel deĉifrantino en Novgvineo, kie ŝi aŭskultadis al mesaĝoj japanaj, sed devis resti pri ili silenta.

Iun vesperon, kiam la forpasinta James Harwood alportis kelkajn erojn el sia muzeo telegrafia al Redfern, ŝi tuj senerare eltajpis mesaĝon en morsa alfabeto.

Laŭ mia memoro Arturo Cocking intervjuis ŝin por la lasta paĝo de The Australian Esperantist. Eble ankoraŭ restas ekzemplero en Redfern.

Ĉeestis la funebran ceremonion 30 – 40 homoj. Mi estis la sola esperantisto tie, kaj mi surhavis mian etan verdan stelon. Ŝia bona amikino el Adelajdo diris: “Ho, tial estas

tiom da verdaj steloj sur la ĉerko, kiel ankaŭ la aŭstralia flago.

Post tio ni ĉiuj iris al ekssoldata klubo, kie ni parolis unu kun la aliaj.

Ŝi estis tre rimarkinda virino. Amis la armeon, naturon, ŝpinadon kaj teksadon. Iam ŝi faris al mi ŝalon el i.a. hundaj haroj. Multaj el ŝiaj amikoj ricevis tian ŝalon.

Ŝi estis bona instruistino de Esperanto, kiun ŝi amis. Bedaŭrinde pli poste en sia vivo ŝi fariĝis pli kaj pli forgesema.

Iu voĉlegis mallongan travivaĵon el ŝia vivo. Ŝi estis montranta tekstechnikon al iu. Tiam eniris ŝia edzo dirante, ke ŝarko mordis lin en la rivero Parramatta. Diris ŝi, ke ŝarkoj ne havas dentojn. La akraĵo en iliaj buŝoj estas skvamoj ŝanĝintaj. Kiam elfalas unu, alia elkreskas. Ĉu ne estas bone scii, ke ŝarkoj kaj fiŝoj troviĝas ankaŭ en la rivero Parramatta ? Ŝi estis ĉiama naturamanto.

Iuj manlianoj memoras ŝin. Volo kaj mi estas la solaj membroj konintaj ŝin ĉi tie en Redfern.

Margaret Chaldecott

Maljuna needziniĝinto, kiu sian tutan vivo malpermesis al si ĉiujn ĝojojn de la vivo, subite gajnis premion en la loterio. Ŝi decidis iri flugmaŝine al Hispanujo.

Ĉar ŝi estis edukinta sian katinon ĉiame vivi decan vivon, ŝi petis sian najbarinon prizorgi la katinon dum ŝi estas for en Hispanujo. Ŝi diris al la najbarino, ke la katino neniam eliru el la domo, ĉar ne estas bone por ĝi havi kontaktojn kun virkatoj !

La unuan semajnon la najbarino aŭdis nenion de la maljunulino, sed la duan semajnon venis poŝtkarto el Hispanujo. La poŝtkarto surhavis nur tri vortojn: "Ellasu la katinon !"

Bonega iniciato de la Melburna Kafoklubo

La 5an de februaro komenciĝos du Esperanto-kursoj por komencantoj en la biblioteko, 253 Flinders Lane, Melburno. Instruos Ĵeni Bishop kaj Miranda Lutz.

Esperanto en Sudaŭstralio elkore gratulas ĉiujn, kiuj organizis la du kursojn kiel ankaŭ la du instruistinojn.

“Svend, rapide telefonu al kuracisto, Panjo malsanas !”

“Bone, eĉ bonege, ni telefonu al doktoro Bengtsson, ni povas fidi lin. Li estis nia kuracisto kiam Avo mortis !”

La 30a Jubilea Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno, Polujo

Pola Esperanto-Asocio, filio en Koszalin, organizos en la tagoj 10a ĝis 18a de junio 2008 la 30an Ĉebaltan Esperantistan Printempon kun riĉa kaj varia Esperanto-programo. Tiu ĉi internacia Esperanto-aranĝo okazos refoje en Mielno, pitoreske situanta inter la Balta Maro kaj Jamno-lago, 12 kilometrojn nordokcidente de la distrikta urbo Koszalin. Detalaj informoj pri la aranĝo troviĝas en la retejo de koŝalina filio de PEA: www.esperanto.koszalin.pl
Retadreso de la ĈEP-organizanto: barslavo@poczta.onet.pl
tel. +48/503-417-825.

Baranowski Czesław

Iel ofendis sian etan filineton patrino. La filineto eniris sian ĉambbron. Iom poste ŝi eliris kun valizo kaj malgranda mansaketo.

“Tion mi diras al vi, Panjo”, diras ŝi: “nun mi iros hejmen al mia cikonio !”

Kvardek estas interesa numero kun diversaj signifoj. Pro altruismaj kialoj homoj fastas dum kvardek horoj. Dum kvardek tagoj Jesuo fastis kiam li estis tentata de la diablo (Mateo 4:2).

Dum kvardek tagoj la izraelidoj vagis de Egiptujo serĉante la promesitan landon.

Oni povis doni kvardek batojn kiel punon al kulpulo (Readmono 25:3).

Por ŝirmi aliajn kontraŭ ebla malsano, vojaĝantoj ofte devis esti izolitaj dum kvardek tagoj.

En la hispana lingvo la vorto estas CUARENTENA. Kiam mi loĝis en Kubao, miaj geamikoj diris ke “you are in quarantine now”, ĉar la busbiletoj kostis kvardek pesojn.

Por mi kvardek havas diversajn signifojn. Mi eklernis Esperanton antaŭ pli ol kvardek jaroj. Je la aĝo de kvardek mi edziniĝis. Mi loĝas en mia nuna domo dum kvardek jaroj.

Intertempe mi sentis min en Kvaranteno. Sed nun mi sentas min for de la aĉa kvarantena periodo. Estas vivo preter Esperanto ! Mi vivas !

Margaret Chaldecott

En la flugmaŝino inter Novjorko kaj Ĉikago iu viro eniris la pilotejon, metis pafilon al la nuko de la piloto kaj diris: “Flugu al Ĉikago !”

“Jes, sed...” diris la surprizita piloto, “ni ja flugos al Ĉikago !”

“Silentu, kaj flugu ! diris la kaperanto.

Kiam ĝustatempe oni surteriĝis en Ĉikago, la polico kaptis la kaperinton. Ili demandis: “Kial vi faris tion ? La flugmaŝino ja survojis al Ĉikago !”

“Vi komprenas nenion”, diris la kaperinto. “Jam la kvaran fojon, mi flugas al Ĉikago, kaj ĉiun fojon ni flugis al Kubao !”

La papo salutis en Esperanto

Ĝus aperis en soc.culture.esperanto jena mesaĝo: Ankaŭ je tiu ĉi Kristnasko 2007, la papo salutis en Esperanto. Oni povas aŭdi la saluton ĉe <http://www.ikue.org/kristnsko2007/kristnasko2007.htm>.

Dario Rodriguez

Diris la juĝisto al viro serĉanta nuligon de sia edzeco: “Vi kial ne parolas al via edzino la pasintajn ses monatojn ?”

“Ĉar mi ne kuraĝas interrompi ŝin !”

Marjorie Boulton kandidatos por la literatura Nobelpremio

La membraro de Esperanta PEN-Centro elektis kvar kandidatojn por la literatura Nobel-premio: Marjorie Boulton, István Nemere, Giorgio Silfer, Spomenka Ŝtimec. Inter ili la abonantaro de “Literatura Foiro” elektis unu kiel definitivon kandidaton. La abonantoj rajtis indiki ankaŭ kvinan nomon laŭplaĉe, sed neniu utiligis tiun rajton. Entute balotis 24 abonantoj el 13 landoj en du kontinentoj. Iliaj voĉdonoj kreis la sekvan klasifikon: Boulton: ok; Ŝtimec: ses; Nemere kaj Silfer: po kvin.

El: Literatura Foiro

Ĵusa dungito devas trapasi la devigan sanekzameniĝon. La kuracisto konstatas, ke la dungito estas perfekte sana, eĉ sanega kaj ke ĉiuj ekzameniĝoj estas bonaj.

“Estas nur via vidkapablo, kiu bedaŭrinde ne perfektas. En via maldekstra okulo vi havas nur 40%-ojn da vidkapablo.”

“Tio ne estas malbona”, respondis la ĵusa dungito, “ĉar ĝi estas el vitro.”

Luprenis ĉambron fraŭlo ĉe vidvino. Iun dimanĉan matenon la vidvino eniras la ĉambron de la fraŭlo kun pleto da kafo por li. Li estas kompreneble tre surprizita. Sed la interparolado estas tute teda. La vidvino iras al la fenestro kaj elrigardas. Fine ŝi diras: “Aspektas tre malbone.”

“Jes, vi pravas”, diras la fraŭlo, “sed ĝi almenaŭ iomete gustas kiel kafo !”

Tamen★Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO. MARTO 2008, JARKOLEKTO 27

Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019

esperantobob@iprimus.com.au

Legeblas ankaŭ interrete: www.gazetejo.org

Aŭtomobilposedanto en aŭtomobilriparejo: “Ĉiun fojon, kiam mi veturigas la aŭtomobilon pli ol 100 kilometrojn hore ekrulbruas en la aŭtomobilmotoro.”

Post ĝisfunda ekzamenado de la aŭtomobilmotoro la aŭtomobilriparisto skuas sian kapon dirante: “Jes, povas esti, sed mi ne povas trovi ion riparindan en la aŭtomobilmotoro. Devas estis Dio, kiu avertas vin !”

Gravaj Esperanto-eventoj:

Merkredon la 5an de marto okazos nia ĉiujara ĉefkunveno en la Komunumejo en Clarence Park je la 18a horo.

La Sepa Tutamerika Kongreso okazos de la 12a ĝis la 18a de julio 2008 en Montrealo, Kanado.

En 2008 la Universala Kongreso de Esperanto okazos en la belega ĉefurbo de Esperantujo, Roterdamo, Nederlando.

Tuj poste la Internacia Vegetarana Unio festos sian centjariĝon en Dreseno, Germanujo.

Ankaŭ TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio) festos sian centjariĝon en 2008.

La Universala Esperanto-Kongreso okazos en 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.

Iu viro eniris vendejon kaj aĉetis pianoseĝon. Kelkajn tagojn poste li, portante la seĝon, revenis dirante: “Mi turnis tiun seĝon sennombrajn fojojn, sed eĉ ne unu sono elvenas el ĝi !”

Se vi vere deziras senpene – uzadi nian belegan ol nur unu fojon, “Lingvaj verkon de nia eminenta Marcelo Leereveld. Lian



lerni kiel senerare – kaj lingvon, tiam trastudu, pli Resondoj”, la elstaran eksĉefekzamenisto, verkon mendu ĉe 12

Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur \$23,00!

“Fraŭlino Jones vojaĝis al Italujo por lerni kantadon.”

“Ĉu vere ŝi havis tiom da mono ?”

“Ne, sed ŝiaj najbaroj havis !”

Legu ankaŭ la
“Mummy, why can’t
language?” Mendu ĝin
afranko \$1,95, ene de
klara verkinto kaj esperantistino,
Highway, Asquith, NSW 2077 aŭ perrete
Nicole@cryogenic.net.



treege bonegan libron,
we all speak the same
kontraŭ nur \$ 6,95 plus
Aŭstralio, rekte de la tre
aŭ perrete

Aŭdite en Esperanto-klaso dum Somerkursaro”

“Ĉu iu el vi povas klarigi la diferencon inter singardeco kaj malbraveco ?” demandis la instruisto al la klaso.

Respondis la amuzuleto de la klaso: “Oni estas singarda, kiam oni timas, sed aliaj malbravas, kiam ili timas.

Ĉi tiun jaron ni okazigos nur unu ĉiumonatan kunvenon en Clarence Park. Okazos laŭ via deziro ankaŭ multaj aliaj kunvenoj kaj renkontiĝoj, sed aliie. Pri tio kaj ekskursoceloj ni vigle diskutos merkredon la 5an de marto en la komunumejo en Clarence Park. Venu do !

“Ĉu vi estas sekse aktiva?

”Ne, mi nur kuŝas tie.”

Forpasis unu el la plej bonaj el inter ni

Pasintan monaton, februaro, nia Tamen Plu estis dissendita tro frue, multe tro frue, tiom fruege, ke mi neniom sciis pri la bedaŭrinda forpaso de unu el la plej grandaj animoj inter ni. Temas pri la eminenta Esperanto-pedagogo Claude Piron.

Claude Piron
22an de januaro 2008
opinio li ne jam estis laca
estas tiu, kiu decidas pri



mortis, pro koratako, la
nur 76-jara. Laŭ mia
pro la vivo, sed ne mi
tio. Pri tiaj aferoj

decidas Iu Alia !

Claude Piron, svisa psikologo, ne misuzis sian vivon. Li estis tre lernema kaj i.a. lernis multege da lingvoj, ĉar tiuj ĉiam interesis lin. Li estis diplomito de la Interpretista Lernejo de Ĝeneva Universitato. Ok jarojn li laboris en Monda Organizo pri Sano, eĉ en Orienta Azio kaj Afriko. Li estis psikoanalizisto kaj psikoterapiisto kaj en 1969 li ekpraktikis psikoterapion en la ĝeneva regiono Gland. De 1973 li instruis en la Psikologia kaj Edukscienca Fakao de Ĝeneva Universitato ĝis sia emeritiĝo en 1994. Lia verko "La lingva defio", kiu estas iom psikoanalizo de internacia komunikado, estas eldonita ĉe L'Harmattan en 1994 en Parizo. En Esperanto li publikigis ok romanojn, plurajn novelarojn, poemaron kaj eĉ kantokasedon. En diversaj kaj malsamaj lingvoj li publikigis multajn artikolojn pri internacia kaj interkultura komunikadoj, kiel ankaŭ pri psikologio. Li verkis kaj helpis verki tri franclingvajn librojn pri psikologiaj temoj.

Krom lingvisto li estis ankaŭ gitaristo, kantisto, poeto kaj prozoverkisto. Li estis unu el niaj plej bonaj tradukistoj. Claude Piron verkis i.a. la mondkonatan libreton "Gerda malaperis". Ankaŭ mia fratino, Gerda malaperis. Ŝi malaperis la 10an de novembro 1995. Nun ŝi estas tie, kie estas Claude Piron, kaj mi esperegas, ke ŝi salutas lin de mi.

Claude estis bonega esperantisto kaj super ĉio, li estis psikologo, kaj psikologion li instruis. Li sciis kaj komprenis, ke por ke ne nur la mondo, sed ĉiu mondano, povu vivi kune en harmonio kaj progresado, necesas paco, necesas mondopaco. Claude Piron ne estis unu el tiuj, kiuj instigas malamon kaj malpacon inter homoj. Claude estis membro de la Akademio de Esperanto kaj honora membro de UEA.

Claude postlasas edzinon, Nicole, kiu tre bone parolas nian lingvon, kaj tri gefilojn. Ŝajnas ke la gefiloj ne estis persvaditaj de sia patro lerni Esperanton. Eble la plej aĝa filino lernis ĝin, sed neniam partoprenis en Universala Kongreso. Jam kiel junulo Claude lernis Esperanton kune kun sia frato, sed nur Claude sukcesis elstari. Krom tiuj Claude postlasas du genepojn.

Claude faris prelegon pri tradukado de kantoj. Laŭ li Esperanto tre taŭgas por tradukado de kantoj. Li ofte kantis akompanante sin per sia gitaro.

Claude mankas al ni, kaj ni bone komprenas la mankon sentatan de liaj edzino Nicole kaj familio. Multan dankon al vi, Claude, ĉar vi vivis inter ni !

Geedza paro deziranta eksgeedziĝon staras antaŭ la alta juĝisto en la juĝejo. Ili ambaŭ postulas posedorajton super sia unusola infano. La juĝisto opinias, ke la patrino posedu la infanon, sed tion la patro oponas dirante: “Sinjoro plej alta la juĝisto. Se mi enmetas unu dolaron en vendomaŝinon, kaj elvenas peco da ĉokolado, al kiu apartenas la ĉokolado, ĉu al la alta sinjoro juĝisto aŭ al la vendomaŝino ?”

Iuj el ni sendube memoras Amato, la populara esperantistino el Koreujo. Ŝi kune kun sia edzo Rikardo transloĝiĝos al Aŭstralio. Ili vizitos Adelajdon inter la 24a kaj 27a de marto 2008. Se vi deziras kontakti ilin, aŭ eĉ gastigi ilin, bonvolu kontakti Sandor.

sandorhorvath07@gmail.com

“Kiu estas via naskiĝdato?”

“La 18a de julio.”

”En kiu jaro?”

”En ĉiu jaro.”

Donald J. Harlow

Mi tre bedaŭras, sed ŝajnas ke nia bona Tamen Plu ĉi tiun monaton estas portanto de malbonaj novaĵoj. Ne nur Claude Piron, sed nun ankaŭ Don Harlow forpasis. Don forpasis, post longdaŭra malsano, en kalifornia malsanulejo la 27an de januaro 2008.

Don Harlow estis Esperanto-Ligo de nuntempe ĝi nomatas estis redaktanto de ĝia USA”. Li estis verkisto, kaj antologiisto de



prezidanto de Nordameriko – Esperanto USA. Li gazeto “Esperanto tradukisto, recenzisto Esperanto-literaturo,

kaj li kreis grandan retan kolekton da Esperanto-literaturo.

La sekvanta konversacio okazis en unu el centoj da labortendaroj en eksa sovetunio:

“Mi estas ĉi tie, ĉar mi malfruis iun matenon al mia laborejo”, diris la unua kaptito.

“Mi alvenis tro frue”, diris la dua, “kaj oni akuzis min pri spionado”.

“Kaj mi venis akurate”, diris la tria, “kaj oni supozis, ke mi havas okcidentan horloĝeton”.

12 tagoj en Novzlando

Inter la 14a kaj 23a de januaro okazis en Aŭklando, Novzlando, la AEA-NZEA Oceania Kongreso. Krom la novzelandanoj partoprenis ĝin ankaŭ japanino, italo, slovako, malajziano, francoj, svedoj, 6 novkaledonianoj kaj grupo da aŭstralianoj – inter kiuj Trevor kaj mi el Adelajdo.

Mia tasko estis instrui 4 infanojn-komencantojn (kun iliaj patrinoj) kaj aparte unu plenkreskulon. Trevor havis la pli ol 20-kapan grupon de progresintoj. La instruado daŭris de la matena 9a ĝis la posttagmeza 3a horo kun agrablaj trink- kaj manĝopaŭzoj. Ĉar ni daŭre devis prepariĝi por la sekvaj lecionoj, restis ne multe da libera tempo. Despli konvenis la komunaj ekskursoj: unu al la montaro Waitakere, la dua al miel- kaj tapiseria ekspoziciejoj, la tria al Maoria Marae inkluzive de manĝado de la tipa Hangi. Cetere, - dum la tuta kongreso ni manĝis elstare! La kuiristoj de la pormonaĥa ripozejo – kie nia aranĝo okazis – vere dorlotis niajn langojn, stomakojn kaj eĉ okulojn.

Ni mem pliagrabilis nian kunestadon per abunda kantado plibeligita per gitar- aŭ pianludado de Alan Bishop.

Trevor ekzamenis ankaŭ en Aŭklando, mi aldonis al la programoj la porplenkreskulan prezentadon de la Mazi-filmoj kun iom da aldonaj komentoj.

Fininte la kurson ni luis aŭton kaj ekskursis ĝis la mezo de la norda insulo. Ni spiris la sulfurplenan aeron de Rotorua, promenis tra varmon kaj vaporon eliganta valo,

naĝis en termakva rivereto, admiris la grandiozajn filikojn – simple ĝuis la riĉaĵojn de la lando.

Estis bone en Novzelando !

Katja Steele

Promenas sinjorino, sur la strato, kun sia 5-jare ĉarma fileto. Subite la ĉarmulo ekvidas gravedulinon. “Panjo, Panjo, kial tiu sinjorino havas tiom grandan kaj dikan ventron?” demandas la knabeto.

“Pro tio, ke ŝi atendas bebon”, respondas lia panjo.

La postan tagon, sur la strato, la knabo ekvidas tre grandan, dikan viron kun eĉ grandega ventrego. “Kion vi atendas?” demandas la knabeto. “Mi atendas tramon”, respondas la dikulo ĝentile.

“Jes, tion mi povas vidi”, diras la knabo.

Ĉu Koreujo estas stranga ?

Dum la 39a KEA-Kongreso, Sandor Horvath kaj Helen Palmer el Aŭstralio dividis kelkajn el siaj impresoj pri la vivo en Koreujo. Sandor instruis dum unu jaro en Koreujo. Lia edzino Helen vizitis lin dum tri monatoj. Jen kelkaj el iliaj observoj pri nia lando.

Unue ni vere volas substreki, ke la sekvantaj observoj estas nur ... simplaj observoj. Ni ne prezentas seriozan analizon, nur supraĵajn, malprofundajn observojn.

Nature, kiel eksterlandanoj ni aŭtomate komparas kaj nature pensas ke – ĝenerale – la “sistemoj” en nia lando estas pli bonaj.

Tamen, ni ne volas kritiki, nur observi, ĉar nekomprenaĵoj ofte ŝajnas al ni strangaj. Oni ne rimarkis, ke multaj aferoj fakte estas pli “bonaj” ol ĉe ni en Aŭstralio. Ni tamen pensas, ke ankaŭ meti la spegulon al antaŭ la enlandanoj kaj defii ilin iomete estas nia devo. Ofte la koreoj demandas nin pri tio, kion ni pensas pri ili.

Vi verŝajne jam aŭdis multajn el tiuj komentoj de aliaj eksterlandanoj. Ni pardonpetas pri tio.

Spaco, popolo, montoj ...

Antaŭ ol viziti – mi eltrovis kelkajn faktojn pri via lando. La loĝantaro estas 48,4 milionoj. Kaj ne estas granda

lando kompare kun nia. (Preskaŭ 90oble pli malgranda ol Aŭstralio).

Kutime mi laboras ekstere en Aŭstralio – kun grandaj vidaĵoj, horizontoj, preskaŭ sen homoj ! En multaj naciaj parkoj, - la tero etendiĝas (ofte sen montoj) tiom foren kiom la okuloj povas vidi.

En Koreujo la popoldenseco estas proksimume 480 homoj sur ĉiu kvadratkilometro – unu el la plej grandaj en la mondo ! En Aŭstralio la popoldenseco estas nur 2 (du !) sur ĉiu kvadratkilometro. 10,4 milionoj loĝas en Seulo, fakte la duono de la tuta aŭstralia loĝantaro.

Tial mi tre antaŭĝuis mian restadon en Koreujo. Kia teruro !! Aŭtomobiloj ! Bruo ! Homamasoj ! Malbona aero ! Konstruaĵoj ĉie.

La montoj (kaj la montgrimpantoj).

Min vere surprizis la koreaj montoj ! Ĉie videblas montoj – do kiam mi estis en la apartamento de Sandor aŭ en lia oficejo, - kaj mi sentis min iomete tro urbana – mi rigardis montojn tra la fenestro. Kaj la montoj plenas de arbaroj.

La grandeco de ŝuoj.

Miaj ŝuoj rompiĝis kaj mi decidis aĉeti novajn ! Sed tio ne eblis, mi (eĉ ne kun la kunula helpo de Sandor). Mi serĉis kaj serĉis en kelkaj ŝuvendejoj, sed ne trovis taŭgajn ŝuojn. Ĉiuj estis aŭ tro malgrandaj aŭ miaj piedoj estis tro grandaj. Poste mi parolis iomete kun germanino, kaj ankaŭ ŝi konsentis kun mi kaj informis min, ke ŝi devis aĉeti novajn ŝuojn per la reto (!)

Fakte ĉi tie mi sentas min iomete giganta kompare al la koreinoj ! Ankaŭ iomete mallerta, ĉar multaj estas ne nur pli malgrandaj, sed ankaŭ pli graciaj, pli puraj ktp.

Ekzemple, kiam mi montgrimpis en la bela granda montaro de via Jirisan Nacia Parko, la vetero ne estis bona – fakte pluvis ĉiun tagon – ni marŝis dum tri tagoj. Je la fino de la tagoj ĉiun vesperon – mi rigardis miajn ŝuojn, ŝtrumpojn, mian pantalonon kaj ĉio estis malpura, plena de koto, sed kiam mi rigardis la vestaĵojn de la koreinoj, preskaŭ ĉio estis pura !? Eĉ la montgrimpantoj kun siaj blankaj pantalonoj ! Kiel tio eblas !

Plastaj pakaĵoj.

Ŝajnas ke koreoj havas grandan deziron meti ne nur unu, sed ofte tri tavolojn da pakaĵmaterialo ĉirkaŭ biskvitojn, kafon, eĉ fruktojn. Tamen estas bone, ke kelkfoje oni devas pagi kontraŭ plasta saketo en la vendejoj.

Rizproduktoj.

Ni estis tre imponitaj vidi, sperti kaj gustumi la grandan variecon de rizproduktoj. Rizo, rizo, rizo, kimbap, bibimpap, duk, soju, grandaj rizbiskvitoj...

Planko.

Eĉ ĝis nun ni tute al kutimiĝis sidi sur la planko. Multaj koreoj preferas tion eĉ kiam ekzistas tabloj kun seĝoj en la sama ĉambro.

Akvo.

Mi daŭre miras pri la akvo el krano jam ekde mia unua vizito en 2002. Ĉu eblas trinki ĝin? Multaj respondis ke *jes*. Tamen, ili mem ne trinkas ĝin, sed ĉiam aĉetas akvoplenajn akvobotelojn en la vendejoj.

Batado en la lernejo.

Mi aŭdis, ke oni ankoraŭ batas la lernantojn en la mez-kaj altlernejo. Tamen estis granda ŝoko por mi, kiam mi vidis tion dum mia instruado de la germana en la altlernejo. Ankaŭ vidante lernantojn en la ... joga pozo de hundo, nur por eltrovi ke ili ne praktikas jogon, sed estas punataj, ĉar ili ludis per la klasĉambra komputilo dum la paŭzo.

Suneung (Universitata enirekzameno)

La 15an de novembro ni ellitiĝis frumatene por sperti la alvenon de la ekzamenantoj. Kia spektaklo! Kantoj, ĉokolado, policistoj, maltrankvilaj gepatroj, ĉefe patrinoj.

Malrapide mi komprenis, ke tiu ekzameno dominas la vivojn ne nur de la lernantoj, sed ankaŭ de multaj familianoj.

Kelkaj koreoj substrekis, ke almenaŭ la ekzameno estas egala... sed ĉu vere? Mi scias, ke kelkaj gepatroj elspezis 1,5 milionoj da Won ĉiun monaton por kromstudado de siaj gefiloj. Preskaŭ mia tuta monatsalajro. Tutcerte multaj ne havas tiom da mono.

Speguloj – ĉie.

Ni vidis spegulojn preskaŭ ĉie, en ĉiu domo, klasĉambro, enirejoj, elirejoj, koridoroj, ... kaj la koreoj vere uzas ili pli ofte ol ni. Estus interese eltrovi kial.

Ni volas ankaŭ uzi tiun okazon por dankegi ĉiujn esperantistojn en Koreujo, kiuj gastigis nin, regalis nin, babilis kun ni, amikiĝis kun ni, vojaĝis kun ni. Vi vere estas tiuj, kiuj faris nian restadon tre speciala kaj memorinda.

Multajn dankojn Amelano, Arbara, Dianto, Fonto, Iela, Leono, Mondego, Onklo, Perla, Plena, Ŝlosilo, Urso.

Mi restos membro de KEA kaj ni esperas, ke iam ni povos redoni vian malavaran gastamon almenaŭ al kelkaj el vi en Aŭstralio.

“Kiom aĝas tiu el viaj filoj, kiu ankoraŭ loĝas hejme ĉe vi?”

”38 aŭ 35 jarojn, mi ne plu memoras.”

“Kiom da jaroj li loĝas ĉe vi?”

”45 jarojn!”

La Aŭstraliaj Esperanto-Somerkursaroj

Estas decidite ke la venontajn kvin jarojn la Esperanto-Somerkursaroj de Aŭstralio Esperanto-Asocio okazu en Sidnejo, nome en la Internacia Domo de la Sidneja Universitato. Jam unu fojon ni somerkursarumis tie, do la plej multaj el ni bone konas tiun lokon.

La unua Esperanto-Kongreso de Aŭstralio Esperanto-Asocio okazis en 1911 en Adelajdo, la belega ĉefurbo de Sudaŭstralio. Laŭ mia, kaj kompreneble ankaŭ laŭ la opinio de multaj aliaj esperantistoj aŭstraliaj, estus bone, eĉ bonege, se, ĉar nun ni ne povos havi la Somerkursaron ĉi tie, ĉar decido estas decido, ĉu ne? Ni havu almenaŭ la Esperanto-Kongreson en Adelajdo. Sed ni atendu por scii, kio okazos !

“Sed Ivano, ĉu vi intencas iri al la lernejo kun tiuj malpuregaj manoj?”

”Jes, tio ne gravas, ĉar mi neniam levas la manon!”

Mi, la ĝentilulo

Tio ĉi, kion mi nun rakontos al vi, vere okazis al vera persono, nome al mi, ĉar vere, ankaŭ mi estas vera persono. Mi estis en Perto en aprilo 1976. Mi estis en la ĉefstacidomo, ĉar mi intencis ien iri per vagonaro. Mi alvenis al la stacidomo iom tro frue, mi do aĉetis al mi mem gazeton, tason da kafo kaj paketon da biskvitoj. Mi serĉis tablon, iris tien kaj sidigis min. Mi volas, ke vi bildigu al vi la scenon. Tre gravas, ke vi komprenu tion, kio okazis: jen la tablo, gazeto, taso da kafo, kaj paketo da biskvitoj. Iu ulo sidas vidalvide al mi. Li aspektas tre ordinare vestita en sia plej multekosta vestaĵo kaj portanta sian teknon. Mi ne suspektis, ke li faros ion strangegan. Sed subite li elstreĉis sian manon, prenis la paketon da biskvitoj kaj ŝirmalferminte ĝin elprenis unu kaj manĝis ĝin.

Nu, ni aŭstralianoj, ĉar ankaŭ ni estas civilizitaj, tre malfacile scias, kion fari en tiaj situacioj. Ni ne lernis ion ajn en la lernejo pri tio, kion fari, kiam nekonato, tagmeze, subite manĝas nian biskviton. Se tio estus okazinta en Ĉikago, tre baldaŭ estus fumantaj kaj bruantaj pafiloj, helikopteroj, policistoj ktp. Sed mi faris tion, kion ĉiu civilizito faras. Mi faris nenion, krom simple ignori lin !

Mi rigardis mian gazeton, trinkis guteton da kafo, ekprovis solvi la krucvortenigmon, sed ne povis. Kion mi faru? Mi provis ne rimarki, ke la biskvitpaketo estas malfermita. Mi elprenis unu biskviton por mi mem. Tio montros al li, al kiu apartenas la biskvitoj, ĉu ne ?

Sed ne, ĉar unu aŭ du momentojn poste, li refoje prenis unu biskviton kaj manĝis ĝin. Ĉar mi ignoris tion la unuan fojon, estis nun multe pli malfacile ignori lin. “Pardonu min, mi ĵus rimarkis, ke...” Ne, ne eblis ion ajn fari aŭ diri.

Tiel ni kune finis la tutan pakaĵon. Dirante la tutan pakaĵon mi volas diri, ke estis nur ok biskvitoj en ĝi. Sed mi sentis kvazaŭ la tutan vivon ni sidis tie kaj manĝis biskvitojn. Mi prenis unu, li prenis unu, mi prenis unu, li prenis unu, mi prenis unu, li prenis unu, mi prenis unu, li prenis unu, mi prenis unu, li prenis unu. Finfine, je la fino, li starigis sin kaj foriris. Nu, ni interŝanĝis signifoplenajn rigardojn. Tiam li estis for, kaj mi

sentis min pli komforta. Momenton aŭ du poste venis la vagonaro. Mi englutis la ceteron de mia kafo, starigis min, prenis mian gazeton, kaj tie, sub la gazeto ... estis miaj biskvitoj.

Antaŭ ol mi finos ĉi tiun tre interesan historion mi volas diri ĉi tion: amuzas min, ke ie en Aŭstralio estas ordinarulo, kiu la lastajn 30 jarojn ĉirkaŭiras rakontante la saman historion; sed lia historio ne finiĝas same amuze kiel mia.

“Tiu malsano ‘myasthenia gravis’, ĉu ĝi entute efikas sur via memoro?”

“Jes.”

“Kaj kiel ĝi efikas sur via memoro?”

“Mi ne memoras.”

“Ĉu vi ne memoras? Ĉu vi povs doni al mi ekzemplon pri io, kion vi forgesis?”

Ĉu plaĉus al vi instrui la anglan en Ĉinujo?

Ĉina altlernejo bezonas tri universitate instruitajn instruistojn kun minimume du jarojn da sperto pri instruado de la angla lingvo al ĉinoj. La altlernejo situas en provinco Hunai en Mezĉinujo. La instruistoj loĝos en la altlernejo. La salajro estos proksimume US\$ 800 ĉiumonate.

Se vi interesiĝas pri tiu ĉi laboro, bonestu sendi retmesaĝon en aŭ Esperanto aŭ la angla al bluaĉielo@163.com.

Internacia Virina Tago

Dum la 92a UK en Jokohamo s-ino OSIOKA Taeko kune kun sia edzo ekspoziciis 158 respondajn mesaĝojn el 50 landoj de Internacia Virina Tago 2007 en Hiroŝimo, kiel ankaŭ kvin fojojn en aliaj lokoj.

Same ĉi tiun jaron ili kunagas por la Virina Tago en Hiroŝimo.

En la duan mondmiliton oni entiris la loĝantojn de Okinavo. Mortigitaj estis 94.000 japanaj soldatoj kaj

proksimume 150.000 civiluloj, la plej multaj virinoj, infanoj kaj gemaljunuloj.

Hodiaŭ 75% el la usonaj militbazoj troviĝas en Okinavo okupantaj 11%-n el ĝia tereno.

Okazos ekspozicioj de “Porpacaj Mesaĝoj de Virinoj en la Mondo”, “Batalo en Okinavo” kaj simpozion pri “Partopreno de Virinoj en Politika Decido”.

Ni hiroŝimaj virinoj neniam plu deziras militon, konsiderante ĝin krimo kontraŭ la homaro. Laŭ la 9a artikolo: “La japana popolo, sincere dezirante internacian pacon bazitan sur justeco kaj ordo, por ĉiam rezignas kaj militon, kio estas ekfunkcio de regnopotencoj, kaj minacon per armita forto aŭ uzon de armita forto, kiel rimedon por solvi internacian konflikton. Por realigi la celon de la antaŭa paragrafo ĝi neniam tenas landan, maran kaj aeran fortojn kaj ankaŭ ne aliajn militfortojn. Ni ne agnoskas la rajton de militado de la regno.

Ni klopodu por paco kaj homaj rajtoj kun virinoj en la mondo. Ni trans muroj de nacieco, religio kaj kulturo kunlaboru manon en mano, tenu reciproke por konstruado de paca 21a jarcento. Bonestu doni al ni vian mesaĝon pri paco. Ni prezentos ĝin en la ekspozicio por la Virina Tago helpe de esperantistoj en la tuta mondo.

S-ino NOBUMASA Tieko, reprezentanto de la Komitato por Internacia Virina Tago 2008/ Municipo Hiroŝimo.

[Osioka!mail.goo.ne.jp](mailto:Osioka@mail.goo.ne.jp)

“Kio estis la unua, kion via edzo diris al vi ĉimatene?”

”Li diris, ’kie mi estas, Sonja?’”

”Kaj kial tio maltrankviligas vin?”

”Ĉar mi nomatas Susan.”

Kaj tio estas la fino por marto!

Tamen★Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO.

APRILIO 2008, JARKOLEKTO 27

Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019

esperantobob@iprimus.com.au

Legeblas ankaŭ interrete: www.gazetejo.org

Sidis du gejunuloj en malgranda restoracio itala. Pene ili traliterumis la menukarton.

”Mi ne scias, kion mi mendu en ĉi tiaj lokoj”, diris la junulo.

”Mendu malsanulveturigilon”, ĝemis la junulino. – “Jen venas mia edzo!”

Gravaj Esperanto-eventoj:

La 26an de marto: Renkontiĝo kun Amato kaj Rikardo ĉe Sandor je la 17.30a horo.

Merkredon la 2an de aprilo ni renkontiĝos en la Komunumejo en Clarence Park je la 18a horo.

La 12an de aprilo teatraĵoj ĉe Pat je la 18a horo.

Ekskurso al Price iam en junio.

Ekskurso al la zoologia ĝardeno Monarto.

La Sepa Tutamerika Kongreso okazos de la 12a ĝis la 18a de julio 2008 en Montrealo, Kanado.

Ekskurso al la ŝipmuzeo en aŭgusto.

De la 23a ĝis la 30a de aŭgusto 2008 okazos la 34a Internacia Semajno de Esperanto en Sète, Francujo.

Ekskurso al la malnova malliberejo en septembro.

En 2008 la Universala Kongreso de Esperanto okazos en la belega ĉefurbo de Esperantujo, Roterdamo, Nederlando.

Tuj poste la Internacia Vegetarana Unio festos sian centjariĝon en Dresdeno, Germanujo.

Ankaŭ TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio) festos sian centjariĝon en 2008.

Kantado ĉe Indrani la 18an de oktobro je la 17a horo.

La Universala Esperanto-Kongreso okazos en 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.

Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, “Lingvaj Resondoĵ”, la elstaran Esperantologon, Marcelo mendu ĉe 12 Heather Grove,



pli ol nur unu fojon, verkon de nia eminenta Leereveld. Lian verkon Belgrave South, Viktorio

3160, kontraŭ nur \$23,00!

Iun matenon la buso estis eksterordinare plena, eĉ plenplena. Subite unu el la pasaĝeroj, kiu sidis ĉe la fenestro, kovris sian vizaĝon per la manoj.

“Kio okazas?” demandis tiu, kiu sidis apud li. “Ĉu vi malsanas?”

“Ne, certe ne”, respondis la viro ĉe la fenestro”, sed ne plaĉas al mi vidi maljunulinojn starantajn!”

Legu ankaŭ la treege bonegan libron, “Mummy, why can't we all speak the same language?” Mendu ĝin kontraŭ nur \$ 6,95 plus afranko \$1,95, ene de Aŭstralio, rekte de la tre klera verkinto kaj esperantistino, Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith, NSW 2077 aŭ perrete Nicole@cryogenic.net.



“Paĉjo, ĉu vi frekventis dimanĉolernejon, kiam vi estis malgranda?”

“Kompreneble, fileto mia.”

“Mi kredas, ke ankaŭ mi ne fariĝos pli bona tion farante!”

Kotizplialtiĝoj

Dum la ĉiujara ĉefkunveno merkredon la 5an de marto estis decidite plialtigi la kotizojn. Ekde nun familiaj gemembroj pagos \$ 40,00; ordinaraĵoj pagos \$ 35,00; familiaj gemembroj pensiulaj pagos \$ 30,00 kaj ordinaraĵoj gepensiuloj pagos \$ 25,00.

Ni dankas vin pro via preteco pagi por 2008. Kotizojn akceptas nia kasistino Indrani Beharry-Lall.

Ĝis nun pagis Margaret Furness, Eileen Jones kaj la familio Dan Ehlers. Koran dankon!

Veturas ĵusgeedziĝintoj laŭ arbara vojo per sia malgranda aŭtomobileto. Subite ekploras la ĵusedziniĝinto. “Sed kial vi subite ploras?” demandas la ĵusedziĝinto.

“Ĉar vi ne plu amas min. Kiam ni estis gefianĉoj, via malgranda aŭtomobileto ĉiam paneis ĉi tie!”

Mirmekobo

La mirmekobo estas belega besteto vivanta en Sudokcidentaŭstralio. Ĝia korpo mezuras proksimume 25 centimetrojn kaj la vosto 18 centimetrojn. Ĝia scienca nomo estas *Myrmecobius fasciatus*, la angloj nomas ĝin *Banded Ant-eater* aŭ *Numbat*, la germanoj *Ameisenbeutler*. La danoj havas alian nomon

por ĝi: *Stribet Pungmyresluger*, t.e. *striita poŝformikglutanto*, aŭ eble iom pli bone *striita formikglutanto kun poŝo*.

Multo menciblas pri la mirmekobo. La plej nova estas, ke ĝi estas revuo espereble aperonta la unuan fojon en aprilo ĉijare. Ĝia redaktoro estos la eminenta Donald Broadribb, kiu vaste konatas pro sia bonega laboro pri “Esperanto sub la Suda Kruco”, kiun li pro bedaŭrindaj tialoj ne post la marta-aprila estas ĝis nun disvastigita redaktos “Esperanto sub la post tiam. Estos ege redaktoron tiom bonan Broadribb, ĉu ne? Ni estu al li tre dankaj, ĉar li tiom da jaroj plenumis la tre malfacilan taskon parte verki, redakti kaj eldoni ĝin!!!



redaktos numero. Nenio pri tio, kiu Suda Kruco” malfacile trovi kiom Don

Tiu nova revuo “Mirmekobo” estos unu el la plej bonaj en Esperantujo. Mi diras “Esperantujo”, ĉar nur en Esperantujo ĝi legeblas. Sed ĝi tute ne temos pri Esperanto kaj Esperantaj aferoj. Ĝi temos pri literaturo, arto kaj kulturo, kaj verŝajne ankaŭ ĉiutagaĵoj, sed nur en Esperanto. Neniu alia lingvo permesatos en ĝi. Ĉiun gloron al Don pro tiu decido. Tial nur tiuj, kiuj scipovas Esperanton povos legi ĝin. Tamen ankaŭ niaj komencantoj povos, kaj mi eĉ rekomendas al ili fari tion, ĉar dediĉante sin al parolado, aŭskultado, skribado kaj legado en Esperanto, oni sendube lernos tiun lingvon.

La revuo “Mirmekobo” senpage elŝuteblas el mirmekobo@mac.com, sed bonvolu skribi al Don ĉu vi deziras regule legadi ĝin!

“Ĉu vi deziras mencii ion, kio plimildigos mian juĝon?”

“Jes, sinjoro juĝisto! Mi deziras ke vi prikonsideru la junecon kaj mankantajn spertojn de mia advokato.”

Islama Esperanto-Asocio por Interkultura Dialogo

Alvoko por membriĝo

Estas starigita nova asocio Islama Esperanto-Asocio por Interkultura Dialogo, kies celo estas grupigi islamajn esperantistojn, kiuj kredas je la neceso dialogi kun homoj el aliaj kulturoj kaj aliaj religioj, volas disvastigi Esperanton kiel rimedon por ĉi tiu dialogo kaj volas konigi al la parolantoj de Esperanto la islaman kulturon en la monda lingvo, Esperanto.

Ĉiu interesiĝanto rajtas peti la statuton de la prezidanto, Saeed Ahmad, kaj oni jam nun povas membriĝi per pagado de kotizo 5 eŭroj al la konto de la asocio ĉe UEA: konto ieas-x de Islama Esperanto-Asocio. Validas la kutimaj pagomanieroj al UEA (paĝo 36

de la Jarlibro 2007). Indiku kiel pagocelon la jenan: "Kotizo 2008 IEA".

Samtempe vi bonvolu sendi vian nomon kaj adreson al la sekretario de IEA: Saidnabi Saidilhomzoda saidnabi@mail.ru.

La prezidanto de IEA, Saeed Ahmad, saeedfaranipk@yahoo.com

En la dimanĉolernejo oni preĝis pri bona vetero por la ekskurso venontan dimanĉon, sed eĉ malgraŭ tio, pluvegis la tutan tagon.

"Ŝajnas ke iu bienisto preĝis pli fervore ol ni", diris unu el la knabetoj.

La Korano ree haveblas en la Libroservo de UEA
Kvin ekzempleroj de la Nobla Korano, tradukita de Italo Chiussi estas provizore rehaveblaj en la Libroservo de UEA. La prezo estas 24,00 eŭroj plus sendokostoj.

Mendu ĉe libroservo@co.uea.org

Renato Corsetti

Aŭdigis dum sindikata kunveno: "Ĉu vi scias, ke ni perdos unu lunĉopaŭzon kaj du kafopaŭzojn, se ni enkondukos kvartagan semajnon?"

Ni tenu Esperanton viva

Esperanto estas vivanta lingvo, kaj ĝi evoluas. Tial ni devas atenti pri ĝia evoluo por vidi, ĉu ĝi laŭiras la vojon indikitan de la Fundamento kaj de aŭtoritataj decidoj de la Akademio de Esperanto.

Krome ni devas aparte atenti ke verkantoj de lernolibroj kaj retaj kursoj prefere prezentu al lernantoj nur la klasikan Esperanton, sen malregulaĵoj kaj tro da okcidentaĵoj.

Tiu tasko ideale apartenus al la Akademio, sed ĝi ne havas la aparaton kaj ŝajne nek la volon plenumi ĝin.

Se vi zorgemas pri nia lingvo kaj volas kunlabori por fari ion, simple aliĝu al la listo klasika-esperanto@googlegroups.com per senteksta mesaĝo al klasika-esperanto-subscribe@googlegroups.com

Johan Derks derks.esp@tiscali.nl

Fakte ekzistas nur tri specoj de homoj. Tiuj, kiuj certigas, ke io okazas, tiuj, kiuj vidas tion, kio okazas, kaj tiuj, kiuj cerbumas pri tio, kio okazis.

Internacia Semajno de Esperanto en Sète

Ni bonvenigos vin en granda parko 50 metrojn de la maro.

Instruistoj: Anne-Marie Petre el Francujo: kurso por komencantoj. Hanna Cayzac el Polujo: paroliga kurso. Svetlana Smetanina el Rusujo: perfektiga kurso.

Aliĝo: ĝis la 1a de majo € 65. Post la 1a de majo € 80. Por kunuloj € 20. Estos senpage por junuloj malpli ol 26 jaraĝaj krom € 10 por asocia kotizo.

Instruado okazos kvar kaj duonan horojn matene kaj posttagmeze.

La Franca Esperanto-Instituto ekzamenos 1an kaj 2an gradojn kaj disdonos atestilon pri ĉeestado.

Estos kromaj programeroj: turismaj, distraj kaj kulturaj (vidu la retejon) <http://perso.orange.fr/nikolao/esperanto.html>

Kontaktadreso: ESPERANTO KULTURO kaj PROGRESO 10, impasse école J. Ferry, Fr-34290 SERVIAN, TEL+FAKSO: 33(0)4 67 39 16 30, rete: jf.passarella@free.fr Eblos loĝi surloke (vidu la retejon). Limdato 2008-7-14)

Eta Dan malfermas la pordon kaj vidas la junulon, kiu staras ekstere. Dan turnas sin kriegante: "Franjo, Franjo, venis tiu, kiu pli bonas ol nenio."

Kiuj estas la primitivuloj?

Ĉu eblas vivi sur tiu ĉi terglobo sen militoj? Jen la demando. En la komenco oni ne tiom maltrankviligis sin pri aliaj nacioj. Sufiĉis la problemoj neeviteblaj kun najbaroj, kaj pli ofte ol neniam, eĉ en la propra familio. Sed iom post iom oni apartenis al triboj, kaj subite al nacio, kaj la Tero plenatis de ŝtatoj. Nu, ĉiu bona ŝtatano konsideris sin kaj siajn kunŝtatanojn multe pli bonaj ol ĉiuj aliaj. Tiuj aliaj konsideratis primitivuloj. Tiujn oni, laŭ si, rajtis persekuti

kaj mortigi. Tio ankoraŭ hodiaŭ okazas. Legu nur la ĵurnalojn aŭ rigardu la televidon. Ĉiutage, kaj la tutan tagon, oni vidas raportojn pri la glora milito, kiu devus doni malplikostan benzinon al ni, ĉu ne?

Pasis la tempo kaj kvankam la militoj ankoraŭ ne montras iujn signojn pri ĉesado, iuj progresemluloj, aŭ eble eĉ la registaroj, elpensis aliajn metodojn malami unu la aliajn, kaj oni elektis la tiel nomatan sporton. Oni batalas inter si per spadoj kaj rapiroj, oni ludas tenison, kriketon, kaj multaj adoras la buĉan boksadon. Tio tute ne plaĉas al mi, mi preferas naĝadon, almenaŭ ĝis nun mi ne vidis naĝanton dronigi alian naĝanton. Precipe la piedpilkludado estis popularigita. Teamoj, t.e. grupoj da ludantoj, povas batali unu kontraŭ la aliaj. Ili ne rajtas mortigi unu la aliajn, do tio estas eta progreso, sed la malamo restas. Precipe kiam okazas piedpilkbatalado inter du malsamaj nacioj. Tiam la rigardantoj elmontras sian malamon al la alia nacio ĵetante malplenajn bierbotelojn al la kapoj de la piedpilkbatalantoj esperante frakasi ties kraniojn. Kaj la tuta nacio jubilas dum la registaro ĝojegas, ĉar nun la popolo ne plu pensas pri tio, kio okazas en la registaro, ilia sangosoifo portempe satiĝis.

Estas tre bedaŭrinde, ke ni homoj ankoraŭ ne lernis el niaj eraroj. Iam diris al mi norvega ĵurnalisto, ke Esperanto-kongresojn ĉeestas multe malpli da entuziasmluloj ol piedpilkbatalojn. Esperanto-kongresojn ĉeestas nur kelkaj centoj da pacamantoj dum piedpilkbatalojn ĉeestas miloj kaj miloj da fanatikuloj. Tial, laŭ la ĵurnalisto, piedpilkbataloj estas pli popularaj ol Esperanto. Povas esti ke li pravas, sed tio ne signifas, ke tio estas bona. Tio pruvas nur la malnovan proverbon, ĉu ne? “Estas nur kvanto, sed mankas kvalito!”

Kiam la homaro malpli primitiviĝos mi esperas vidi, ke neniu ĉeestos piedpilkbataladojn kaj militojn, sed anstataŭe ĉeestos operojn. Tiam homoj el ĉiuj nacioj kune kantos sen malico kaj malamo, kaj la milkapa geaŭskultantaro ravite aplaudos post la prezentado. Tio estos kaj kvanto kaj kvalito. Alivorte, baldaŭ, ne, pardonu min, jam nun estas

tempo pensi malpli pri aferoj korpaj kaj fizikaj, kaj anstataŭe koncentri nin pri tiuj mensaj kaj spiritaj.

Ĉesu do, kiom eble plej baldaŭ, ĉiuj frenezaj kaj sensencaj bataloj inter homoj, kaj, kial ne, ankaŭ inter bestoj kaj plantoj. Kaj, laŭ mia opinio, se ni esperantistoj ne pretas montri la vojon irendan, ni post miloj kaj miloj da jaroj, ankoraŭ malamos unu la aliajn kaj vidos militojn sur tiu ĉi Tero. Terura perspektivo, ĉu ne?

Raporto pri la Virina Tago

En Hiroŝimo okazis la 8an de marto kunveno de la Internacia Virina Tago de UN kun 500 partoprenantoj. Ĉiuj ricevis broŝuron kun viaj mesaĝoj. Krome, en la Urba Virina Eduka Centro okazis de la 2a ĝis la 9a de marto ekspozicio de la mesaĝoj, kaj 200 vizitantoj kun granda intereso legis entute 157 mesaĝojn el 50 landoj:

El Azio 17. Barato 2; Ĉinujo 3; Irano 1; Israelo 3; Kazaĥujo 1; Koreujo 2; Nepalo 2; Pakistano 1; Uzbekujo 2.

El Nordameriko 9. Kanado 3; Usono 6.

El Sudameriko 7. Argentino 2; Brazilo 2; Kostariko 1; Kubao 2.

El Afriko 10. Ganao 1; Kongolo 1; Komoroj 1; Madagaskaro 1; Niĝerlando 3; Senegalio 1; Sudafriko 1; Togolando 1.

El Eŭropo 108. Albanujo 2; Belgujo 5; Britujo 1; Bulgarujo 3; Ĉeĥujo 4; Danujo 3; Finnlando 3; Francujo 33; Germanujo 4; Hispanujo 3; Islando 3; Italujo 9; Hungarujo 5; Kroatujo 1; Luksemburgujo 1; Malto 1; Nederlando 4; Norvegujo 2; Polujo 5; Rusujo 4; Serbujo 5; Svedujo 3; Svisujo 3; Ukrainujo 1.

Elkorajn dankojn al ĉiuj el vi gekaruloj. Mi plu luktos, luktos pli pasie por morgaŭa pli bona mondo.

OSIOKA Taeko

Sciis maljunulo pri sia baldaŭa forpaso kaj diris li al sia plej bona amiko: “Ĉu vi bonvolos elverŝi botelon da viskio sur mian tombon post mia enterigo?”

“Jes volonte, mia malnova amiko”, diris la plej bona amiko, “sed ĉu vi kontraŭas, ke ĝi unue trairos mian hepaton?”

La unua Mezorianta Kunveno

La komisiono de UEA pri Mezoriento kaj Nordafriko kore invitas vin al la unua Mezorianta Kunveno, organizata de ĝi subtene de la fonduso ”Cigno” ĉe UEA, en la Universitato de Jordanio, inter vendredo la 11a kaj lundo la 14a de aprilo 2008!

Tiu ĉi evento estigos maloftan eblecon por renkonti gesamideanojn el diversaj malsamaj landoj en Mezoriento, tamen kore bonvenaj estos ankaŭ partoprenontoj el ĉiuj aliaj mondpartoj. Vi interkonatiĝos, pridiskutos gravajn kaj interesajn temojn kaj iomete turismumos en tiu ege bonveniga lando.

Dezirantoj ekskursi postaranĝe al pli sudaj vizitindaĵoj – Petra, La Valo Ramo (Wadi Ram) kaj Akabo (Aqaba) – povos fari tion kune post la kunveno.

Ĉe la paĝaro: <http://www.arabujo.afriko.org/> musumu sur 1-a Mezorianta Kunveno kaj tie vi povas legi pri la progreso de la organizado, informiĝi pri la lokoj, pri la programo kaj pri la partoprenkotizoj, (nepre!) aliĝi, kaj vidi kiuj aliaj jam aliĝis.

Kaj se vi havas iun ajn demandon, proponon, problemon, plendon aŭ alian dirindaĵon, ne hezitu skribi al la organiza teamo: mezorianta.kunveno@gmail.com

La estraro de Novsudkimra Esperanto-Federacio:

Prezidanto: Alan Turvey. Vicprezidanto: Henriette Vanechop. Sekretario: Margaret Chaldecott. Kasisto: Roger Springer. Aliaj estraranoj: Martin Gray, Jonatano Moylan, Volo Gültling kaj Yaw.

Kuracisto: “Neniu dubo pri tio, vi estas venenita.”

Malsanulo: “Per kiu veneno?”

Kuracisto: “Tion ni scios nur post la nekropsio!”

Tamen★Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO.

MAJO 2008, JARKOLEKTO 27

Redaktanto: Bob Felbi – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019

esperantobob@iprimus.com.au

Legeblas ankaŭ interrete: www.gazetejo.org

Dum juĝafero post vagonarakcidento la tre nerva kaj maltrankvila staciestro Adriano, tio estas lia nomo, devis fojon post fojo certigi, ke li vere svingis la ruĝan lanternon. Poste demandis lin lia amiko Alduso:

“Ĉu ne estis terure estis pridemandite tiom senkompatate?”

“Jes”, respondis staciestro Adriano, “sed mi estis tre bonŝanca, ke neniu min demandis, ĉu la lanterno estis lumanta...!”

Grava Ĝustigo

En la aprila Tamen Plu aperis tre grava eraro. Sur paĝo 8 estas skribite, ke ankaŭ Yaw Ampomah estas estrarano de Esperanto-Federacio de Novsudkimrujo. Tio ne veras. Yaw tute ne interesiĝas pri tiaj aferoj, li preferas vivian vivon feliĉa. Kaj tion li, ankaŭ laŭ mia opinio, rajtas!

“Mi estas leganta rakonton pri malriĉa knabino, kiu edziniĝas al riĉulo.”

“Se tiu rakonto vere estas vera, ĝi sendube finiĝas per riĉa knabino forlasanta malriĉulon!”

Gravaj Esperanto-eventoj:

Merkredon la 7an de majo ni renkontiĝos en la Komunumejo en Clarence Park je la 18a horo.

Ekskurso al Price iam en junio.

Ekskurso al la zoologia ĝardeno Monarto iam en julio.

La Sepa Tutamerika Kongreso okazos de la 12a ĝis la 18a de julio 2008 en Montrealo, Kanado.

Ekskurso al la ŝipmuzeo en aŭgusto.

De la 23a ĝis la 30a de aŭgusto 2008 okazos la 34a Internacia Semajno de Esperanto en Sète, Francujo.

Ekskurso al la malnova malliberejo en septembro.
En 2008 la Universala Kongreso de Esperanto okazos en la belega ĉefurbo de Esperantujo, Roterdamo, Nederlando.
Tuj poste la Internacia Vegetarana Unio festos sian centjariĝon en Dresdeno, Germanujo.
Ankaŭ TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio) festos sian centjariĝon en 2008.
Kantado ĉe Indrani la 18an de oktobro je la 17a horo.
La Universala Esperanto-Kongreso okazos en 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.

“Sed kara Agata, vi aspektas tre malsana, kio en la mondo okazis?”

”Ho, mi trinkis la fluidan sapon, kiun oni uzadas por lavi la manĝilaron.”

“Ĉu la fluidan sapon, kiun oni uzadas por lavi la manĝilaron. Sed kial?”

“Ĉar estis skribite sur la botelo ke ĝi forigas grason!?”

Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, “Lingvaj Resondoj”, la elstaran verkon de nia eminenta Esperantologo, Marcelo Leereveld. Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur \$23,00!

Eta Agnes amas biskvitojn. Ŝia patrino opinias, ke ŝi manĝas tro da ili. Tial ŝi diris al Agnes:

“Se vi manĝas tiom da biskvitoj, vi fariĝos tro dika.”

Kelkajn tagojn poste eta Agnes sidas en la buso. Eniras gravedulino.

”Mi bone scias, kion vi faris”, diras eta Agnes – ”sed estis rave agrable, ĉu ne?”

Legu ankaŭ la treege bonegan libron, “Mummy, why can’t we all speak the same language?” Mendu ĝin kontraŭ nur \$ 6,95 plus afranko \$1,95, ene de Aŭstralio, rekte de la

tre klera verkinto kaj esperantistino, Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith, NSW 2077 aŭ perrete Nicole@cryogenic.net.

Diras la somergasto: “Kial la porko la tutan tempon provas eniri mian ĉambro?”

Kamparano: “Verŝajne ĉar li loĝas en tiu ĉambro dum la vintro!”

Transskribado de nomoj personaj kaj aliaj

Multaj homoj en la mondo ne uzadas la latinan alfabeton, sed iun alian: rusan, araban ĉinan ktp. Tial ili estas devigataj transskribi nomojn.

Sed en Esperantaj tekstoj oni ofte renkontas ankaŭ nomojn netransskribitajn aŭ kun neindikita elparolo. Kion ruso devas pensi pri la nomo skribita Goethe? Kion pri la franca persona nomo Jacques? Kion pri la nomo de Nederlanda juristo Hugo de Groot? Ĉu oni devas lerni la prononsmanieron de ĉiuj lingvoj de la mondo?

Oni devas transskribi per nur la literoj de la alfabeto Esperanta. Estas nia devo akcepti, ke niaj nomoj en Esperanta transskribo ricevas alian aspekton, ekz. Gete por Goethe, Ĵak por Jacques, Higo de Ĥrot (Higo de Ĥot) por Hugo de Groot. Tiu maloportunaĵo estas la prezo, kiun okcidentaj esperantistoj devas pagi por ke Esperanto povu esti nomita vere internacia lingvo.

Antaŭ cent jaroj la kutimo prezenti latinliterajn nomojn en la Esperanta transskribo estis sufiĉe ĝenerala, sed tiu kutimo pli kaj pli malaperas. Grupo de esperantistoj, kiuj kolektiĝis ĉirkaŭ la reta diskutlisto klasika-esperanto@googlegroups.com volas refirmigi tiun malnovan kutimon. Ili klopodas starigi regulojn por transskribado de nomoj el ĉiuj lingvoj al Esperanto.

La unuajn provojn tiurilatajn vi povas legi en: http://www.bonalingvo.it/index.php/Konsiloj_por_transskribado Ĉu vi pretas fari la samon por via lingvo?

Amike,

Johan Derks

”Mia fratino naskis suĉinfanon!”

”Gratulojn, kiom pezis la etulino?”

“2 kilogramojn.”

“Tio estas tre malmulta.”

“Jes, sed ŝi estas edziniĝinta nur du semajnojn!”

Esperanto kiel pontolingvo NUN

Jen bona oportuno por montri la taŭgecon de Esperanto kiel utila PONTOLINGVO: La centra oficejo de la Monda Socio Forumo en San-Paŭlo akceptis aldoni Esperantajn tradukojn en sia portalo. En la tradukejo <http://parolumondo.com/forumo/> jam estas kelkaj tradukitaj tekstoj de la Strategia Debato kaj nun ni komencas traduki ankaŭ la Oficialajn Bultenojn el Esperanto, kiel pontolingvo. La teksto de la oficiala bulteno estas mallonga, do ni esperas oferti ĝin en pluraj lingvoj.

Niaj tradukoj aperos en la portalo kaj en la venontaj bultenoj de la Monda Socia Forumo antaŭ centoj da asocioj kaj miloj da homoj el la tuta mondo. Miloj da homoj, kiuj agadas pri MSF, sed parolas neniun el la 4 oficialaj lingvoj (portugala, kastilia, franca kaj angla), serĉos niajn tradukojn. En la piedo de ĉiu traduko nepre aperos ”traduko utiliganta Esperanton kiel pontolingvon” kaj granda ligilo al www.esperanto.net (tiu retejo bele montras plurajn lingvojn).

Ni esperas, ke ankaŭ vi volonte musumos sur la ligilo <kunlabori> en la supra dekstra menuo. Dankon!

Emilio Cid, San-Paŭlo, Brazilo <http://parolumondo.com/forumo/>

Tre plaĉis al Jesuo promeni iomete en la ĉielo. Iun tagon li ekvidis viron sidantan en angulo plorantan. Li ne tre pensis pri tio, sed la postan tagon la sama viro sidis tie ankoraŭ plorante. Aliris lin Jesuo dirante: ”Maljuna viro”, ĉi tio estas la ĉielo. Vi ricevas ĉion, kion vi deziras, varman veteron, renkontiĝojn kun famuloj ktp. Do vi kial ploras?”

”Ĉar”, respondis la viro, ”en mia vivo sur la tero mi estis ĉarpentisto, kaj frue mi perdis mian unusolan filon. Eĉ tre volonte mi renkontus lin, sed mi ne povas trovi lin”.

”Paĉjo!” ekkriis Jesuo.

*La maljunulo sin starigis kaj plorante li ekkris:
"Pinokjo!"*

La 9a Kultura Esperanto-Festivalo

Ĉu esti aŭ ne esti en KEF 9? – tio estas la demando!

Refoje okazos la Kultura Esperanto-Festivalo! Se vi jam antaŭe prenis parton, vi certe memoras pri kio temas: Tagoj dediĉitaj al muziko, teatro, literaturo kaj aliaj kampoj de la Esperanto-kulturo.

En la centa jubilea jaro de la dana kaj universala Esperanto-Asocioj ni prezentos la 9an KEF en la urbo de Hamleto, aŭ almenaŭ en lia kastelo Kronborg, en la urbo Helsingør (Helsinoro) – 40 kilometrojn norde de Kopenhago.

Venu, vidu kaj ĝuu KEF ek de la 12a ĝis la 19a de julio 2008.

La kerna ideo de la festivalo estas ĝui la kulturon, ne nur koncentriĝi pri la lingvo mem kaj ĝiaj propagandaj efikoj. La unikaĵo de KEF estas tio, ke temas pri festivalo, kiu plene koncentras sin al originala altkvalita Esperanto-kulturo.

Ĝi estos gravega forumo por prezenti kaj konsumi diversajn aspektojn de la Esperanto-kulturo kaj instigi homojn al kreemo. Krome, ĝi samtempe estas unika ebleco por Esperanto-artistoj renkonti unu la aliajn kaj iniciati novajn projektojn.

Vidu pli kaj aliĝu ĉe: www.kef.saluton.dk

Kim J. Henriksen kimjezus@plakaten.dk

Virino eniris bestvendejon por aĉeti akvuĵon por sia hundo. La bestvendistino montris al ŝi plurajn modelojn.

"Ĉu vi volas havi iun, sur kiu estas skribite "Hundo"?"

"Tio ne gravas. Mia edzo ne trinkas akvon, kaj la hundo ne povas legi!"

Aŭstralianiĝo de aŭstro

La 29an de marto aŭstralianiĝis fama esperantisto el Adelajdo, nome nia eminenta Sandor Horvath. Esperanto en Sudaŭstralio multe pli ol plej elkore bonvenigas lin al la aŭstralia komunumo. Nun ni estas unu aŭstraliano pli!

La oranĝa koloro

London la 24an de marto dek danaj aktivistoj iris Grekujen por partopreni la ceremonion, kiam en Ateno la 30an de marto la olimpia torĉo estis transdonata al la olimpia komitato de Pekino. La aktivistoj estis **oranĝe** vestitaj kaj aŭtomobile postsekvis la torĉon la lastajn tri tagojn de Lariso ĝis Ateno. La intenco estis, dum la Olimpiaj Ludoj en Pekino 2008, disvastigi la ideon ke la **oranĝa** koloro estas paca kritiko al Ĉinujo pro ties ignoro kaj rompo de la Homaj Rajtoj.

La dana skulptisto Jens Galschiøt kune kun i.a. la ĉina movado por demokratio, ekis la tutmondan projekton "la **oranĝa** koloro", kaj dissendis alvokon tradukitan en 18 lingvojn videblajn interrete; vidu la retpaĝon TheColorOrange.net. Miloj da homoj el ĉiuj anguloj de nia ronda terglobo jam subtenas la ideon kaj multaj preparas oranĝajn aktivecojn.

"Eĉ Ĉinujo ne povas malpermesi "la koloron **oranĝan**" kaj pluraj konantoj de Ĉinujo konsentas, ke ĝuste tiu agado povas ŝakmatigi la ĉinan registaron.

Sed surprize Grekujo, la lulilo de demokratio, decidis aresti la aktivistojn, do nun la tuta afero estas fuŝita. Grekujo subtenas la ĉinan registaron, ĉu pro timo ĉu pro io alia, kion nek mi nek multaj aliaj komprenas. Verŝajne pro mono!

Estus bone, eĉ bonege, se la Olimpiaj Ludoj ne okazus en Ĉinujo. Ĉinujo tion volas nur, ĉar ĝia registaro povas profite gajni el la tuta aventuro. Laŭ mia opinio oni devus bojkoti la Ludojn. Tiam ni ordinaruloj povus rigardi televidon la du aŭ tri semajnojn dum la daŭro de la tedaj Ludoj. Kaj ankoraŭ restas la demando, "kio pri Tibeto?" Ĉu la mondo vere pretas ignori Tibeton favore al sporto?

Parolante pri sporto, ĉu tiu vorto vere estas la ĝusta? Kiam mi, antaŭ multaj jaroj, preskaŭ ĉiutage iris al la lernejo, mi lernis, ke sporto estas por la plifortigo de la korpo, ke sporto stimulas amikecon kaj helpemon inter homoj ktp. ktp. do ke sporto estas io bona. Oni ne povis

imagi al si sportulon kun malbonodoranta cigaredo en la buŝo kaj botelo da biero en la mano. Tiam tio ne estis sporto.

Sed nun ŝajnas, ke ankaŭ tio ŝanĝiĝis. Laŭ la televidaj novaĵprogramoj sporto ne plu estas sporto, kaj sportuloj ne plu estas sportuloj. Nun ili estas sportistoj, ĉar ili gajnas monon per sia "sporto". La plej ambiciaj el ili nun sportas por gajni oron! Ne ĉiuj el ili plu agas amike unu al la aliaj, sed batas siajn kontraŭulojn. Kaj la noktojn ili pasigas en drinkejoj kaj noktokluboj, kie ili agas simile, kredante ke la leĝo tute ne koncernas ilin. Ili fumas cigaredojn kaj ĉion alian, kio malbonodoraĉas. Ili drinkadas alkoholon kaj uzadas kontraŭleĝajn drogojn. Ili ne plu sportas por plifortigi kaj sanigi siajn korpojn. Almenaŭ unu sportisto terure kaj senrespekte batis sian amikinon kaj poste ankaŭ la policistojn, kiuj arestis lin. Similajn raportojn tre ofte dissendas la amaskomunikiloj. Sed ni scias ja, ke oni ne povas kredi ĉion, kion dissendas la amaskomunikiloj, ĉu ne? Se tio veras, kial ni permesu al niaj gefiloj televide rigardi la Olimpiajn Ludojn. Certe mi ne rigardos ilin, kvankam mi eble rigardos la komencajn kaj finajn ceremoniojn, se mi ne antaŭe endormiĝos!

Eta Adalberto kuregis en la sidoĉambbron. "Paĉjo", li kriegis, hieraŭ ni verkis eseon".

"Nu, pri kio? demandis la neinteresiĝanta patro.

"Ni devis skribi pri tio, kion faras niaj patroj... kaj nun mia instruisto kaj du policistoj staras ekster la pordo".

"Instruistoj de Esperanto por la planedo Tero"

Ĉu vi jam planis vian Esperantumadon ĉivintre? Rapidu! ILEI proponas al vi tion, kion vi ĝis nun neniam spertis! ILEI preterkuris UK-n, IJK-n kaj aliajn tradiciajn tutmondajn Esperanto-aranĝojn. La ĉijara ILEI-kongreso okazos en Afriko de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto en Portonovo, Benino kun postkongresa ekskurso de la 5a ĝis la 8a de aŭgusto.

Ĉu plaĉus al vi sperti interkulturan dialogon en afrika medio; fakan programon orientitan al instruemuloj; eblecon persone konatiĝi kun la Esperanto-movado en Afriko;

starigon de kontaktoj por longdaŭra kunlaboro kaj buntan kulturan kaj riĉan ekskursan programon? Se jes, subtenu la aranĝon per via partopreno!

Informojn pri la konferenco, ĝia programo, urbo, partoprenkondiĉoj [trovu ĉe http://www.ilei.info/novaĵoj/Portonovo.php](http://www.ilei.info/novaĵoj/Portonovo.php) La retan aliĝilon trovu ĉe <http://ilei.info/konferenco/aliĝilo2008.php>

ILEI proprakoste subvencios partoprenon de 20 afrikanoj. Ĉies financa helpo por subvencii partoprenon de kiom eble plej multaj instruistoj kaj instukapablighon de junaj instruemuloj el Afriko bonvenos al la konto ilek-a de ILEI ĉe UEA, aŭ al Afrika Fondaĵo de UEA, ĉiam kun indiko 'Benino 2008'.

Se vi havas demandojn, proponojn aŭ komentojn vi ĉiam bonvenas skribi al: Aida Cizikaite aidute@mail.It (ILEI-estrarano pri kongresoj).

Renato Corsetti

Timis viro, ke lia edzino ne plu bone aŭdas, ke eble ŝi bezonas aŭdigilon. Ĉar li ne estis tute certa, pri ŝia reago, li decidis unue konsulti ilian kuraciston pri tio, kiel plej bone solvi la problemon.

Diris la kuracisto, ke plej bone estas unue testi la aŭdkapablon de la edzino tiamaniere:

"Unue vi staru 15 metrojn for de ŝi, kaj normalvoĉe provu eltrovi, ĉu ŝi bone aŭdas vin. Se ne, staru for de ŝi 10 metrojn, tiam 8 metrojn, kaj tiel plu, ĝis ŝi respondos vin."

Tiun saman vesperon staras la edzino en la kuirejo kuirante vespermanĝon. Diras la edzo al si mem: "Jen mi staras ĉirkaŭ 15 metrojn for de ŝi, ni vidu, kio okazos!" Do normalvoĉe li diras: "Karulino, kion vi kuiras?" Neniu respondo. Li do alproksimiĝas al sia edzino, proksimume 10 metrojn kaj ripetas: "Karulino, kion vi kuiras?" Ankoraŭ ŝi ne respondas.

Tiam li eniras la manĝejon proksimume 8 metrojn for de ŝi demandante: "Karulino, kion vi kuiras?" Refoje ŝi ne respondas.

Do li iras al la kuireja pordo, proksimume 3 metrojn for de ŝi: "Karulino, kion vi kuiras?" Refoje neniu respondo. Li do iras al malantaŭ ŝi. "Karulino, kion vi kuiras?"

"Hrodeberto, por la kvina fojo, KOKINIDON!"

"Vinĉento, ni heredos onklinon!"

"Ho, mi preferus heredi monon!"

Tamen★Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO.

JUNIO 2008, JARKOLEKTO 27

Redaktanto: Bob Felbi – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park, S.A. 5019

esperantobob@iprimus.com.au

Legeblas ankaŭ interrete: www.gazetejo.org

”Je kioma horo foriros la buso?”

“Kiam ajn.”

“Nu bone, ĉu ni diru post unu horo?”

Pagintaj membroj de Esperanto en SudaŬstralio:

Margaret Furness. Dan kaj Ashika Ehlers. Eileen Jones. Sandor Horvath kaj familio. Indrani. La familio Steele. Finnur Larusson. Pat Palmer. Nancy Roy. La familio Linnane. Audrey kaj Bob.

La edzino de skoto stiras la aŭtomobilon. Subite ŝi ekkriegas: “Mac, la bremsoj ne funkcias!”

Mac: Trankviliĝu kaj provu kolizii kun io malmultekosta!”

Gravaj Esperanto-eventoj:

Merkredon la 4an de junio ni renkontiĝos en la Komunumejo en Clarence Park je la 18a horo.

Ekskurso al Price sabaton la 14an de junio. Ni alvenu al la dana flago ĉe ”Ehlers Stugan”, 1 Parnell Terrace, Price, je la 10a horo.

Merkredon la 2an de julio ni renkontiĝos en Clarence Park je la 18a horo.

La Universala Kongreso de Esperanto okazos en la belega ĉefurbo de Esperantujo, Roterdamo, Nederlando de la 19a ĝis la 26a de julio, 2008.

Tuj poste la Internacia Vegetarana Unio festos sian centjariĝon en Dreseno, Germanujo.

Ankaŭ TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio) festos sian centjariĝon en 2008.

Sabaton la 19an de julio ni ekskursos al la malnova malliberejo en Adelajdo.

La Sepa Tutamerika Kongreso okazos de la 12a ĝis la 18a de julio 2008 en Montrealo, Kanado.

Merkredon la 6an de aŭgusto ni renkontiĝos en Clarence Park je la 18a horo.

Sabaton la 23an de aŭgusto ni ekskursos al la ŝipmuzeo en Adelajdhaveno.

De la 23a ĝis la 30a de aŭgusto 2008 okazos la 34a Internacia Semajno de Esperanto en Sète, Francujo.

Merkredon la 3an de septembro ni renkontiĝos en Clarence Park je la 18a horo.

Sabaton la 20an de septembro ni ekskursos al la zoologia ĝardeno Monarto.

Merkredon la 1an de oktobro ni renkontiĝos en Clarence Park je la 18a horo.

Sabaton la 18an de oktobro ekde la 17a horo ni kantados ĉe Indrani, 71 Hindmarsh Circuit, Mawson Lakes, S.A. 5095. Telefonnumero (08) 8285 3128.

Merkredon la 5an de novembro ni renkontiĝos en Clarence Park je la 18a horo.

Merkredon la 3an de decembro ni renkontiĝos en Clarence Park je la 18a horo.

De la 11a ĝis la 25a de januaro 2009 la Somerkursaro de Aŭstralia Esperanto-Asocio okazos en "International House" en la belega urbo Sidnejo.

La Universala Esperanto-Kongreso okazos en 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.

Laboris du viroj en fabriko. Diris unu el ili: "Ĉu vi bonvolos helpi min trovi mian orelon?"

La alia viro: "Ĉu estas ĉi tiu?"

La unua viro: "Ne, mia devas havi krajonon malantaŭ si!"

De la redaktantoj de "El Popola Ĉinio"

La 8an de aŭgusto okazos en Pekino la 29aj Olimpikoj. La stafetado de la olimpika torĉo komenciĝis en Pekino la 31an de marto. En la 130 tagoj antaŭ la inaŭguro de la Pekinaj Olimpikoj la torĉo trapasos kvin kontinentojn kaj atingos 134 ĉinajn kaj alilandajn urbojn, provincojn kaj regionojn. Nun la stafetado estas daŭrigata. Dum la stafetado en Britujo kaj Francujo, iuj fortoj tibetaj intencis malhelpi ĝin. Ili eĉ rabis for la torĉon de handikapita torĉoportantino.

Tio igis nin pensi pri la serioza perforta evento okazinta la 14an de marto en Lasao, Tibeto, en kiu 18

senkulpaj civitanoj estis mortigitaj, 382 vunditaj, el kiuj 58 tre serioze. Krome, unu policano perdis sian vivon. Ĉion ĉi tion instigis la kliko de Dalaj-Lamao cele al sendependigo de Tibeto.

La 26an de marto raportista grupo konsistanta el 19 veturiloj el Usono, Britujo, Rusujo, Japanujo, Singapuro, Koreujo, Kataro, Hongkongo, Tajvano kaj la ĉeftero ĉina iris al Tibeto por enketi pri la perforta evento.

La 28an kaj 29an de marto, diplomatoj el Brazilo, Japanujo, Kanado, Eŭropa Unio, Britujo, Germanujo, Francujo, Italujo, Hispanujo, Slovenujo, Singapuro, Tanzanio, Aŭstralio, Rusujo kaj Usono vizitis Lasao por enketadi pri la serioza evento perforta. Ili rigardis vendejojn kaj lernejojn damaĝitajn dum la evento, vunditajn soldatojn, policanojn, kuracistojn kaj senkulpajn popolanojn. Ili kunsidis kun diversrondaj personoj el Tibeto. La ĉina registaro invitis ankaŭ aliajn alilandanojn al Tibeto por ke tiuj havu propraokulan sperton.

Ni faris raporton ankaŭ pri la evento en nia reta EPĈ. Nun plaĉus al ni scii kiel raportis viaj lokaj ĵurnaloj pri la stafetado de la olimpika torĉo kaj la evento okazinta en Lasao. Kion vi opinias?

Kun koraj salutoj, la redaktistoj de "El Popola Ĉinio"

F-ino Deirdre volonte dungigis kiel privatsekretariino. "Mi povas stenografi 125 silabojn en nur unu minuto", ŝi diras.

Skuas sian kapon la oficestro: "M-m-mi n-n-ne po-o-vas dikti tiom rapi-i-de..."

Kiel jam konate, al Jens Galschiøt kaj liaj kolegoj estis la 26an de aprilo rifuzita eniro en Honkongon. Sed tio ne malhelpis lian intencon, ke la 8 metrojn alta kolono de malhonoro starigita kiel memorigilo pri la amasbuĉado sur la Placo de Ĉiela Paco en 1989, estu farbita, ĉar studentoj de la universitato de Honkongo kiel ankaŭ konataj membroj de la ĉina demokratimovado bazita en Honkongo, i.a. la prezidanto de la honkonga faka unuiĝo Cheuk Yan Lee, la poeto Szeto Wah, la advokato por homaj rajtoj Albert Ho, la aktivisto kaj artisto Longhair el kiuj pluraj membras en la parlamenta kunsidantaro, farbis ĝin.

Multaj televidstacioj kaj gazetaro el la tuta mondo raportis pri la farbado. Precipe la granda gazetara raportado pri la elĵetado de la danaj aktivistoj ekscitis la ĵurnalistojn. La aŭtoritatuloj de Honkongo pafis do sian propran piedon!

Diris Jens Galschiøt en sia skulptejo en Danujo: "Estas bonege vidi la bildojn el Honkongo. Mi scias nun, ke mia projekto TheColorOrange.net bone funkcias tute sen mia interveno. Tio pruvas, ke TheColorOrange nun estas neevitebla parto de la diskutoj pri OL-2008. Dum la olimpikaj Ludoj oni povas montri ke Ĉinujo ne plenumas siajn devojn rilate la homajn rajtojn."

"Ĉu vi permesas, ke mi edziĝu al via filino?"

"Pli bone estus, se vi unue demandus mian edzinon."

"Nu jes, se vi insistas, sed mi preferus havi vian filinon!"

La nova estraro de AEA

Ĉar Igor, pro personaj kialoj, sin eksigis el la estraro la 31an de marto, kaj Ĵeni Bishop kaj Gordon Coleman same faris, necesis trovi tri aliajn provizorajn estraranojn.

Laŭ la statuto la estraro rajtas tion fari. La nova estraro de AEA do ekde la 1a de aprilo konsistas el:

Prezidanto: Dianne Lukes.

1a vicprezidanto: John Abood.

2a vicprezidanto: Jonathan Moylan.

Sekretario: Miranda Lutz.

Vicsekretario: Kay Andersen.

Kasisto: Stephen Pitney.

Vickasisto: Penny Vos.

Du suĉinfanetoj kuŝas en siaj litetoj en la malsanuleja suĉinfanetejo.

"Mi estas knabo", diras unu el ili.

"Tion mi ne kredas", diras la alia.

"Nur atendu ĝis la flegistino foriros, tiam mi montros ion al vi".

Foriras la flegistino, kaj la suĉinfaneto forprenas la litkovrilon. "Nun rigardu, mi surhavas bluajn ŝtrumpetojn!"

La somerkursaro de AEA

Por aliĝi bonvolu musumi sur aesk@esperanto.org.au
Por legi pli musumu sur www.aesk.esperanto.org.au

“Bonan tagon, mi devas ripari akvoellasan tubon.”

“Vi eraras, ni ne havas akvoellasan tubon.”

”Ĉu mi ne estas ĉe s-ro Juliano?”

“Ne, li transloĝiĝis antaŭ tri jaroj.”

“Nu, unue oni telefonas por helpo, kaj tiam oni senaverte transloĝiĝas.. .”

Se vi deziras aĉeti la novan 7an eldonon de la elstara gramatiklibro, “Lingvaj Resondoj por ĝuste uzadi Esperanton” (nun proksimume 300 paĝojn) honestu mendi ĝin ĉe Marcelo Leereveld, 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur \$23,00!

”Ĉu ŝi ne volas edziniĝi al vi? Devas esti alia viro en ŝia vivo.”

“Jes, vi pravas.”

“Kiu li estas?”

“Ŝia patro!”

Legu ankaŭ la bonan libron, “Mummy, why can’t we all speak the same language?” Mendu ĝin kontraŭ nur \$ 6,95 plus afranko \$1,95, rekte de la tre klera verkinto kaj esperantistino, Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith, NSW 2077 aŭ perrete Nicole@cryogenic.net.

La najbarino al eta Klara: “Mi aŭdis ke doloris en via dento hieraŭ. Ĉu ĝi ankoraŭ doloras?”

”Mi ne scias, ĝi restas ĉe la dentkuracisto!”

Se vi deziras aĉeti la novan tre havindan libron “Rusoj loĝas en Rusujo” verkita de Anna Löwenstein, la edzino de Renato Corsetti, sendu \$15,00 al la Melburna Esperanto-Asocio.

Junulo post partoprenado en malseka festego, iris hejmen per taksio. Dum la veturado li komencis senvestigi sin, kaj la ŝoforo provis ĉesigi lian senvestigadon:

“Momenton”, li diris, “ni ankoraŭ ne estas ĉe via hotelo.”

“Kial vi ne diris tion antaŭe? Mi jam metis miajn ŝuojn ekster la pordon!”

La centjariĝo de Dana Esperantista Asocio

Nun ankaŭ la Dana Esperantista Asocio centjariĝis. Okazis sukcesplena festego kun pli ol 70 gastoj de la 18a ĝis la 20a de aprilo. La prezidanto de la asocio, Ileana Schröder, afable bonvenigis la gastojn el Danujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Italujo, Litovujo, Norvegujo, Portugalujo kaj Svedujo en la nova renkontiĝejo en “Kulturhuset” en Dortheasvej, Kopenhago.

La festo komenciĝis per jubilea tostado kaj oficialaj salutoj de en- kaj eksterlandaj samideanoj kaj amikemaj neesperantistoj. Nia honora gasto, prezidanto de la Itala Esperanto-Asocio, d-ro Renato Corsetti festparoladis. Li komparis la tiaman kaj nunan etosojn en la Esperanto-movado. Li emfazis la protektan rolon de Esperanto en mondo, en kiu ĉiuj lingvoj kaj kulturoj estas malgrandaj, sed tamen samtempe samvaloraj. Parolis Renato pri la maloptimismo de esperantistaj agantoj, kiuj spertas malkreskadon de la movado. Sed li opinias kreskon pro la reta interkomunikiĝo. La nuntempularo lernas kaj praktikas Esperanton pere de sia komputilo. Esperanto similas al la malbela anasido en la fabelo de H.C. Andersen – certe kaj sendube la homaro iam agnoskos la belegan cignon.

Tri distraĵoj okazis. Unue Wendy Meng brile pianludis komponaĵojn de Ĉajkovskij kaj Haydn. Post tiu trankvila kontribuo Dana Esperanto-Junulara Organizo treege amuze distris nin per la satira teatraĵo ‘Estis – Estas – Estos’. La lasta distraĵo estis la kantado de grupo el kvar (neesperantistaj) profesiaj kantistoj, kiuj esperante kantis kvar danajn kantojn. Finfine ĉiuj partoprenantoj kantis la himnon de Eŭropo kaj la Esperon.

La kultura posttagmezo finiĝis per la oficiala malfermo de la klereca ekspozicio pri la unua jarcento de la dana Esperanto-movado. Tiu estis la rezulto de grandega laboro de Mogens Rude Andersen kaj liaj kunlaborantoj Bent Jensenius kaj Torben Svendsen.

Betty Chatterjee

Mac la skoto sendis leteron al iu firmao demandante ĝin pri la prezo de neceseja papero.

Kelkajn tagojn poste li ricevis de la firmao grandegan katalogon. "Vidu paĝon 947" oni skribis, "tie vi trovos la prezon!"

Mac refoje skribis al ĝi dankante pro la katalogo, kaj aldonis, "ne plu urgĉas sendi la necesejpaperon!"

Naskiĝis viro antaŭ multaj jaroj, fakte en 1904. Tio sama okazis ankaŭ al multaj aliaj viroj, sed tiu ĉi viro estas speciala, ĉar li estis mia patro. Kompreneble li ne naskiĝis kiel viro, sed kiel knabo. Eĉ kiel knabeto, tre malgranda kaj malpeza li estis, sed tio ne daŭris longe.

Li naskiĝis en Kopenhago, same kiel mi, sed longan tempon antaŭ mi. Preskaŭ tuj post sia naskiĝo li transloĝiĝis al Jutlando, kie li plenkreskiĝis kaj lernis la plej necesan por daŭrigi sian vivon pli malpli sendepende. Tio daŭris nur 14 jarojn. Tiam li refoje transloĝiĝis, ĉi tiun fojon al Næstved en Sudselando. Tie li fariĝis bakistlernanto. Li estis bona, eĉ bonega bakisto kvankam li preskaŭ neniam laboris kiel bakisto, ĉar evidente ne estis manko de bakistoj en Danujo tiutempe. Li lernis ankaŭ veturigi aŭtomobilon, sed neniam posedis ion tian, ĉar li neniam havis sufiĉe da mono. Sed li bone biciklis. Li biciklis al sia laborejo. Ĝi situis tiom fore de lia hejmo, ke li estis jam preta por la enlitiĝo, kiam li atingis sian laborejon.

Post kiam li finis sian bakistlernadon li kune kun alia bakistlerninto decidis piediri al Germanujo. Multaj metilernintoj skandinavaj faris tion tiame. Ili havigis al si malgrandan tirveturilon sur kiun ili metis siajn malmultajn posedaĵojn kaj tiris ilin tra Danujo en Germanujon.

En Germanujo ili sukcesis trovi laboron en sekalpanfabriko en Hamburgo. Dum ili estis dungitaj tie la hamburgaj tagĵurnaloj anoncis, ke plej verŝajne dimanĉon la struto en la zoologia ĝardeno naskos strutidon. Nu, ni ĉiuj bone scias, ĉu ne? ke strutoj ne naskas idojn. La vero estas, ke oni atendis ke strutido elkoviĝos dimanĉon el strutovo en la zoologia ĝardeno de Hamburgo.

Ili ambaŭ iris tien por vidi kiel strutido eliras el strutovo. Multaj homoj staris ekster la zoologia ĝardeno atendante la malfermiĝon de la pordegoj. Fine ili estis

enlasataj kaj ĉiuj iris rekte al la strutejo. Tie ili staris kelkajn horojn ĝis fine iu anoncis, ke la strutovoŝelo preskaŭ senbrue rompiĝas, kaj fine oni ekvidis la strutideton. Longa kaj brua aplaŭdado sekvis, kaj iuj restis en la zoologia ĝardeno por vidi, kio alia okazos, dum iuj iris hejmen.

Kelkajn semajnojn poste niaj du bakistoj trovis sin en Sudgermanujo. Tie ili vidis sur altaĵo etan kapelon. Multaj homoj iris supren al la kapelo. Ili iris sur siaj genuoj, ĉar ili estis bonaj katolikoj. Ankaŭ mia patro kaj lia kamarado decidis iri supren al la kapelo. Doloris en iliaj genuoj, sed ili fine atingis la supron. Tiam ili iris malsupren, sed sur siaj piedoj. Ili ne estis tiom piaj kiom la katolikoj.

En ĝardeno ĉe Rejno pendis vestlavitaĵo. Ili decidis ŝanĝi siajn vestojn, ĉar sendube tiuj ne plu estis puraj post longa promenado tra Danujo, Hamburgo ktp. Ili do prenis la lavitaĵon kaj surŝnurigis siajn malpurajn vestojn.

Post longa tempo ili revenis al Danujo. Mia patro trovis laboron kiel helpkonstruisto. Venis iom post iom liaj tri infanoj. Ili havis belajn "kinder", kiel li ŝerce diris. Evidente li lernis kelkajn germanajn vortojn en Germanujo. Tion oni ja devas fari, ĉu ne? Li ĉiam pinĉis niajn vangojn dirante, ke ni havas belajn "kinder". Eble vi scias, ke "Kinder" signifas infanojn en la germana, sed en la dana tiu vorto signifas vangojn. Do, ni havis belajn vangojn.

Li evidente ne bone povis memori multajn germanajn vortojn, sed ofte, kiam alparolis lin germano, mia patro simple respondis: "Ja, Bahnhof". Tio signifas "jes, stacidomo". Mi supozas, ke se oni ne longan tempon uzadas fremdan lingvon, oni simple ĝin forgesas!

Eta kvinjara Sara rakontas al sia amikino, ke ŝi nun havas novan patron.

"Kio li nomatas?"

"Ivor Filipson."

"Li estas bona, lin ni havis pasintan jaron!"

Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, JULIO 2008/ JARKOLEKTO 28
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019

esperantobob@iprimus.com.au

Disponblas ankaŭ surrete ĉe www.gazetejo.org

Sidas maljuna paroĥestro meditante pri la nova animflegantino:

“Jes, verŝajne pastrinoj estas sufiĉe bonaj. Sed laŭ mia opinio, ŝi iomete troigas ŝanĝante la turvirkokon per turkokino”.

Vizito de la nova prezidantino

La 18an de majo vizitis Adelajdon la nova prezidantino de AEA – Dianne Lukes. Matene atendis ŝin en la flughaveno Katja kaj Trevor. Origine ni planis kunveni en la domo de Sandor, sed ĉar tie malfunkciis la hejtado, akceptis nin ĉiujn Pat Palmer en

sia

apartamento
Goodwood.

ĉeestis ankaŭ
Indrani,

Nancy kaj

Ni demandis
pri ŝiaj celoj

prioritatoj, ŝi petis nian opinion pri la laboro de la nova estraro. La reciproka informado daŭris ankaŭ dum la agrabla restoracia lunĉo, post kiu pluraj el ni foriris. Al la vespera buso veturigis Dianne Lukes Pat.



Palmer en

en

Krom ŝi

Eileen,

Sandor,

Brendan.

Dianne

kaj

Katja Steele

“Jen ĉi tie en la ĵurnalo estas skribite, ke virbovo kornobatis Esperanto-instruiston”.

”Tre strange, kiel ĝi povus scii, ke li estas Esperanto-instruisto?”

Edukado

La nova 7a eldono de la elstara gramatiklibro, “Lingvaj Resondoj por ĝuste uzadi Esperanton” (nun konsistanta el 300 paĝoj) aĉeteblas de Marcelo Leereveld, 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur \$ 23,00!

Iun nokton Haraldo venis hejmen ebriega. Li ŝanceliĝis en la kuirejon, prenis ŝnuron, ligis ĝin al kuirpotoj kaj kuirpotkovriloj. Poste li ŝteliris supren laŭ la ŝtuparo tenante la ŝnuron.

“En tiu ĉi bruego ŝi ne povas aŭdi, ke mi venas tiom malfrue!”

Mummy, why can't we all speak the same language”

La bona libro “Mummy, why can't we all speak the same language?” aĉeteblas de Nicole Else kontraŭ nur \$6,95 plus afranko \$1,95, 1/359 Pacific Highway, Asquith NSW 2077 aŭ perrete nicole@cryogenic.net. Por pliaj informoj vidu <http://members.iinet.net.au/~nicolee/bookad.html>

Maljuna patrino ricevis leteron de sia filo, kiu estas maristo. Nun ŝi sidas voĉlegante la leteron al si kaj la kato, eble ankaŭ kelkaj musoj aŭskultas:

”La vetero estas belega, kaj tuj antaŭ mi kuŝas Kreto kun ĉiuj siaj belegaĵoj...”

”Jes, suspiras la maljuna patrino, ni esperu, ke tiu Kreto estas bona knabino!”

Gravaj Esperanto-eventoj:

De la 30a de junio ĝis la 18a de julio okazos la Nordamerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) en la Universitato de Kalifornio en Sandiego, Usono.

Merkredon la 2an de julio ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

La Sepa Tutamerika Kongreso okazos de la 12a ĝis la 18a de julio 2008 en Montrealo, Kanado.

Dimanĉon la 20an de julio ni ekskursos al la Malnova Malliberejo en Adelajdo.

De la 19a ĝis la 26a de julio 2008 okazos la Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo, Nederlando.

Tuj poste festos Internacia Vegetarana Unio sian centjariĝon en Dreseno, Germanujo.

Ankaŭ TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio) festos sian centjariĝon en 2008.

Merkredon la 6an de aŭgusto ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

Sabaton la 23an de aŭgusto ni ekskursos al la Ŝipmuzeo en Adelajdhaveno.

De la 23a ĝis la 30a de aŭgusto okazos la 34a Internacia Semajno de Esperanto en Sète, Francujo.

Merkredon la 3an de septembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

Sabaton la 20an de septembro ni ekskursos al la Zoologia Ĝardeno Monarto.

Merkredon la 1an de oktobro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

Sabaton la 18an de oktobro, ekde la 17a horo, ni komune kantados ĉe Indrani, 71 Hindmarsh Circuit, Mawson Lakes, S.A. 5095, telefonnumero 8285 3128.

Merkredon la 5an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

Merkredon la 3an de decembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

De la 11a ĝis la 25a de januaro 2009 la Somerkursaro de Aŭstralia Esperanto-Asocio okazos en "International House" en la belega urbego Sidnejo.

La Universala Kongreso de UEA okazos en 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.

"Kiom, ĉu \$100 por unu kravato? Kontraŭ tiom da mono oni povas ricevi paron da ŝuoj!"

"Jes, vere, sed ĉu vi ne aspektus iom tro ridinda irante tra la urbego kun paro da ŝuoj ĉirkaŭ la kolo?"

La malnova malliberejo

Ni estis devigitaj ŝanĝi la daton de nia vizito al la malliberejo, ĉar sabatojn oni devas esti en grupo de minimume 15 personoj, kaj ni certe ne povos esti tiom multaj.

Ni renkontiĝos ekster la granda malliberejenirejo je la 14a horo. Tiu el ni, kiu havas la plej multajn spertojn pri la vivo de malliberulo, antaŭ nur kelkaj jaroj, gvidu la trairadon de la eĉ tre interesa loko.

Plenkreskuloj pagos po \$8,50. Infanoj: po \$5,50. Pensiuloj: po 7,00.

”Ĉu vi scias, ke neesperantisto bezonas unu tutan horon por purigi kelfenestron?”

”Ne, tion mi ne sciis, kial?”

“Ĉar daŭras al li 50 minutojn por enfosi la ŝtupareton kaj 10 minutojn por purigi la fenestron!”

La centjariĝo de Dana Esperantista Asocio

Daŭrigo de la junia numero

Post la festmanĝo JoMo, kiu senpene saltis da lingvoj kaj melodioj, sprite Esperanto. Ankaŭ Kim kantis. Plurfoje ili dancigis la gastojn.



sekvis koncerto de inter granda nombro malsamdevenaj kunligante ilin per Henriksen ludis kaj

Sabato estis la kleriga tago. La estraro de DEA sukcesis allogi imponan prelegantaron al Kopenhago. La unua preleganto estis Detlev Blanke, kiu parolis pri lingvopolitiko por Esperanto. Interalie avertante ke Esperanto ne estas sufiĉe stabila aŭ evoluinta kiel faka lingvo, li emfazis la gravecon, ke la movado ne tro frue malpacienca postuli la akcepton de Esperanto kiel oficialan lingvon en Eŭropo.

Kiel dua preleganto Anna Löwenstein parolis pri Esperanto kiel familia lingvo. Pro siaj propraj spertoj kiel patrino kaj ankaŭ pro sia profesia scio ŝi tre interese informis la plejparte aĝan ĉeestantaron.

Posttagmeze okazis kvar prelegoj. Unue Mogens Rude Andersen vigle kaj detale rakontis pri la dramoplenaj tagoj en la jaro 1954. Tiam kunvenis la 4a Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo, kaj post granda malantaŭkulisa konflikto ties Ĝenerala Konferenco adoptis rezolucion favoran al Esperanto.

Wera Blanke tiam kontribuis per klara kaj utila prelego pri 'Publike Paroli', disdonigante praktikajn konsilojn en formo de libreto.

Post la kafopaŭzo Renato Corsetti prelegis pri 'La malbona lingvo aŭ la eŭropa dialekto de Esperanto'. Lia tezo estis ke Esperanto malpliboniĝas pro la adoptado de ĉiam pli da vortoj, sed en la diskuto post la prelego Detlev Blanke argumentis por tute kontraŭa vidpunkto.

Konklude Anna Löwenstein parolis pri la vivo en Italujo antaŭ du mil jaroj. Kvankam ĝi estis malpli streĉa ol la antaŭaj prelegoj dum la tago, ĝi estis sufiĉe informoplena.

Dum la vespero oni amuziĝis en Tivoli.

Dimanĉe Eŭgeniusz Rybarcyk ĉiĉeronis la eksterlandajn gastojn en la urbo dum okazis la ĝeneralaj kunvenoj de DEA kaj DEJO.

Betty Chatterjee

"Huberto, kial vi ĉiam staras en la antaŭĝardeno, kiam via edzino kantas?"

"Por ke neniu kredu, ke mi batas ŝin!"

Nordamerika Somerkursaro de Esperanto

De la 30a de junio ĝis la 18a de julio okazos la Nordamerika Somerkursaro de Esperanto (NASK) en la Universitato de Kalifornio en Sandiego, Usono.

La kurskotizo estas tute senpaga por plentempaj studentoj kaj instruistoj, kaj stipendioj haveblas por aliaj. La usona dolaro estas treege malforta ĉijare, do jen tre malmultekosta ŝanco por viziti Usonon kaj pasigi tri semajnojn en belega, apudmarborda universitato inter esperantistoj el ĉirkaŭ la mondo.

Sed vi devas baldaŭ aliĝi, ĉar la tempo eĉ tre rapide pasas!

Ĉijare instruos la usona Lee Miller, la germana Birke Dockhorn, kaj la sveda Bertilo Wennergren, la verkinto de la fama Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko! La universitato ofertos kursojn por komencantoj ĝis spertuloj, kaj ĉiutage okazos amuzaj vesperaj programoj: ekskursoj, prelegoj, ludoj ktp.

Por vidi la flugfoliojn musumu sur: <http://esperanto.lodestone.org/ktp/NASK1-eta-eo.pdf> kaj <http://esperanto.lodestone.org/ktp/NASK2-e0.pdf>

Por pliaj informoj kontaktu s-inon Ellen Eddy, ĉe eddyellen@aol.com

"Kiel vi vivtenas vin nuntempe?"

"Mi skribadas"

"Do, kion vi skribas?"

"Mi skribadas al miaj gepatroj petante ilin sendi al mi pli da mono!"

Novaj libroj en nia biblioteko

La 4an de junio nia estimata kasisto Indrani donacis al la Biblioteko de Esperanto en Sudaŭstralio la sekvajn bonegajn verkojn: '60 Bài Thơ Poemoj' de Đặng Đình Đàm. 'Esperanto – Türkçe Sözlük' (Esperanto – Turka Vortaro). 'La libro de la spiritoj' de Allan Cardec, tr. de prof. L.C. Porto Carreiro Neto L.K. 'Nova Mondo' de Chung Hwan-gun, tr. de Ma Young-tae. 'Vetero kaj klimato de la mondo' de Denis Riley kaj Lewis Spolton. Kaj Margaret Furness donacis 'Hamleto, Princo de Danujo' de Ŝekspiro, tr. de L.N.M. Newell.

"Kion vi farus, se vi estus en miaj ŝuoj?"

"Mi purigus ilin!"

Ĉu Universala Kongreso en Moskvo en 2010?

Osmo Buller
direktoro de
Esperanto-Asocio,
sondi la grundon
Universala
jam en Havano en
ke la ŝancoj estas pli bonaj en Moskvo.



la ĝenerala
Universala
vizitis Moskvon por
por eventuala
Kongreso. Li estis
Kubo, sed opinias,

Sur la Ruĝa Placo en Moskvo li renkontis Lenin kaj Esperante konversaciis kun li. Vidu la bildon! Fakte tiu Lenin estas Anatolij Koklenkov. Anatolij rakontis pri sia laboro, kantis la Internacion en Esperanto kaj fotatis apud la ĝenerala direktoro de UEA.

Li prelegis al la studentoj de la universitato Justo pri Universala Esperanto-Asocio. La studentoj faris multajn demandojn en Esperanto kaj ĝenerale la etoso estis agrabla. La studentoj tre serioze interesiĝas pri U.K. en ilia urbo.

Osmo vizitis du kongresejojn, Olimpijskij kaj Kosmos. Ŝajnas ke li elektis Kosmos, ĉar Olimpijskij havas 35.000 sidlokojn, kaj li dubas, ĉu UEA povas plenigi ilin ĉiujn.

Do, gesamideanoj, ni esperu ke ni kune kongresos en Moskvo en 2010, ĉu ne?

El <http://www.liberafolio.org/2008/bullermoskvo/>

”Kie vi lernis dancadi Ĉa-ĉa-ĉa-on tiom bonege?”

”Ho, mi havis biciklon kun tre malfirma selo!”


Pri publikaj bibliotekoj

Preskaŭ! Tiu estas la vorto plej bone priskribanta la agojn de federacia helpo al aŭstraliaj bibliotekoj publikaj, precipe en 1975. Kaj iun tagon, sed ne hodiaŭ, federacia helpo refoje haveblas. Ĝi ne kostos multon, sed tiam Aŭstralio havos la plej bonan publikan bibliotekan sistemon en la mondo.

Arturo Mortimer

La papo latinigis sian retejon

La 9an de majo Vatikano publikigis latinan version de sia retejo. Ĝis nun la papo estis havebla franca, germana, portugala lingvoj. La estas tre limigita alilingvaj versioj, kaj Biblio kaj Kateĥismo ĉefe enhavas tekstojn el paroladoj de la papo. Mankas ankoraŭ la latinlingvaj tekstoj de la tradiciaj kristnaskaj kaj paskaj salutparoladoj, sed ili kredeble aperos, ĉar ili jam estas menciataj en la naviga paĝo.



ampleksa retejo de la nur en la itala, angla, hispana kaj nova latina versio kompare kun la aldone al latina

El Libera Folio

”En varietea teatro en Londono mi vidis viron ludantan pianon sen manoj.”

”Tio estas nenio, apud mi loĝas virino kantanta sen voĉo!”

Hamleta KEF ne okazos ĉijare

”Ĉu esti aŭ ne esti?” Tio estis la titolo de Kultura Esperanto-Festivalo, planita por la 12a de julio. Post longa cerbumado la organizantoj mem respondis al la demando, kaj nuligis la festivalon, kiu devis okazi en Helsinoro, la hejmurbo de la Ŝekspira Hamleto.

Laŭ la originala plano la Kultura Esperanto-Festivalo devis okazi en julio 2008 por omaĝi la centjariĝon de Dana Esperanto-Asocio kaj Universala Esperanto-Asocio. Tamen, okazis malmulta antaŭa informado pri la festivalo, kaj ekzemple en la novaĵgrupo SCE la informilo de KEF aperis nur fine de marto, kiam multaj jam finfaris siajn planojn por la feria sezono.

Poste plendis samloke iu diskutanto, ke KEF ankaŭ ĉijare riskas ricevi tre malmultajn vizitantojn, same kiel en Helsinko julie 2005, kiam ĉeestis nur kelkdeko da kulturemuloj. Ankaŭ tiam la ĉefa problemo estis tro malfrua kaj nesufiĉa informado pri la festivalo.

Ŝajne la organizantoj de la ĉijara KEF ricevis malmultajn aliĝojn, ĉar fine de majo ili decidis nuligi la tutan aranĝon, kaj anstataŭe organizi Kultureman Esperanto-Festivalon unu jaron poste, en la sama loko, la kastelo de Hamleto. Laŭ la organizantoj mem la ĉefa kialo de la nuligo estas la manko de subvencioj.

Ĉar tamen kelkaj artistoj venos al Danujo, oni aranĝos miniaturan KEF-eton en Kopenhago la 12an de julio.

El Libera Folio

Tio ĉi vere okazis, aŭ ĉu vi dubas?

Sekrete amindumadas virkrabo kaj omarino. Baldaŭ la omarino tediĝas pro la konstanta sekreteco kaj petas sian patron, kiu malpermesas ilian amindumadon, pri kompreno. "Neniam", li kriegas, "gekraboj antaŭen iras flankdirekte laŭ siaj oreloj, dum ni rekte antaŭen iras, laŭ niaj nazoj, kraboj kaj omaroj neniam povos geedziĝi!"

"Sed, kara Paĉjo", diras plorante la omarineto, "renkontu lin nur unu fojon, mi estas certa, ke li plaĉos al vi!"

Fine la patro konsentas, kaj feliĉa ŝi forkuras al sia amata virkrabo. La virkrabo ekscitiĝas kaj decidas surprizi la familion de lia amatino. Li ekzercas kaj ekzercas ĝis fine ankaŭ li povas rekte iri laŭ la nazo.

La tagon de la renkontiĝo kun la familio li iras kiom eble plej rekte laŭ la nazo la tutan vojon al la domo de la omarinopatro.

Starante sur la sojlo de sia domo la omarinopatro kriegas al sia filino: "Mi sciis tion, jen venas tiu stulta virkrabo, kaj li estas tiom ebriega, ke li eĉ ne povas iri flankdirekte laŭ sia orelo!"

Dankojn al Hazel Green, kiu helpis pri la tradukado

Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, AŬGUSTO 2008, JARKOLEKTO 26

Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019

esperantobob@iprimus.com.au

Disponeblas ankaŭ surrete ĉe www.gazetejo.org

Forpasis Lee Chong-Yeong

La eksprezidanto de UEA, Lee Chong-Yeong, forpasis en 2008 76-jara. Li naskiĝis la 13an de februaro 1932 en Samĉeonpo, Koreujo. Li studis en la universitatoj Yeungnam en Koreujo, Havajo kaj Harvard, Usono kaj Japanujo pri komerca doktoriĝis en kiel ĉefo de la merkatumo ekonomiko. Li laboris de la organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj pri Nutraĵoj kaj Agrikulturo kaj estis emerita profesoro de la Ŝtata Universitato Kyungpook, Koreujo. Kiel prezidanto de UEA Lee Chong-Yeong iniciatis la Nitobe-simpozion, kiu okazis unuafoje en la Universala Kongreso de Esperanto en Prago, Ĉeĥujo, en 1996, kaj estis inter la iniciatintoj de la Manifesto de Prago.



Lee Chong-Yeong lernis Esperanton en 1949, kiam li estis nur 17-jara, kaj estis prezidanto de Korea Esperanto-Asocio de 1994 ĝis 1995, kaj de 1998 ĝis 2001. Li estis prezidanto de UEA de 1995 ĝis 1998, kaj vicprezidanto de UEA de 2001 ĝis 2004.

Li verkis kelkajn librojn pri Esperanto en la korea, kaj ankaŭ la dokumenton "Esperanto en Internaciaj Organizaĵoj", eldonitan de UEA en 2003. Li estis ankaŭ unu el la ĉefaj agantoj por la eldono de la ĉina-japana-korea komuna verko "Historio por Malfermi Estontecon". Li estis honora membro de UEA.

En intervjuo de *Libera Folio* en 2005 li interalie diris: - "kvankam la angla efektive estas internacia lingvo, neniuj regnoj oficiale povas aŭ pretas agnoski ĝin en interŝtataj organizaĵoj, precipe ne en EU. La nura solvo estas en neŭtrala internacia komuna lingvo. Jen estas la okazo por Esperanto kaj la defio al ĝi. La celo de la movado devas esti atentigi internaciajn organizaĵojn pri tio ke ili havas lingvan problemon, kiu ĝenas demokratian internacian komunikadon, kaj instigi, ke ili diskutu la lingvajn problemojn".

Alia eksprezidanto de UEA, Renato Corsetti, funebre komentis la forpason: "Ni klinu niajn flagojn antaŭ Lee Chong-Yeong! Temis

pri unu el la plej sinceraj esperantistoj, kiujn mi iam renkontis. Li laboris por Esperanto kaj neniam petis ion de aliaj esperantistoj aŭ organizaĵoj pro tio. Li estis profunde konvinkita pri Esperanto, tiom profunde, ke kelkaj “modernuloj” inter la esperantistoj ne komprenis, kial li vere pensis, ke indas proponi Esperanton al la neesperantistoj, al la internaciaj organizaĵoj, al Unuiĝintaj Nacioj. Mi dankas lin pro ĉiuj instruoj, kiujn li donis al mi kaj ĝenerale al UEA dum liaj periodoj kiel prezidanto kaj vicprezidanto”.

Alia prezidanto de UEA, Probal Daŝgupta, diris, ke la forpaso de Lee Chong-Yeong estas grava persona bato al li. –“Mi laste renkontis lin ĝuste antaŭ ol forveturi el Jokohamo. Li donacis al mi ekzempleron de ”Historio por malfermi estontecon”, tiu inspira libro, kies eldonon la nuna prezidanto spronis per granda persona iniciato, kaj kiun mi atente legis post mia reveno. La mandaton de d-ro Lee Chong-Yeong kiel prezidanto de UEA ni ĉiuj memoras kiel tempon de rejunigo kaj redirektado de la Asocio.

El Libera Folio

Aŭstralia Esperanto-Asocio limigita per garantio

Por tiuj, kiuj ĝis nun ne estas informitaj, Tamen Plu informas ke la 4an de junio 2008 Aŭstralia Esperanto-Asocio korporaciigita registriĝis en Hawthorn, Viktorio 3122 kun la nova nomo: Aŭstralia Esperanto-Asocio limigita per garantio.

Gravaj Esperanto-eventoj:

Merkredon la 6an de aŭgusto ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

Sabaton la 23an de aŭgusto je la 13a horo, ni ekskursos al la Ŝipmuzeo, 126 Lipton Street, en Adelajdhaveno. Prezoj: plenkreskuloj \$ 8,50, pensiuloj \$ 6,50.

De la 23a ĝis la 30a de aŭgusto okazos la 3a Internacia Semajno de Esperanto en Sète, Francujo.

Merkredon la 3an de septembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

Sabaton la 20an de septembro ni ekskursos al la Zoologia Ĝardeno Monarto.

Merkredon la 1an de oktobro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

Sabaton la 18an de oktobro, ekde la 17a horo, ni komune kantados ĉe Indrani, 71 Hindmarsh Circuit, Mawson Lakes, S.A. 5095, telefonnumero 8285 3128.

Merkredon la 5an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

Merkredon la 3an de decembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

De la 11a ĝis la 25a de januaro 2009 la Somerkursaro de Aŭstralia Esperanto-Asocio okazos en "International House" en la belega urbego Sidnejo.

La Universala Kongreso de UEA okazos en 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.

Trevor kaj liaj lingvoj

Trevoron intervjuis Katja

K: Kiuj estas viaj plej fruaj spertoj pri lingvoj?

T: Jam kiel infaneto mi estis fascinata de lingvoj. Mi ŝatis la sonojn de fremdaj lingvoj, kio estis tute nenatura konduto en mia rezolute unukultura kaj unulingva vilaĝo. Kiam mi estis eble kvinjara, venis al nia vilaĝo multaj "novaŭstralianoj", t.e. enmigrintoj el Eŭropo. Ili parolis diversajn lingvojn. Mi povis dum longa tempo simple aŭskulti tiujn homojn, kiuj parolis inter si, kaj mi absolute nenion komprenis dum estis evidente, ke ili komprenas unu la alian! Normala Ravenshoe-ano dirus al ili "Talk English!" Sed mi tre ŝatis aŭdi kaj imiti tiujn fremdajn sonojn. La enmigrintoj laŭdis min, kio donis al mi sufiĉe fortan senton de memfido. Sed en mia familio oni rigardis min strangulo, ĉar mi okupiĝas pri tiuj "stultaĵoj".

K: Vi ŝatis tion!

T: Ho jes! Mi tute ne sentis vundiĝon aŭ insultiĝon, ke oni rigardas min tia. Mi eĉ fieris pri tio, ke mi estas tiu strangulo, kiu interesiĝas pri fremdaj lingvoj.

Kiam mi estis eble 7 – 8-jara, mia patro aĉetis por mi kaj miaj fratinoj serion de enciklopedioj por infanoj "Arthur Mee's Childrens' Encyclopedia". Estis eble 15 – 20 dikaj volumoj kaj ie en la mezo de la tiuj estis lecionoj de la *franca* lingvo. Estis kvazaŭ komiksaj bildoj kaj sube estis en la unua linio la normala franca teksto, sub ĝi traduko laŭvorta en la

anglan, kiu ofte ne estis tre sencohava. En la tria linio estis la traduko en naturan anglan. Ankaŭ tio fascinis min: mi vidis, ke la francoj kapablas esprimi ideojn tute alimaniere ol ni, sed tamen la teksto estas komprenebla. Kaj mi fakte lernis iom de la franca. Mia prononco certe estis absolute malbona, sed mi lernis almenaŭ legi kelkajn aferojn. Dum mia infanaĝo en la baza lernejo oni tute ne lernis fremdan lingvon, sed en la duagrada mi lernis la latinan kaj la francan. La fakto, ke mi jam konis iom de la franca donis al mi la titolon de ĉampiono de la klaso aŭ io simila, kaj mia fiero puŝis min ĉiam esti antaŭ la samklasanoj.

K: Kian sorton havis vi ĉe la latina?

T: Ankaŭ ĝin studis ĝin unue dum 4 lernejo. Poste, en la jaroj), ĝi estis uzata ĉe teologiaj temoj) kaj simpligita esprimaro. Iam venis al la



kardinalo Agaĝanjan, por kiu la latina estis la ĉiutaga lingvo. Dum la meso li donis al ni predikon tute en la latina kaj mi komprenis ĉiun vorton. Estis vera plezuro.

mi lernis sufiĉe bone. Mi jaroj en la duagrada pastriga seminario (pliaj 3 dum la lecionoj (filozofio, ekzamenoj, sed kun Tute ne estis flua parolo. seminario kartvela kiu laboris en Romo, kaj

K: Kiam aperis la *germana*?

T: Ankaŭ dum mia seminaria tempo. Ial mi ekscivolis pri ĝi. Mi trovis tre malnovan, tre sekan gramatikan libron pri ĝi, kiu tamen malfermis al mi la pordon de tiu lingvo. La germana fariĝis mia pasio. Mi jam sufiĉe bone sciis legi ĝin kiam mi poste iris al la universitato kaj studis ĝin. La kurso daŭris 3 jarojn, sed mi ambiciis multe pli ol nur sukcesi en la ekzameno. Mi volis paroli la germanan perfekte. Mia familio ankoraŭ ne komprenis min. Mi bone memoras: iun tagon mi estis hejme kaj kviete legis germanan romanon. Mia panjo, vidante kion mi havas en la mano, rigardis min serioze kaj diris: "Trevor, kial vi legas tiun rubaĵon?" Mi povis nur rideti kaj pensi: "Panjo, se vi nur sciis, kia plezuro estas legi en alia lingvo!"

Mi instruis la germanan dum 3 jaroj en lernejoj en Aŭstralio kaj tiam mi iris por kelkaj jaroj al Germanujo. La germana iĝis mia ĉiutaga lingvo. Post mia reveno en 1972 mi instruis la germanan diverslerneje. Mia unua edzino estis germandevena kaj mi ĉiam uzis la germanan, kiam ni estis kun ŝiaj familianoj. Aktuale mi instruas la germanan en Steiner-lernejo en Mount Barker.

K: Kie vi la unuan fojon renkontis *Esperanton*?

T: En 1970 mi estis en Anglujo. Tie mi provis instrui la germanan en 2 lernejoj: 2 tagojn semajne en unu, 3 en alia. En unu el

la du lernejoj estis ĉarma virino, kiu instruis ekonomikon – Pat Search. Ŝi estis ankaŭ esperantistino, kaj ŝi fondis "Esperanto-Club". Ĉar ŝi estis populara, ŝi ĉiam havis kelkajn homojn, kiuj iris aŭskulti ŝin. La klubanoj renkontiĝis unufoje semajne, merkrede, de la 1a ĝis la 1.15a. Pat varbis min kaj ankaŭ junan franco, gasteinstruiston de la franca, por veni al la leciono. En la klubo estis eble 10 lernejoj. Ŝi komencis tiel: "En Esperanto ĉiuj substantivoj finiĝas per "oŭ". Kaj ŝi donis eble 20 substantivojn, ekz. "plankoŭ, tabuloŭ, krejtoŭ" ... Kiel vi scias, Esperanto ofte redonas francan vorton iom maskitan, kaj la franco turnis sin al mi kaj diris: "Aĥ, kia aĉa imitaĵo de la nobla franca lingvo!" Tiam Pat diris: "Ĉiuj adjektivoj finiĝas per "a". Mi skribas "ej", sed mi diras "a". Ekzemple: "blanka kurtenoŭ" ktp. Ĉar mi jam havis sperton pri diversaj lingvoj, mi tuj kaptis la ideon. Ĉiuj substantivoj per "o", ĉiuj adjektivoj per "a", tio estas genia ideo! Tiam ŝi diris" "Se vi voŭlas diri la malon de ioŭ, vi metas "mal" antaŭ la vorton, ekz. boŭna estas "good" kaj malboŭna estas "bad". La franco grimacis kaj iomete post iomete forŝteliĝis el la ĉambro.

Mi devas diri, ke sinjorino Search, tre bona virino, tamen ne bele parolis Esperanton. Sed kiel oni diras en la angla, mi vidis la arbotrunkon malgraŭ la multaj folioj. Kiam mi demandis Pat, ĉu ŝi havas lernolibron pri tiu lingvo, ŝi ege ĝojis. La sekvan tagon ŝi donis al mi tre malnovstilan, tre sekan lernolibron, en kies fino estis kelkaj tekstoj, leteretoj. Mi povis legi ĝin tuj kaj teorie komprenis la tutan gramatikon post duonhoro, ja kompare kun la latina, franca, aŭ la germana ĝi estas ege facila.

Tuj mi volis komenci traduki tekstojn en Esperanton, kaj traduki psalmojn ideo. Mi elektis la komenciĝantan per mia paŝtisto, al mi Ĉar mi ĵus legis la aŭstralia verkisto "Bring Larks and tradukis ankaŭ unu el verko.



ŝajnis al mi brila belan 23an, "La Sinjoro estas mankos nenio". brilan romanon de Thomas Keneally, Heroes", mi la ĉapitroj el tiu

K: Ĉu sinjorino Search estis kontenta pri via laboro?

T: Mi tuj sciis, ke ŝi ne kapablas korekti aŭ recenzi miajn tradukojn, sed mi demandis ŝin, ĉu ŝi konas iun, kiu povus tion fari. "Oh, jes!" – kaj ŝi donis al mi la poŝtan adreson de iu s-ro Reg [Reĝ]. Anstataŭ demandi lin, ĉu li pretas legi kaj korekti miajn tradukojn, mi simple sendis al li dikan koverton kun miaj tradukoj. Pasis semajnoj ĝis la koverto kun miaj tekstoj revenis. La psalmo havis ĉie

ruĝajn strekojn kaj korektojn, la teksto de la aŭstralia aŭtoro estis sen ia ajn komento. "Kiel povas esti?" mi demandis min. Mi baldaŭ komprenis: Reg prenis la oficialan tradukon de la psalmoj, kaj kie mia iel diferencis de tiu versio, li trastrekis kaj korektis ĝin. Povas esti, ke mia traduko estis same bona, tamen li trastrekis. Sed tradukon de la aŭstralia romano li ne havis, do li tute ne tuŝis ĝin. Aha! Do, mi jam sciis pri du homoj, kiuj konas Esperanton kaj tuj rimarkis, ke ilia lingvonivelo ne estas tre alta. Mi komencis suspekti, ke Esperanto estas lingvo por homoj, kiuj ne havas talenton por lerni aliajn lingvojn. Ĉe tiu punkto mi ne sciis, ĉu mi vere volas okupiĝi pri tiu lingvo. Sed tiam kontaktis min iu eksa instruisto: "Mi aŭdis, ke vi lernas Esperanton. Ĉu vi ŝatus veni al mia domo? Ni iom parolu pri la lingvo." Mi diris tuj: "Jes." Wilfred Goode estis lia nomo. Lia edzino estis finnino, iama opera kantistino. Tiuvespere ŝi kantis la nacian himnon de Finnlando en Esperanto. Ŝi kantis bele, preskaŭ plorigis min. S-ro Goode estis simpatia homo, kiu simple volis helpi aliajn homojn lerni Esperanton. Mi tre bedaŭris, kiam li iom poste mortis.

Daŭrigota

Ĵus finis la kuracisto sian ekzamenadon de la maljuna Broman. "Koran dankon", diris li, "tio kostas al vi \$50.00 !

"Ĉu vi postulas \$50.00 por brosi la gorgon de mia edzo?" demandis konsternite s-ino Broman. "Pasintan someron oni farbis nian tutan domon kontraŭ nur \$100 !"

Sandor ne ĉesas informi

Post sia unujara restado en Koreujo Sandor Horvath reiris al sia adelajda laborloko UNISA (University of South Australia) por instrui la anglan precipe al eksterlandaj studentoj.

Tie la instruado de la "akademia angla" havas ses nivelojn, el kiuj Sandor zorgas nun pri la 3a. Liaj studentoj okupiĝos pri la angla duonan ĝis unu jaron kaj poste iros al universitato.

Unu el la aktualaj taskoj de la lernemuloj estas aŭskulti prelegojn kaj poste skribi pri ili eseojn. Plej kutime oni uzas nur kompaktdiskajn registraĵojn de prelegoj. Ĉar Sandor preferas "vivantan" prelegon kaj kiel esperantisto temojn rilatantajn al la lingva demokratio kaj



Esperanto, li invitis al siaj klasoj verajn parolantojn. Unue en la lasta semajno de marto la paron Amato el Koreujo kaj Rikardo el Britujo kaj la 22an de majo Trevor Steele asistata de Katja Steele.

Jen kelkaj citaĵoj el la granda stoko da postevente skribitaj eseoj (origine anglalingvaj) de la ĉeestintaj studentoj:

”Esperanto estas bazita sur eŭropaj lingvoj kaj tio ne estas justa al la azianoj.”

“La angla havas fortan avantaĝon, ke ni povas per ĝi gajni monon.”

“Esperanto povus esti bona dua lingvo por la mondo, sed ĝi ne estas sufiĉe neŭtrala por la tutmonda komunikado. Eble ni bezonas alian, pli bonan internacian lingvon.”

“En la mondo Esperanto estas la plej justa lingvo.”

“Estas tre bona ideo krei tutmondan lingvon por la internacia kompreniĝo kaj Esperanto estas por tio la plej bona kandidato.”

“Komuna lingvo helpas la homojn pli bone kompreni la mondon kiel tutaĵon. Sed mi ne kredas, ke la celoj kaj ideoj de Esperanto povas realiĝi pro la sekvaj kialoj: Unue, lingvo estas parto de kulturo. Se homoj tro uzas Esperanton, eble ili perdos la propran lingvon kaj kulturon. Due, studante Esperanton ni malŝparos nian energion. Aktuale ni jam trovis unu komunan lingvon, kiu estas la angla! Ni uzas la anglan por komuniki kun homoj el diversaj landoj pri diversaj temoj. Laŭ mia opinio lingvo estas nur rimedo de komunikado, do lerni Esperanton por anstataŭigi la anglan ne estas necese.”

K. Steele

Sidis du angloj en vagonaro. Vidalvide al ili sidis du germanoj germane parolante. Subite elbuŝigis unu el la angloj: ”Fakte estas multo, pro kio oni devas esti danka al Dio, ĉu ne?”

”Kion vi volas diri?” demandis la alia anglo.

”Ho, oni devas estis danka, ke oni naskiĝis en lando, en kiu oni komprenas la lingvon!”

Memorinda Newell-vespero en la klubo

Leonard Noel Mansel Newell naskiĝis la 23an de decembro 1902 en Londono. memstare 14-jara. Poste anglan, laboris kiel portisto, soldato – en Egiptujo, Sudano kaj denaskan anglan kaj



la vulgaran araban, la francan, la germanan kaj la italan. Ivo Lapenna, kiu renkontis Newell dum la 2a mondmilito, skribis pri li: “Homo inteligenta, klera, ĝentila, entute aminda persono.”

En 1955 Newell kaj lia edzino Adi venis al Aŭstralio kaj ekloĝis en Adelajdo. Baldaŭ li fariĝis prezidanto de la loka Esperanto-klubo kaj en 1962 la ĉefekzamenanto de Aŭstralio. En 1968 li ĉeestis la Aŭstralian Esperanto-Kongreson en Manly. Ankoraŭ en januaro 1968 li forvojaĝis al Italujo. Kiam post preskaŭ unu jaro en Eŭropo li decidis reveni al Aŭstralio, li neatendite mortis en trajno survoje al Parizo la 8an de novembro 1968.

Tiujn informojn kaj multon alian pri la interesa vivo de neordinara homo ni eksciis el la biografio, aperanta fine de la poemkolekto, kiun kompilis Edwin de Kock (eldonita en 1986).

Ni konfesu, ne multaj el ni konis la nomon Len Newell. Iuj sciis, ke li estis Esperanto-verkisto, iu memoris, ke li iam loĝis en nia urbo. Bob havis la menciitan poemkolekton kaj Margaret la Hamlet-tradukon de Newell. Sed la poemoj de Newell estas elstare bonaj kaj li verkis ankaŭ originalan prozon, ne parolante pri liaj verkoj en la angla. Ni volas scii pri li pli!

La helpo venis de Max kaj Rochelle Jacquier. Evidentiĝis, ke Max instruis siatempe en la sama Adelaide Technical High School, kie laboris ĝis sia emeritiĝo ankaŭ Newell kaj ke Rochelle eklernis Esperanton ĝuste pro lia instigo. Ni aŭdis interesajn rakontojn pri la iama spiono Newell, respektita kolego Newell kaj daŭre impresa amiko Newell. Bedaŭrinde, pro la transloĝiĝoj de la paro Jacquier multaj el iliaj memoraĵoj por ĉiam malaperis, sed dum nia kluba vespero la 4an de junio ni tamen povis admiri la geedziĝajn fotojn de Max kaj Rochelle faritajn de Newell kaj legi-aŭdi la surpaperigitajn rememorojn de Fay Coppel pri la verkisto. Klare – ni ĉiuj tre ĝuis la vesperon. Ni faris fotojn pri la paro Jacquier, ni surbendigis la diritaĵojn. Uzante la nove akiritajn informojn ni de tiam jam kontaktis la arĥivistinon de la menciita mezlernejo, akiris foton pri Newell, Brendan trovis la iamajn loĝadresojn ... Ni ne lasos la spurojn pri ”nia” verkisto malaperi por ĉiam.

K.Steele

Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, SEPTEMBRO 2008, JARKOLEKTO 26

Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019

esperantobob@iprimus.com.au

Legeblas ankaŭ surrete: www.gazetejo.org

”Kion vi faris por fariĝi tiom maljuna kaj resti tiom sana?” demandis la ĵurnalisto.

”Mi neniam trinkis alkoholaĵon kaj neniam tuŝis virinojn!” respondis tuj la 97-jarulo.

Tiam aŭdiĝis virinaj krioj kaj bruoj de la apuda ĉambro. La ĵurnalisto aspektis iom surprizita, kaj la maljunulo klarigis: ”Tio estas mia patro. Li refoje ebrias. Nun li provas kapti la servistinon!”

La Kongresa Rezolucio

La 93a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Roterdamo de la 19a ĝis la 26a de julio 2008 kun 1845 partoprenantoj el 73 landoj por diskuti la kongresan temon ”Lingvoj: trezoro de la homaro”,

festante ĉijare la centjariĝon de Universala Esperanto-Asocio, notante la gravan rolon de lingvoj en la konservado de scioj kaj kulturoj, kaj en la ebligado de malsamaj aliroj al la mondo, rimarkante la daŭran diskriminacion kontraŭ lingvoj je ĉiuj niveloj kaj aparte kontraŭ la lingvoj de indiĝenaj popoloj kaj malplimulto, kaj

atentigante pri la valoro de la facile lernebla kaj neŭtrala lingvo Esperanto, kiu estas mem lingva trezoro de la homaro, kaj pri la pli ol centjara sperto de ĝia praktika utilo kiel ligilo inter kulturoj, varme bonvenigas la decidon de Unuiĝintaj Nacioj, ke la jaro 2008 estu Internacia Jaro de Lingvoj, kaj alte taksas la iniciatojn de Unesko en tiu kampo menciitajn en la mesaĝo de ties Ĝenerala Direktoro al la kongreso,

reemfazas la neceson doni egalan respekton al ĉiu lingvo, al ĉiu kulturo kaj al ĉiu homo en la mondo,

alvokas la Esperanto-komunumon disvastigi Esperanton kaj ĝiajn valorojn de respekto al ĉiu homo kaj de egaleco inter ĉiuj homgrupoj,

kaj per tio kontraŭbatali la malaperon de lingvoj kaj kulturoj tra la mondo,
invitas al kunlaboro kun ĉiuj organizaĵoj kaj instancoj, kiuj laboras por konservi lingvojn kaj kulturojn kaj defendi lingvajn homajn rajtojn,
instigas ĉiujn agnoski la esencan valoron de lingva diverseco, lige kun la kreskanta agnosko pri biologia diverseco, kaj
proponas al la monda komunumo science esplori la rolon de Esperanto en pli efika kaj justa komunikado tra la mondo.

Tri leteroj

kontribuitaj de Gróf Gábor

La 1a letero:

Kara Petro !

Kun eĉ tre granda ĝojo mi sciigas vin, ke la frukto de nia amo, eta Peĉjo, bonorde naskiĝis. Bedaŭrinde mi ne havas sufiĉe da patrinlakto kaj tial devis dungi mamnutristinon. Ŝi estas kubaanino, tial la haŭtkoloro de nia bebo iĝis tute bruna.

Tio do ne estas mia kulpo.

Via amantino Anita.

Edukado

Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, “Lingvaj Resondoj”, la elstaran verkon de nia eminenta Marcelo Leereveld, kiu bedaŭrinde nun mankas al Aŭstralia Esperanto-Asocio!!! Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur \$ 23,00!

La 2a letero:

Kara Panjo !

Mi ĵus ricevis leteron de Anita. Ŝi skribis, ke mi iĝis patro de tre bela eta filo. Ĉar ŝi ne havas sufiĉan patrinan lakton, mamnutristino el Kubao ŝin helpas. Tial la haŭto de la bebo iĝis tute bruna.

Tio neniel estas la kulpo de mia amata Anita.

*Mi esperas, ke ankaŭ vi tre ĝojas kiel ni.
Brakume, via filo Petro.*

Mummy, why can't we all speak the same language"

La bona libro "Mummy, why can't we all speak the same language?" aĉeteblas de Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith NSW 2077, aŭ perrete Nicole@cryogenic.net kontraŭ \$ 6,95 plus afranko \$ 1,95. Ĝi estas angle verkita kaj celas ĉefe infanojn proksimume 10-jarajn.

La 3a letero:

Kara mia filo Petro !

Kiam vi naskiĝis, ankaŭ mi havis similan problemon. Ankaŭ mi ne havis sufiĉe da patrina lakto. Tial mi nutris vin per bovinlakto. Verŝajne tial vi iĝis tiom granda, stulta bovo !

Tute ne estas mia kulpo !

Kisas vin via patrino.

Gravaj Esperanto-eventoj:

Merkredon la 3an de septembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

Sabaton la 20an de septembro ni ekskursos al la zoologia ĝardeno Monarto.

Merkredon la 1an de oktobro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

Sabaton la 18an de oktobro ekde la 17a horo ni kantados ĉe Indrani, 71 Hindmarsh Circuit, Mawson Lakes, S.A. 5095. Tel. 8285 3128.

Sabaton la 25an kaj dimanĉon la 26an de oktobro okazos la AEA-kongreso en Hobarto, Tasmanio.

Merkredon la 5an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

Merkredon la 3an de decembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

De la 11a ĝis la 25a de januaro 2009 la Somerkursaro de Aŭstralia Esperanto-Asocio okazos en "International House" en la belega urbego Sidnejo.

La Universala Esperanto-Kongreso okazos en 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.

Du hundoj, el kiuj unu estis Granda Dano kaj la alia estis Vertago, staris en neĝamaso.

”Brrr”, diris la Granda Dano, ”miaj piedoj frostas!”

”Ne plendu al mi”, diris la Vertago, ”mi havas miajn proprajn problemojn!”

La Zoologia Parko Monarto

Kiel sciante, almenaŭ se vi atente legis la detalojn iom pli supre, ”Esperanto en Sudaŭstralio” ekskursos al la Zoologia Parko Monarto sabaton la 20an de septembro.

Ni renkontiĝu tie je la 11a horo. La enirprezoj estas nur \$ 24 por plenkreskulo kaj \$ 18 por pensiulo. Tiuj prezoj permesos al vi unu horan perbusan veturadon kun gvidanto en la zoologia parko. Oni rajtas ankaŭ promenadi sur la vojetoj en la ĝardeno.

La Zoologia Parko estas situata 70 kilometrojn oriente de Adelajdo, do proksime al Murray Bridge. Eliru el South Eastern Freeway, kiam vi vidos la vojmontrilon ”Monarto”. De tiam vi simple sekvos la signojn.

Estas simpla afero uzadi rulseĝojn en la parko.

”Malbonajn novaĵojn mi havas por vi s-ino Ward”, diris d-ro Senhelpulo al maljunulino. ”La testspecimenon de via edzo ni hieraŭ sendis al la laboratorio, kie ĝi akcidente miksiĝis kun tiu de iu alia s-ro Ward. Mi petas vian pardonon, ambaŭ rezultoj malbonas.”

”Kion signifas tio?” demandis s-ino Ward. ”Unu specimeno montras ke li suferas pro forgesemo, la alia ke li suferas pro Aideso. Ni refoje ekzamenos lin, sed ni ne scios la rezulton ĝis post unu monato.”

”Sed kion mi faru ĝis tiam?”

”Veturigu lin ĝis en la mezo de la veprejo. Se li sukcesos trovi sian vojon hejmen, vi ne dormu kun li.”

Trevor kaj liaj lingvoj

Intervjuis Trevoron Katja

Fino

K: Ĉu do Londono lasis vin sen pruvo pri la valoroj de Esperanto?

T: Unu plia invito ŝanĝis la bildon. Temis pri invito al la Londona Esperanto-klubo, kiun tiutempe vizitadis ekzemple Ivo Lapenna (tiun vesperon li ne ĉeestis), John Wells, Nikolaj Rytjkov. La konversacio flugis tien kaj reen, ege vigle kaj tro rapide, ke mi ĉion komprenu. Tiam mi havis tute alian penson: "Ĉu iam mi lernos Esperanton ĝis la grado, ke mi parolu kiel tiuj homoj?"

Baldaŭ mi ricevis telefonvokon de iu Raif Markarian, lernejestro en Essex: "Ĉu vi ŝatus senpagan vojaĝon al la Universala Kongreso en Vieno?" Ĝis tiam mia plano estis iri al Irlando dum la lerneja feriado (ĉar mi estas parte irlanddevena), sed ĉar tiutempe mi tre ŝatis Vienon, mi diris: "Jes." Sed Raif aldonis kondiĉon: "Dum la tuta tempo en la aŭto mi devos paroli Esperanton." Diable, ĝis tiam mi tute ne parolis la lingvon, do mi petis tempon por reрпиensi mian respondon. Mi ricevis tri tagojn por decidi. Mi komencis skribi frazojn kiel – Kio estas via nomo? Kie vi loĝas? Ktp. Mi provis meti ilin en mian menson, mi laŭtleĝis ilin, respondis ilin, do, mi akiris iometan konversacikapablon. Kiam Raif ree telefonis al mi, mi diris firme "Jes."

K: Rakontu pri via

T: En la aŭto ni estis Chris Fettes (tiutempe pli-La postulo de Raif estis tempo al tempo forŝteliĝis angle, kiam Raif ne povis estis ege streĉa. La



unua Esperanto-vojaĝo.

kvar: Raif, lia filino Ĝoja, malpli komencanto) kaj mi serioza. Chris kaj mi de dum la vojaĝo kaj parolis aŭdi nin, ĉar lia rigoreco klimakso de tiu fanatikeco

okazis en Vieno mem. Mi sidis apud li kun la maparo de Vieno kaj devis gvidi lian veturigadon. Ni subite troviĝis antaŭ unudirekta strato kaj ĉar mi ne konis tiun vorton en Esperanto, mi diris: "Ne iru, 'one way street!'" Kaj kion li faris? Li veturigis en tiun straton. Mi diris: "Unu, unu-voja strato!" Li iom pripensis, reiris malantaŭen el la strato kaj daŭrigis la vojaĝon. Tion mi trovis vere ekstrema, ĉar povintus veni kontraŭ ni iu aŭto kaj kolizii. Kiam ni fine venis al la kongresejo, mi iris registri min kaj malaperis en la


urbon. Post tiu ribelo mi trankviliĝis kaj, ĉar la afero tamen interesis min, mi reiris al la kongresejo.

K: Kiel impresis vin tiu unua UK?

T: Mi ĉeestis la inaŭguron de la kongreso. Eniris la salonon altkreska, tre solena sinjoro, vera mastro. Li paŝis al la podio, eksidis ĉe la tablo. Evidente li regis tie. Li iris al la mikrofono kaj oratoris. Li oratoris bonege! Estis longaj ruliĝantaj frazoj, sed tiel klare prononcataj kaj tiel klare strukturitaj, ke mi komprenis ĉion. Mi diris al mi mem: "Ankaŭ oratori oni povas en tiu lingvo." Komprenoble, temas pri Ivo Lapenna.

Dum la semajno mi partoprenis diversajn prelegojn kaj kunsidojn kaj ekkomprenis pli kaj pli. Iam mi troviĝis ĉe ILEI-kunsido. Oni serĉis iun por protokoli kaj iu proponis min. Fine de la semajno, mi kredas, mi sufiĉe bone parolis Esperanton.

K: Eble de tiam vi estas konvinkita esperantisto, ĉu?

T: Al tio ligiĝas aparta sperto. Eble la antaŭlastan tagon de la kongreso mi havis konversacion en la koridoro de la kongresejo. Mi parolis kun malaltkreska viro, japano. Tiutempe al Australio la japanoj venadis en grandaj grupoj. Ili ĉiam estis kune, ne parolis angle. Ĉar ankaŭ ni ne la du grupoj estis nur japano estis do simbolo povas paroli. Sed – mi do dum longa tempo – pri lia tute flua, libera  parolis ilian lingvon, inter minimumaj kontaktoj. La de homo, kun kiu oni parolis kun tiu japano vivo, lia familio ktp. Estis konversacio de homoj, kiuj volis scii unu pri la alia, kaj nur kiam li foriris mi konsciis, ke tiu estis japano. Mi kredas, ke tiu estis tre decida momento de mia vivo, ĉar mi vidis, ke Esperanto ne estas nur interesa lingva fenomeno. Ĝi iĝis parto de mia propra filozofio. Esperanto reprezentas por mi justecon sur lingva kampo. Mi volas, ke la mondo estu justa ekonomie, politike, kulture, ktp. Kaj sur la lingva kampo Esperanto estas la respondo al tiu demando. Esperanto fariĝis por mi ne nur intereso, sed parto de mia mondpercepto.

K: Car vi jam parolis pri viaj unuaj traduko kaj konversacio, bonvolu diri, kiu estis via unua Esperanto-legaĵo?

T: Antaŭ ol iri al la UK, mi vizitis la Esperanto-librovendejon en Londono. Mi demandis la vendiston, ĉu estas verko, kiu per si mem penvalorigus lerni la lingvon. S-ro Platt transdonis al mi kajereton kun la titolo "La infana raso", verkitan de William Auld. Apenaŭ legaĵo por komencanto. Mi ofte bezonis vortaron, sed pravis, ke tiu verko estas vera artaĵo.

K: Kien gvidis vin viaj vojoj post tiu sperto?

T: Preskaŭ tuj poste (1971) mi iris al Hispanujo kaj restis tie 8 monatojn. Kompreneble, la latina estis tre bona bazo por lerni la *hispanan*, kaj ankaŭ la cirkonstancoj instigis min. Mi vizitadis Esperanto-grupon, en kiu mi konatiĝis kun esperantistino, kiu havis belan 20-jaran filinon Pilar. Sed laŭ Pilar Esperanto konsistas el stultaĵoj kaj ŝi ne volis lerni ĝin. La patrino, por interesigi sian filinon pri nia lingvo, logis min al sia domo celante, ke Pilar lernos Esperanto por povi paroli kun mi. Ni ja amikiĝis, sed ne la belulino lernis mian lingvon, sed mi la hispanan. Fine de mia restado mi jam povis sekvi filmojn en kinejo aŭ legi ĵurnalojn.

K: Kiu estis la sekva haltejo?

T: Mi iris al Sovetunio. Ankaŭ tie mi atingis la etapon, kiam mi povis pli-malpli interkompreniĝi per la *rusa*. Mi loĝis en Tallinn kaj ĉiuj miaj najbaroj estis rusoj aŭ ruslingvanoj. Kiam mi poste iris al Pollando mi unue provis uzi la rusan, sed tio montriĝis ne la plej bona taktiko. Do, mi iom lernis Polujo inter 1991 kaj la la *polan*. Mi parolis ĝin frua 1992, kaj poste en Polujo inter 1991 kaj la vizitoj mi povis iom uzi la 1997. Fine de tiuj du ankaŭ en Litovujo, mia sekva restadloko, ĉar tie estas multaj pollingvaj (kaj ruslingvaj) homoj, sed mi komencis lerni ankaŭ la *litovan*. La rezulto estis vera salato de malfacile disigeblaj ingrediencoj rusaj-polaj-litovaj, parte pro tio mi ne lernis iun ajn el la 3 lingvoj gisfine.



K: Vi restadis dum iom longa tempo ankaŭ en Brazilo. Mi supozas, ke vi lernis ankaŭ la *portugalan*.

T: Jes, iom. Mi vivis en Bona Espero (ŝtato Goias) en 1977 kaj en 1995. Sed tie la komuna lingvo estis Esperanto, kaj portugale mi parolis nur kiam mi turismis, ekz. Al la ĉefurbo.

K: Ĉu vi iam provis lerni iun neeŭropan lingvon?

T: Se oni rigardas Esperanton eŭropa lingvo, estas fakto, ke miaj spertoj estas nur eŭropaj. Tion mi bedaŭras, sed nuntempe mi ne sentas grandan emon lerni novan lingvon.

K: Evidente, vi ĝuis viajn lingvajn aventurojn kaj spertojn, kaj la lingvoj ĝenerale multe rolis en via vivo.

T: Provu imagi mondon de homoj, kiuj ne kapablas paroli! Niaj lingvoj estis tio, kio ebligis homan kulturon entute. Eble iam ni evoluos al estuloj, kiuj interkomunikos telepatie. Intertempe lingvo estas la plej karakteriza agado de homoj. Krome mi mem ĉiam trovas la defion esprimi min lingve unu el la grandaj ĝojoj de la vivo.

Oficejestro estis embarasita ĉar li ne havis orelojn. Nu, tio povas okazi al kiu ajn, ĉu ne? Neniu el ni estas perfektaj.

Iun tagon venis tri junuloj esperante dungigon. La oficejestro demandis la unuan, "ĉu vi vidas ion neordinaran pri mi?"

Respondis la unua: "Vi ne havas orelojn." La oficejestro elĵetis lin. La respondo de la dua similis tiun de la unua, do ankaŭ li estis elĵetita. La tria havis tute malsaman respondon. "Vi surhavas kontaktensojn", li diris.

La oficejestro estis konsternita. "Kiel vi sciis?"

"Ĉar okulvitroj ne estas unu el viaj elekteblecoj" !

Kongresano estis enkarcerigita du horojn

Nia estimata samideano Gunnar Olsson el Svedujo estis malĝentile traktata dum la ĵus pasinta Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo.

Ĉiuj kongresanoj estis devigataj surhavi ĉirkaŭ sia kolo identigilon kun sia nomo, sed nia eminenta amiko sveda rifuzis tion, ĉar li estas homo kaj ne bovino, kvankam bovino ĝenerale surhavas sian identigilon en la oreloj.

Ĉar li rifuzis tion, por devigi lin identigilon, sed li, ĉar li simple eĉ tre amike gardistoj venigis la perforte elteris Gunnar policejon. Tamen, kelkajn horojn poste li revenis kun sia kutima, amikeca rideto.



venis du aŭ tri gardistoj ĉirkaŭkoligi la vere estas bonegulo, ridetis al ili. Tiam la policon, kiuj iom tro el la kongresejo en la

Tio montras, kio povas okazi, kiam iuj homoj sentas sin pli aŭtoritataj ol aliaj, ĉu ne? En nia Esperantujo ni ĉiuj egalas, kaj ĉiuj havas la samajn rajtojn. Neniu rajtas enkarcerigi alian. Esperantistoj devas montri la vojon irendan al aliaj, precipe al tiuj, kiuj ankoraŭ ne lernis Esperanton.

La moralo de la historio do estas, ke ni ĉiuj traktu unu la alian respekteme kaj amikece !!!

Diris usona neesperantisto al esperantisto usona: "Se la angla estis sufiĉe bona por Jesuo Kristo, ĝi estas ankaŭ sufiĉe bona por mi!"

Kontribuita de Vera Payne

Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, OKTOBRO 2008, JARKOLEKTO 26

Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019

esperantobob@iprimus.com.au

Legeblas ankaŭ surrete: www.gazetejo.org

Eksedzino kun sep infanoj serĉis luloĝejon, sed, laŭ la domposedantoj, sep infanoj estis iomete tro, do nenie ŝi sukcesis trovi loĝejon. Iun matenon venis en ŝian kapon bona, eĉ bonega ideo. Ŝi diris al kvin el la infanoj: "Iru ludi en la tombejo, vi kvin!"

La du aliajn infanojn ŝi kunprenis kun si al domluiganto, kiu ŝin demandis: "Kiom da infanoj vi havas?"

"Mi havas tiujn du, kiujn vi vidas, kaj kvin en la tombejo!"

Ŝi ricevis la luloĝejon.

Vegetaranoj ricevis lecionon pri Esperanto

De la 27a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2008 okazis en Dreseno, Germanujo, la 38a Internacia Vegetarana Kongreso, organizita de International Vegetarian Union (Internacia Vegetarana Unuiĝo – IVU). Same kiel Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio, IVU festis sian centjariĝon. Ĉeestis entute pli ol 600 vegetaranoj kaj veganoj el pli ol 30 landoj.

Nome de TEVA, aktive partoprenis tri el ĝiaj estraranoj: Christopher Fettes, prezidanto; Francesco Maurelli, vicprezidanto kaj Heidi Goes, sekretario. Inter la dekoj da prelegoj pri ĉiuspecaj aspektoj de vegetaranismo, kiuj okazis dum la kongreso, estis ankaŭ du rilataj al Esperanto.

Lunde, la 28an de julio, Christopher Fettes parolis pri internacia amikeco inter vegetaranaj familioj pere de Esperanto, kaj montris fotojn pri internaciaj Esperanto-renkontiĝoj, en kiuj partoprenis multaj infanoj. Francesco Maurelli, vendrede, la 1an de aŭgusto, parolis pri la historiaj kaj ideologiaj ligoj inter la vegetarana kaj Esperanta movadoj.

La vegetaranoj miris pri tio, ke la esperantistoj multe kontribuis al la fondiĝo Vegetarana Unuiĝo. antaŭ cent jaroj, decidis por fondi sian unuiĝon esperantistoj jam planis Universalan Kongreson.



de la Internacia Fakte la vegetaranoj, kunveni en Dreseno ĝuste pro tio, ke la tie okazigi la kvaran Ambaŭ prelegoj allogis

dekelk partoprenantojn, kaj inter ili pluraj petis pli da informoj aŭ starigis demandojn, kiuj montris sinceran interesiĝon. Lunde anonciĝis kurseto pri Esperanto, kiu okazis ĉiun tagmezon dum la kvar sekvaj kongrestagoj.

Partoprenis la lecionojn vegetaranoj el diversaj landoj (Germanujo, Usono, Aŭstrujo, Hinda Unio, Britujo ktp.). Dum la tuta kongressemajno, TEVA havis budon, en kiu estis montrataj Esperantaj tradukoj de famaj verkoj kaj desegnoserioj, originalan literaturon kaj germanlingvajn informfoliojn pri Esperanto.

Du esperantistoj el Dresdeno kelkfoje vizitis la budon kaj kundeĵoris. Kelkfoje homoj tiom entuziasmiĝis, ke ili tuj surloke komencis lerni la lingvon. Ni sukcesis montri al la kongresanoj, ke Esperanto daŭre ekzistas kaj nia amikema sinteno rezultigis multajn bonajn kontaktojn. Sed ne nur tio: kelkaj el ili serioze pripensas partopreni en la venonta UK! Fotoj de la kongreso videblas ĉe www.ivu.org/teva kaj ĉe <http://www.ivu.org/congress?2008/photos>

Francesco Maurelli kaj Heidi Goes

Kanibalo vizitis sian najbaron por vidi ties novan frostigilon. Li estis tre imponita kaj demandis: “Kiom ĝi povas enteni?”

“Mi ne scias precize, sed ĝi facile entenas tiujn du, kiuj ĝin alportis al mi !”

Edukado

Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, “Lingvaj Resondoj”, la elstaran verkon de nia eminenta Marcelo Leereveld, kiu bedaŭrinde nun mankas al Aŭstralia Esperanto-Asocio!!! Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur \$ 23,00!

“Sinjoro direktoro, ĉu mi rajtos resti hejme morgaŭ, mia edzino kaj mi devos purigi la domon !”

“Certe ne !”

“Koregan dankegon, mi sciis ke mi povas fidi je vi !”

Mummy, why can't we all speak the same language”

La bona libro “Mummy, why can't we all speak the same language?” aĉeteblas de Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith NSW 2077, aŭ perrete Nicole@cryogenic.net kontraŭ \$ 6,95 plus afranko \$ 1,95. Ĝi estas angle verkita kaj celas ĉefe infanojn proksimume 10-jarajn.

“Vi iam diris, ke vi neniam edziĝos.”

”Jes, sed iom post iom fariĝis tre tede sidi en la drinkejo ĉiun vesperon”.

”Sed ĝuste tion vi ja nuntempe faras.”

”Jes, ĉar nun estas pli amuze sidi ĉi tie...”

Gravaj Esperanto-eventoj:

Merkredon la 1an de oktobro ni ne kunvenos en Clarence Park je la 18a horo. Tiu kunveno estas nun nuligita! Anstataŭe ni sabaton la 4an de oktobro kunvenos ĉe Katja kaj Trevor, 9 Vicar Street, Gilles Plain, S.A. 5086, telefono: 8367 5713, de la 14a ĝis la 17a horoj. Ges-roj Ĵeni kaj Alan Bishop gastos tie, kaj mi estas certa, ke ni ĉiuj ĝuos ilian ĉeestadon !

Sabaton la 18an de oktobro ekde la 17a horo ni kantados ĉe Indrani, 71 Hindmarsh Circuit, Mawson Lakes, S.A. 5095. Tel. 8285 3128.

Sabaton la 25an kaj dimanĉon la 26an de oktobro okazos la AEA-kongreso en Hobarto, Tasmanio.

Merkredon la 5an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

Merkredon la 3an de decembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

De la 11a ĝis la 25a de januaro 2009 la Somerkursaro de Aŭstralia Esperanto-Asocio okazos en ”International House”, 96 City Road, Chippendale, NSK 2008, en la belega urbego Sidnejo.

La Universala Esperanto-Kongreso okazos en 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.

En 2010 la Universala Esperanto-Kongreso okazos refoje en la belega urbo Havano, Kubao.

La laboristo paŭzis dum sia laboro kaj telefonis hejmen por ekscii, kiel la familio fartas. Lia 7-jara fileto Paŭlo, respondis: ”Bone, eĉ bonege, la kamentubpurigisto ĵus estis ĉi tie, kaj Panjo kuŝas en la bankuvo...”

Ĉu la usona estu deviga ?

LPGA (Ladies’ Professional Golf Association) estas usona organizaĵo por profesiaj golfistoj. Tiu LPGA insistas, ke ĉiuj virinoj, virinoj el la tuta mondo, kiuj deziras partopreni en ĝiaj ĉiusemajnaj golfkonkursoj, devas mastri la anglan lingvon kaj submeti sin al ekzameno.

Seon-Hwa Lee, la sola aziano kun multaj venkoj en la ĉijara turniro, rakontis al usonaj amaskomunikiloj, ke ŝi ricevas helpon de

privata instruisto de la angla. Nun ŝi bone kapablas respondi al demandoj sen interpretisto.

Diris ankaŭ alia korea golfisto, Pak Re-ri: “Ni konsentas, ke ni devus iom paroli la anglan. Ni ĝenerale tiom bone ludas. Gajninte oni devas fari paroladon en la angla”.

Aldonas Michael Walker, ĵurnalisto de Golf Magazine, ke eble estus bona ideo postuli ankaŭ, ke ĉiu, krom la anglan, mastru ankaŭ ĵongladon, gitarludadon kaj la arton fari magiaĵojn. Tio sendube allogus pli la rigardantoj. Kaj kial ne postuli, ke ĉiuj ludantoj mastru la korean?

Kiel reagus la usonanoj, se ankaŭ homoj ekster Usono agus tiel? Eble oni devus postuli, ke usonaj golfistoj unue lernu la norvegan, la grekan, svahilan ktp. Tiel la usonaj aranĝantoj ekkomprenus la lingvoproblemon !!!

El Libera Folio

Ĉiam, kiam ili amoris, la edzo estingis la lumon. Laŭ la edzino tio estas, post 20 jaroj da geedziĝo, ridinda, kaj iun nokton ŝi subite ekŝaltis la lumon. Ŝi rigardis malsupren ... kaj vidis, ke la edzo tenis baterian vibrilon en sia mano.

“Vi porko!” ŝi kriegis al li, “kial vi 20 jarojn tiel trompis min, mi konsilas al vi, ke vi klarigu!”

Trankvile la edzo rigardis rekte en ŝiajn okulojn kaj diris: “se mi klarigos pri la vibrilo, ĉu vi klarigos pri la infanoj?”

Kontribuita de Alano Mendelawitz

Novaj belegaj poŝtkartoj

“Esperanto en Sudaŭstralio” ĵus eldonis tre belegajn poŝtkartojn pri Esperanto-verkintoj kaj verkantoj aŭstraliaj. Sur la poŝtkarto videblas eĉ iliaj vizaĝoj, kia ĝojo, ĉu ne?

La kartoj aĉeteblas ĉe Audrey Felby audrey100@iprimus.com.au. Ili kostas po 80 cendojn por 24. De 25 ĝis 99 ili kostas po 60 cendojn. De 100 ili kostas po 50 cendojn. Al la prezoj aldonighos la sendkostoj. La 15an de septembro Aŭstralia Poŝto plialtigos siajn prezojn, do pli bone estas mendi la kartojn jam nun !

Georgo Filipino el Viktorio, Aŭstralio estis enlitiĝanta, kiam lia edzino diris, ke lumo lumas en la ĝardena ŝedo. Tion ŝi facile vidis de la dormoĉambra fenestro.

Georgo estis malferminta la malantaŭan pordon por estingi la lumon, kiam li vidis, ke ŝtelistoj ŝtelas ion el la ŝedo.

Li do telefonis al la polico, kiu demandis, ĉu estas ŝtelistoj en la domo? Georgo respondis ke ne. Tiam la policisto diris, ke ĉiuj policianoj estas okupataj pri pli gravaj problemoj, kaj ke Georgo simple ŝlosu sian pordon kaj atendu ĝis policano venos, kiam tiu havos tempon. "Bone, eĉ bonege!" diris Georgo, ĉesis la telefonadon, kalkulis ĝis 30 kaj refoje telefonis al la polico.

"Saluton, mi telefonis al vi antaŭ nur kelkaj sekundoj, ĉar oni ŝteladas miajn ĝardenumilojn. Nu, ne plu ĉagrenu vin pri tio, ĉar mi ĵus pafmortigis ĉiujn el ili". Tiam li ĉesis la telefonadon.

Kvin minutojn poste tri policaŭtoj, multaj armitaj policianoj kaj malsanultransportilo venis al la domo de Georgo, kie ili kaptis la krimulojn je freŝa faro.

Diris unu el la policianoj al Georgo: "Sed vi diris al mi, ke vi jam pafmortigis ĉiun el ili!"

Respondis Georgo: "Kaj vi diris al mi, ke ĉiu policano estas okupata pri pli gravaj problemoj!"

Kontribuita de Vera Payne

Ankoraŭ ŝrumpas la membrokvanto de UEA

Per granda fortostreĉo UEA pasintan jaron sukcesis superi la magian limon de 6.000 individuaj membroj. La fina sumo por la jaro 2007 iĝis 6.011 individuaj membroj. En 2008 UEA evidente ne plu povos atingi la magian limon, ĉar fine de aŭgusto la membrostatistiko postrestis la pasintjaron je 266. Tamen la kvanto da aligitaj membroj altiĝis, ĉefe pro tio, ke Hungaria Esperanto-Asocio ĉijare raportis dekoble pli da membroj ol pasintjare.

En la diskutejo de la komitato de UEA la ĝenerala direktoro de la asocio ĵus raportis, ke UEA fine de aŭgusto havis 5540 individuajn membrojn.

Laŭ la sperto oni povas atendi, ke almenaŭ 200 membroj ankoraŭ kotizos ĉijare. En tiu kazo la fina nombro estos ĉ. 5750, do klare malpli ol pasintjare (6011), kvankam iom pli ol en la malbonaj jaroj 2002 (5713) kaj 2003 (5714). Eblas tamen, ke la evoluo estos pli bona, ĉar la bjalistoka UK iomete influos jam la ĉijaran membronombro, kvankam ĝia efiko ĉefe aperos en la statistiko de 2009. Al ĝi sendube aliĝos multaj kongresanoj, kiuj nun ne membras en UEA, skribis Osmo Buller.

La plej granda falo okazis en Japanujo, kie nun estas 457 membroj malpli ol pasintjare. En Korea Respubliko estis falo de 50, li raportis.

Kreskoj en la cetera mondo kompensas nur duonon de tiuj perdoj. Estas do facile vidi, ke Jokohamo havis pli fortan kongresan efikon ol Roterdamo, kies kongresanoj pli grandkvante estis regulaj

membroj. En Japanujo la membraro pli ol duobliĝis pasintjare, sed en Nederlando ĉimomente estas nur 6 membroj pli ol en 2007. Pli da kongresa efiko estis en Francujo (+36) kaj Germanujo (+16), sed la plej granda kresko tamen okazis en Rusujo (+53).

Same pro la kongresa efiko nun kreskis la kvanto de TEJO-membroj. Pasintjare la Internacia Junulara Kongreso okazis en Azio, kaj la memborkvanto ŝrumpis, ĉar multaj eŭropanoj ne veturis al la IJK. Ĉijare la eŭropa IJK kaŭzis, ke en aŭgusto TEJO havis 443 individuajn membrojn, 79 pli ol aŭguste pasintjare.

Kvankam la kvanto de individuaj membroj malkreskas, la suma kvanto de membroj en UEA ĉijare estos pli alta ol pasintjare, pro kresko en la kvanto de aliĝintaj membroj, atentigas Osmo Buller.

Kelkaj landoj ankoraŭ ne pagis por aligitaj membroj, sed jam nun la nombro (11.405) estas preskaŭ sama kiel fine de 2007 (11.477). Aldoniĝos ankoraŭ ĉ. 400 aligitaj membroj, tiel ke la fina sumo estos ĉ. 300 pli granda ol en 2007. Aligitaj membroj plimultiĝis danke al Hungaria Esperanto-Asocio, kiu pagis por 1.348 membroj kaj en 2007 nur por 142. Tio kovras la fakton, ke en multaj landoj la nombroj malkreskis.

El Libera Folio

”Mi legis en la tagĵurnalo, ke pastro erare edzinigis virinon al la malĝusta viro”.

”Jes, ĉu ne estas strange, precize tio sama okazis al mi !”

La Aŭstralia Esperanto-Asocio

invitas vin ĉiujn al la 24a Aŭstralia Esperanto-Somerkursaro de la 11a ĝis la 24a de januaro 2009 en “International House” la loĝejo de internaciaj studentoj de la Sidneja Universitato.

Kontaktu: aesk@esperanto.org.au

Jen la prezoj de la kursoj en 2009:

- 1) NUR kursoj, neniuj loĝado en “International House” = “dumtagaj gelernantoj”.
- 2) NUR loĝado en “International House” = “Nelernantoj”.
- 3) Kursoj kaj loĝado en “International House” = “ĉio inkluzivita”.

	Antaŭ la 31/10/08	depost la 01/11/08
*1) AEA-membro	\$ 455,00	\$ 545,00
AEA-membro kun rabato	\$ 380,00	\$ 455,00
Nemembro	\$ 500,00	\$ 600,00

Nemembro kun rabato \$ 420,00 \$ 505,00

*2) = Nelernantoj (nur loĝantoj) – ĉiutaga prezo

	Antaŭ la 31/10/08	depost la 01/11/08
AEA-membro	\$ 91,00	\$ 109,00
AEA-membro kun rabato	\$ 83,00	\$ 100,00
Nemembro	\$ 100,00	\$ 120,00
Nemembro kun rabato	\$ 91,00	\$ 109,00

*3) = Ĉion inkluzive (Kurso kaj loĝado) – 14 tagojn

	Antaŭ la 31/10/08	depost la 01/11/08
AEA-membro	\$ 1.390,00	\$ 1.670,00
AEA-membro kun rabato	\$ 1.350,00	\$ 1.620,00
Nemembro	\$ 1.530,00	\$ 1.835,00
Nemembro kun rabato	\$ 1.485,00	\$ 1.780,00

- Ekstraj tagoj kostos (por “ĉion inkluzive”- pagantoj) – ĉiutaga prezo:

	Antaŭ la 31/10/08	depost la 01/11/08
AEA-membro	\$ 76,00	\$ 91,00
AEA-membro kun rabato	\$ 74,00	\$ 89,00
Nemembro	\$ 91,00	\$ 109,00
Nemembro kun rabato	\$ 83,00	\$ 100,00


Viro, kiu, ĵus ricevis siajn kontaktlensojn, avide rigardis belulinon irantan sur la trotuaro, tiom avide, ke lia aŭtomobilo suferetis akcidenton. Venis policisto. Li ekzamenis la veturigpermesilon de la viro. Diris la policisto: ”Vi devas surhavi okulvitrojn dum vi veturigas vian aŭtomobilon.”

”Ĉio estas en ordo,” diris la aŭtomobilveturiginto, ĉar mi havas ‘kontaktojn’”.

“Ne gravas al mi, kiun vi konas” diris la policisto, “estas ĉi tie skribite, ke vi devas surhavi okulvitrojn, kaj tiajn vi ne surhavas, do vi ricevos grandegan monpunon !”

Kontribuita de Vera Payne

Ĉu la homoj ne estas stultaj? Ili mortigas nin por mortigi sin mem !



Mensogo malproksimen ne kondukas (LLZ)

Tio okazis en Eŭropo (eble en la Cara Ruslando) antaŭ pli ol 100 jaroj. 40-jara judo ricevis oficialan alvokon pri armerekutiĝo.

Ektiminte li urĝe kuris al sia rabeno.

”Mia rabeno”, li diris, ”Kion mi diru en la oficejo de rekrutigo pri mia aĝo? Ĉu mi diru, ke mi estas pli juna, aŭ pli maljuna?”

Post minuto li eliris el la rabena ĉambro ŝokita kaj diris al la ĉeestantoj: ”La rabeno konsilis al mi diri ĝuste la veron. Pri tio mi tute ne pensis!”

Kontribuita de Josi Shemer

Malgranda Mads havis tro longajn harojn kaj lia patrino decidis, ke ili estu mallongigitaj. Mads ne konsentis kaj kriegis kaj piedfrapis ktp. Nek la patrino nek la hartondisto sciis kion fari. Fine la alia hartondisto, kiu staris ĉe la apuda seĝo diris: ”Mi trankviligos lin!” Li flustris ion en la orelon de Mads, kiu tuj sidis senmove kaj senkrie. Poste diris la unua hartondisto al la dua: ”Tio estis aplikata psikologio, ĉu ne? Kion en la mondo vi diris al la knabaĉo?”

Mi simple diris: ”Se vi ne silentos kaj sidos senmove mi fortontos viajn orelojn !”

Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, NOVEMBRO 2008, JARKOLEKTO 26

Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park, S.A. 5019

esperantobob@iprimus.com.au

Legeblas ankaŭ surrete: www.gazetejo.org

Sinjorino tre ĉarma enpoŝtigis malnovan familian biblion al sia frato en alia parto de la lando.

”Ĉu enestas io rompebla en la skatolo?” demandis la poŝtoficejisto.

Respondis la ĉarmulino: ”Nur la Dek Ordonoj!”

Henriette Vanechop

Edukado

Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, “Lingvaj Resondoj”, la elstaran verkon de nia eminenta Marcelo Leereveld, Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur \$ 23,00!

Aŭstralia Johano survojis al eĉ tre gravega kunveno. Johano ne povis trovi aŭtomobilrestadigejon. Rigardante al la ĉielo li diris: ”Sinjoro, kompatu min. Se vi trovos por mi aŭtomobilrestadigejon, mi promesas iri preĝejen ĉiun dimanĉon. Mi promesas eĉ ĉesi trinkadon de malta viskio tiom longe, kiom mi vivos!”

Mirakle, antaŭ li aperis aŭtomobilrestadigejo.

Refoje ĉielen rigardis Johano dirante: ”Ne plu gravas, mi mem trovis iun!”

Brendan Linnane

Mummy, why can't we all speak the same language”

La bona libro “Mummy, why can't we all speak the same language?” aĉetebblas de Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith NSW 2077, aŭ perrete Nicole@cryogenic.net kontraŭ \$ 6,95 plus afranko \$ 1,95. Ĝi estas angle verkita kaj celas ĉefe infanojn proksimume 10-jarajn.

Pastro Pedersen eniras drinkejon en Århus, Jutlando. Al la unua drinkanto, kiun li vidas, li diras: "Ĉu vi deziras eniri Ĉielon?"

Respondis la drinkanto: "Jes, tre plaĉus al mi eniri Ĉielon!"

Diris la pastro: "Vi do staru tie ĉe la muro".

"Certe, s-ro pastro", diris la drinkanto.

Tiam la pastro demandis alian drinkemulon: "Ĉu vi deziras eniri Ĉielon?"

"Tre certe, eĉ certege," estis la respondo de la drinkemulo.

Diris la pastro: "Vi do staru tie ĉe la muro".

Tiam la pastro demandis al alia alkoholulo, kies nomo estas Anton dirante: "Ĉu vi deziras eniri Ĉielon?"

Respondis Anton: "Ne, mi ne deziras eniri Ĉielon!"

Diris la pastro: "Nekredeble, ĉu vi volas diri, ke kiam vi mortos, vi ne deziros eniri Ĉielon?"

Respondis Anton: "Ho, kiam mi mortos, jes. Mi kredis, ke vi kolektas grupon por ekiri jam nun!"

Brendan Linnane

UEA ĉesigas kontakton kun Gbeglo Koffi

La prezidanto Esperanto-Asocio, Dasgupta, marde la publike deklaris, ke povas havi laboran Gbeglo Koffi, por Togolando. Probal Dasgupta, decidis la tuta asocio. La kialo de estas la kalumniaj deklaroj de Gbeglo oficistoj de la kiuj laŭ Probal Dasgupta atestas pri "malobservado de tute bazaj principoj de la deco".



de Universala Probal 7an de oktobro UEA ne plu kontrakton kun komitatano A Tion, laŭ unuanime estraro de la la decido laŭ li publikaj Koffi pri asocio, deklaroj

Gbeglo Koffi estas antaŭa estrarano de UEA, sed konflikta kun la asocio ekde la dua jaruono de 2005, kiam la estraro de UEA ne plu volis daŭrigi la favorajn kondiĉojn de la Afrika Oficejo de UEA, gvidita de Gbeglo Koffi. Tiam la intimaj rilatoj inter la Afrika Oficejo de UEA kaj la Esperanta Civito kaŭzis multan kritikon en la komitato de UEA. Ankaŭ la prisilentata demisio de unu el la afrikaj oficistoj tiam mirigis komitatanojn de UEA.

La insistaj postuloj de Gbeglo Koffi dum longa tempo temis pri monprunto donita de UEA al la projekto Indiĝenaj Dialogoj dum la periodo kiam li mem estis estrarano de UEA. La prunto neniam estis repagita pro la malsukceso de la projekto, kaj kvankam estis nenio sekreta pri la afero, Gbeglo Koffi minacis "malkaŝi" ĝin, se la estraro de UEA ne plenumas liajn postulojn.

Pri siaj minacoj al la estraro Gbeglo Koffi mem rakontis en la diskutejo de la komitato de UEA, en mesaĝo al la tiama ĝenerala sekretario de UEA, Ulla Luin: "Certe vi memoras miajn minacojn al la estraro pri tiu prunto. Ek de oktobro 2005 mi minacis publikigi la aferon, se vi... Certe vi memoras, ĉu ne?"

De tiam Gbeglo Koffi multfoje levis la temon de la pratempa monprunto en la diskutejoj de UEA, sed ne sukcesis konvinki la membrojn aŭ la komitatanojn pri sia praveco. Sian plej freŝan provon li faris dum la Universala Kongreso en Roterdamo, sed daŭre sensukcese.

Post sia fiasko en Roterdamo Gbeglo Koffi perdis la esperon pri la monprunta intrigo, kaj anstataŭe intensigis siajn provojn ĵeti koton sur oficistojn de UEA, unue en privataj kaj poste ankaŭ en publikaj mesaĝoj krude kalumniante unuopajn oficistojn de la Centra Oficejo pro tio, ke ilia seksa direktiĝo ne plaĉas al li.

La intensiĝanta kalumnia kampanjo flanke de Gbeglo Koffi fine gvidis al elpaŝo de la prezidanto de UEA. En letero sendita al ĉiuj estraranoj kaj komitatanoj de Unuiĝo Togolanda por Esperanto (UTE), Probal Dasgupta skribis interalie: "Temas ne nur pri lezo de la principo distingi en

publika komunikado inter publikaj kaj privataj temoj, sed pri malobservado de tute bazaj principoj de la deco – tia malobservado, kiun la juro rigardas kiel vortan agresadon. Pro tio, ke Koffi Gbeglo uzis iujn esprimojn severe trans la limoj de la interkultura konduto, ĉiuj estraranoj de UEA unuanime kaj insiste petis min skribi al vi”.

Li atentigis, ke pro la neakceptebla konduto de Gbeglo Koffi, UEA ne plu povos labori kun li, kaj ke la cirkonstancoj malutilas ankaŭ al rilatoj inter UEA kaj ĝia landa asocio en Togolando, UTE: ”Por ke la interorganiza komunikado inter UTE kaj UEA plue funkciu, necesas paŝoj flanke de UTE rilate la okazintaĵojn, UTE formale sin distancigu de la uzo de tiaj esprimoj fare de la komitatano A, kiu reprezentas la Unuiĝon antaŭ nia Asocio. Preter tio, se UTE rekonsideros lian rolon kiel komitatano A reprezentanta UTE en la komitato de UEA, tio eĉ pli pozitive efikos sur la rilatoj inter la du organizaĵoj.

Responde al demandoj de Libera Folio, Probal Dasgupta klarigis, ke kvankam UEA laŭ la publika deklaro ”ne plu povos labori kun li”, la asocio ne plene interrompos sian komunikadon kun Gbeglo Koffi.

Dum li restas komitatano, UEA certe havas komunikajn devojn al li ene de la asocio, kaj UEA skrupule observos siajn regulojn. Se li ĉesos esti komitatano, refoje UEA ne planas emisii oficialajn okazojn por ekskomuniko el ĉio alia.

Cetere Probal Dasgupta ne volis komenti sian publikan leteron, klarigante, ke ĝi estas formulita en maniero komune interkonsentita de la estraro, kiu provas agi laŭeble kohera kaj unuvoĉe en delikata afero.

Laŭ la regularo de UEA, membro kiu “evidente kontraŭlaboras la celojn de UEA, morale aŭ materie damaĝas ĝin” povas esti eksigita. Decidon pri eksigo de ordinara membro faras la estraro, sed kiam temas pri komitatano, kia estas Gbeglo Koffi, por eksigo necesas decido de la tuta komitato de UEA. Do, eĉ se la estraro konsiderus, ke Gbeglo Koffi morale damaĝas la asocion,

eksigi lin povas nur la komitato, kiu kunvenas nur dum Universalaj Kongresoj.

El "Libera Folio"

Ĉar li ne havis multe da tempo kaj ĉar li ne povis trovi aŭtomobilrestadigejon kun aŭtomobilrestadtempmezurilo, pastro restadigis sian aŭtomobilon en loko nepermesata por aŭtomobilrestadigo. Li metis slipon sub la fenestroviŝilon, kun la surskribaĵo: "Mi ĉirkaŭveturis ĉi tiun distrikton dek fojojn. Se mi ne restadigas mian aŭtomobilon ĉi tie mi malfruos por mia kunveno. Pardonu al ni niajn pekojn!"

Kiam li revenis, li trovis slipon de policisto kun tiu ĉi surskribo: "Mi ĉirkaŭpediradis ĉi tiun distrikton dek jarojn. Se mi ne donos al vi monpunon, mi riskas perdi mian laboron. Ne konduku nin en tenton!"

Henriette Vanechop

Gravaj Esperanto-eventoj:

Merkredon la 5an de novembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

Merkredon la 3an de decembro ni kunvenos en Clarence Park je la 18a horo.

Dimanĉon la 21an de decembro ni okazigos la Zamenhofan Vesperon en la belega, nova hejmo de Indrani, 71 Hindmarsh Circuit, Mawson Lakes, S.A. 5095. Telefono 8285 3128.

De la 11a ĝis la 25a de januaro 2009 la Somerkursaro de Aŭstralia Esperanto-Asocio okazos en "International House", 96 City Road, Chippendale, NSK 2008, en la belega urbego Sidnejo.

La 94a Universala Esperanto-Kongreso okazos de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.

En 2010 la Universala Esperanto-Kongreso okazos refoje en la belega urbo Havano, Kubao.

Iu iam diris, ke troviĝas en tiu ĉi mondo nur du specoj de homoj. Tiuj, kiuj vekiĝas matene dirante: "Bonan matenon, Sinjoro!" kaj tiuj, kiuj vekiĝas en la mateno dirante: "Bona Sinjoro, estas mateno!"

Henriette Vanechop

Lech Wałęsa ricevis informon pri Esperanto

Inter la 10a kaj 13a de septembro okazis la 18a Ekonomia Forumo en Krynica, Polujo, en kiu jam la 3an fojon Esperanto estis reprezentata. Partnero de la aranĝo Esperanto-Unio elpaŝis kun propra kaj ankaŭ prizorgis aranĝo informstandon pri Esperanto. Ĉijare la Esperanto-ĉeeston en la forumo kunfinancis tri organizaĵoj – EEU, Universala Esperanto-Asocio kaj Esperantic Studies Foundation. Inter la personoj, kiuj ricevis informon pri Esperanto estis la antaŭa prezidanto de Polujo, Lech Wałęsa.



La Ekonomia Forumo en Krynica estas altnivela aranĝo, kiun kutime partoprenas multaj decidpovaj personoj – politikistoj, ekonomiistoj, entreprenistoj, diplomatoj – ĉefe el meza Eŭropo kaj Azio. La aranĝon oni ofte nomas "Pola Davos", laŭ la nomo de la ĉiujara kunveno de Monda Ekonomia Forumo. Estas unika eblo prezenti Esperanton al tiuj personoj kaj plividebligi la temon de internacia komunikado.

La ĉeftemo de la podia diskuto de Eŭropa Esperanto-Unio estis *Unuiĝintaj en diverseco? Lingvolernado kaj eŭropa identeco*. La gvidanto de la diskuto estis Barbara Pietrzak, kiu reprezentis UEA-n kaj enkondukis la temon. Aliaj prelegantoj kun kontribuo estis EEU-estraranoj” Zlatko Tišljar, Georgo Handzlik kaj Peter Baláž. Post la prelegoj ĉiuj ĝiaj ĉeestintoj ricevis komputilan diskon pri Esperanto. Parto de la disko estis prezentita ankaŭ dum la podia diskuto.

Krom la vendreda podia diskuto okazis informado pri Esperanto dum la tuta aranĝo en la informstando, kie diligente deĵoris tri volontuloj de Pola Esperanto-Junularo kun EEU-estrarano Peter Baláž. Aldone estis centoj da informiloj (flugfolioj kaj Esperanto-kalendaretoj) disdonataj ankaŭ ekster la konstruaĵoj de la forumo al preterpasantoj.

Plurspecaj informiloj estis je dispono en la tri oficialaj lingvoj de la aranĝo: la pola, angla kaj rusa. Hazardo kaŭzis, ke la kompaktdisko de Esperanto (menciita en alia artikolo en *Libera Folio*), aperis en la gazeto Wyborcza ĝuste dum la unua tago de la Ekonomia Forumo kaj tiel eĉ plifortigis la efikon de la informado pri Esperanto ankaŭ dum tiu ĉi aranĝo.

Agrable estas konstati, ke ĉijare ne aŭdiĝis fortaj kontraŭstaroj pri la temo Esperanto. Estis surprize multaj pozitivaj reagoj kaj relative granda intereso kaj scivolemo pri Esperanto-stando. Unika kaj malofta afero pri la forumo estas la ebleco alparoli personojn kun altaj postenoj en politiko aŭ ekonomiko.

Tiel okazis ankaŭ ĉijare, ekzemple kun eksprezidento de Polujo Lech Wałęsa aŭ la nuna vicĉefministro de Slovakujo Dušan Čaplovič. Tiuj renkontoj estas solida bazo por postaj seriozaj diskutoj en pli alta nivelo, diskutante pri temoj de lingva politiko aŭ lingvaj rajtoj. Estas ĉiam bone povi utiligi ilin, samkiel eblis fari ĉijare.

Notindas la fakto, ke Esperanto (kaj EEU) estis ĉe la forumo la ununura nekomerca, neregistara organizaĵo. Kutime ĉeestas kaj reklamas sin grandaj fabrikoj, naftoentreprenoj ks. Danke al kontaktoj de PEA-prezidantino Halina Komar la organizantoj permesis senpagan standon por Esperanto, kiu tiel ĉi vere ĝuas mirindan privilegion.

La estraro de EEU esperas daŭrigi ĉe tiu aranĝo kun sekvaj prezentiĝoj kaj jam nun elektas temon kaj prelegontojn por la venontjara forumo. Ni esperu pri daŭraj pozitivaj kaj sukcesaj videbligoj de Esperanto en similaj aranĝoj.

EEU-estrarano, Peter Baláž

Malfermis la skoto Farquhar sian matenan gazeton. Li estis perpleksita legi en la mortokolumnu, ke li mortis.

Tuj li telefonis al sia plej bona amiko, MacAlpin.

”Ĉu vi vidis en la gazeto”, demandis Farquhar, ”ke mi mortis?”

”Jes, tion mi vidis!” respondis MacAlpin. “De kie vi telefonas?”

La Asocio

Finfine firmfundamenta historio !

Doktoro Ziko Van Kijk pretigis Esperantan libron 304 paĝan. Ĝi estas ”plena historio de Esperanto”, sed tamen de la plej grava parto de ĝi, nome de historio sub la ombrelo de UEA. Kaj ĝi vere estas la unua en nia historio, kiu havas firman sciencan bazon. Ziko funde esploris ĉiujn gravajn dokumentojn en la Centra Oficejo, kaj ne nur tiujn dokumentojn, sed ankaŭ multajn, kiujn li ricevis de aliaj instancoj. Granda avantaĝo estas, ke en multaj “historietoj” ambaŭ partioj povis konigi siajn argumentojn, kiuj ofte ne estas troveblaj en nia gazetaro! Ĉe konfliktoj en nia asocio ja tre ofte okazas, ke unu el la koncernataj partioj estas buŝumita pro manko de diskoniga organo!

Kiu volas paroli pri Esperanto-historio, kaj ne nur klaĉi ”el la nuko”, nepre bezonas seriozan studadon de tiu ĉi monumenta verko.

La libro aperos post kelkaj monatoj. Kiu antaŭmendas ĝin ricevos 10%-an rabaton, do por € 21,60 anstataŭ € 24,00 (plus sendokostoj, kun minimumo de € 3,00). Tiu ĉi oferto validos ĝis la 1a de februaro 2009.

Mendu ĉe FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen – retbutiko@fel.esperanto.be.

Li (Flustrante): ”Bonvolu doni al mi vian telefonnumeron.”

Ŝi: ”Ĝi estas en la telefonlibro.”

Li: ”Tre bone. Kaj kio estas via nomo?”

Ŝi: ”Ankaŭ ĝi estas en la telefonlibro!”

Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, DECEMBRO 2008, JARKOLEKTO 26

Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019

esperantobob@iprimus.com.au

Legeblas ankaŭ surrete: www.gazetejo.org

Enirinte la drinkejon Hamish diris al Sandy la alkoholelverŝisto: "Elverŝu al mi tre grandegan trinkaĵon, mi ĵus finis alian batalon kun mia edzineto."

"Ho, ĉu vere?" diris Sandy, "kaj kiel finiĝis tiu ĉi batalo?"

"Kiam la batalo estis finita" respondis Hamish, "ŝi venis al mi sur siaj manoj kaj genuoj".

"Ĉu?", diris Sandy, "nu tio estas io alia! Kaj kion ŝi diris?"

"Ŝi diris: "Eliru el sub la lito, vi malgranda kokideto."

Tre ĝojiga posttagmezo

Sabaton la 4an de oktobro ni sudaŭstraliaj esperantistoj havis la honoron kaj grandan ĝojon gastigi ges-rojn Ĵeni kaj Alan Bishop en Adelajdo.

Alan kaj Ĵeni estas tre, eĉ treege bonkoraj kaj amikemaj. Alan ludis per ukulelo kaj klavaro kelkajn novajn kantojn kaj ni ĉiuj kunkantis. Fakte li ludis ankaŭ kelkajn konatajn al ni kantojn. Ni ĉiuj tre ĝuis la posttagmezon. Post la kafopaŭzo, kiu konsistis ankaŭ el manĝado de kukoj kaj tiaj aĵoj, Ĵeni rakontis al ni pri aferoj de AEA. Post tio parolis Alan pri sia vivo kaj la muziko, kiu rolas tre grave en ĝi. Ni ĉiuj ĝuis tion. La posttagmezo estis ne nur informa, sed ankaŭ amuza. Fakte mi venis al la konkludo, ke estus bone, eĉ bonege, se pli da samideanoj vizitus tiujn en aliaj ŝtatoj, ĉar tre gravas, ke ni ĉiuj ekkonu unu la aliajn multe pli bone !

Skota pastro veturigas sian aŭtomobilon al Novjorko, sed en Konektikuto lin haltigas policisto, ĉar li veturigas multe tro rapide, eĉ rapidege. La policisto flaras alkoholon de sur la

vizaĝo de la pastro, kaj samtempe vidas malplenan vinbotelon sur la planko de la aŭtomobilo.

Diras la policisto: "Sinjoro, ĉu vi estas drinkinta?"

Respondas la pastro: "Jes, sed nur akvon."

La policisto: "Do, kial mi povas flari vinon?"

Rigardas la pastro la botelon kaj diras: "Bona Dio! Li refoje faris tion!"

La ĉiujara kantovespero ĉe Indrani

La ĉiujara kantovespero ĉe Indrani okazis sabaton la 18an de oktobro en la nova kaj belega hejmo de Indrani.

Venis samideanoj el multaj malsamaj lokoj de Sudaŭstralio. Iuj vojaĝis eĉ pli ol 100 kilometrojn por ĉeesti.

Ni kantis 20 diversajn kantojn el multaj malsamaj regionoj de la mondo. Post la unuaj 10 ni haltis iomete por gustumi manĝaĵon kaj trinkaĵon. La humoro de ni ĉiuj estis ja bonega, kaj kun multe da kuraĝo ni ree eniris la kantoĉambron por daŭrigi.

La kantoj estis bonegaj kaj interesaj kaj ni ĉiuj tre ĝuis ilin. Indrani tre bone scias elekti la plej bonajn el kantoj. Ni ĉiuj estas tre dankaj al ŝi pro tio. Bedaŭrinde ni devas atendi ankoraŭ 12 monatojn ĝis la venonta kantovespero, se ni ne sukcesos persvadi ŝin okazigi ĝin du fojojn en la jaro.

"Ĉu vi scias, kio estas orfiŝo?"

"Ne, kio estas orfiŝo?"

"Haringo, kiu heredis multe da mono!"

Edukado

Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, "Lingvaj Resondoj", la elstaran verkon de nia eminenta Marcelo Leereveld. Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur \$ 23,00!

Andy ŝanceliĝis hejmen tre malfrue post longega vespero kun sia kundrinkemulo Sandy. Li deprenis siajn ŝuojn por ne vekti sian edzinon, Morag.

Surpiedpinte li kiom eble plej senbrue alproksimigis sin al la ŝtuparo, kiu kondukas al la dormoĉambro. Sed bedaŭrinde li mistrafis la plej malsupran ŝtupon.

Li per la manoj kaptis la ŝtuparbalustradon, sed akcidente svingiĝis lia korpo, kaj li falis peze sur sian postaĵon, kio kaŭzis, ke viskiobotelo en ambaŭ liaj postaĵpoŝoj rompiĝis tiel dolorigante eĉ pli tiun lian korpoparton.

Li sukcesis ne kriegi, stariĝis, malsupren tiris sian pantalonon, rigardis en la koridorspegulon kaj vidis, ke lia postaĵo estas terure tranĉita kaj sangas. Li post iom da peno trovis plenan skatolon da plastro kaj ekfiksas pecon da plastro ĉien, kie li vidis sangon. Tiam li kaŝis la preskaŭ malplenan plastroskatolon kaj kun multe da malfacileco iris al sia lito kaj enlitiĝis.

En la mateno li vekigis kun teruraj doloroj en siaj postaĵo kaj kapo, kaj trovis ke Morag estas lin rigardanta de trans la dormoĉambro.

Diris ŝi: "Vi refoje estis ebriega pasintan nokton, ĉu ne?"

Diris Andy, "Vi kial diras tion?"

"Nu", diris Morag, "Eble ĉar la pordo estis malfermita, eble ĉar estas tiom da rompita vitro sur la ŝtuparo, eble ĉar estas tiom da sango preskaŭ ĉie en la domo, eble ĉar viaj okuloj estas sangostriitaj, sed plej verŝajne ĉar tiom da plastroj estas gluitaj al la koridorspegulo."

Mummy, why can't we all speak the same language"

La bona libro "Mummy, why can't we all speak the same language?" aĉeteblas de Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith NSW 2077, aŭ perrete Nicole@cryogenic.net kontraŭ \$ 6,95 plus afranko \$ 1,95. Ĝi estas angle verkita kaj celas ĉefe infanojn proksimume 10-jarajn.

"La pasintan fojon, kiam estis cirko en la urbo, la primadono forkuris kun mi."

"Ĉu kun vi? Kia cirko estis tio?"

"Pulocirko!"

Gravaj Esperanto-eventoj:

Dimanĉon la 14an de decembro ni kunvenos ĉe Indrani por festi la 149an naskiĝtagon de Zamenhof en la nova, belega hejmo de Indrani, 71 Hindmarsh Circuit, Mawson Lakes, S.A. 5095. Telefono 8285 3128.

De la 11a ĝis la 25a de januaro 2009 la Somerkursaro de Aŭstralia Esperanto-Asocio okazos en "International House", 96 City Road, Chippendale, NSW 2008, en la belega urbego Sidnejo.

En februaro ni vizitos la rozĝardenon en Garrick Hill.

En marto ni prenos parton en la kajtofestivalo kaj boatekskurso en Adelajdhaveno.

En aprilo ni teatrumos ĉe Pat.

En majo ni vizitos la mangloarbaron en Sankta Kilda.

La 94a Universala Esperanto-Kongreso okazos de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.

En 2010 la Universala Esperanto-Kongreso okazos refoje en la belega urbo Havano, Kubao.

"Mia edzino kaj mi ofte kverelas, kaj ŝi fariĝas tre historia."

"Ĉu vi ne volas diri 'histeria?'"

"Ne, 'historia', ŝi parolas nur pri aferoj longe forgesitaj de mi!"

La malsanulo neniam antaŭe memmortigis sin.

El kuracista raporto sendita de Peter Weide

Kaj el la sama raporto:

"La patrino restas hejme, sed iam frekventis infanĝardenon".

Malgraŭ la esperantistoj...

Karaj gesamideanoj! Finfine venis decembro, la lasta monato de la jaro, sed mi ne bezonas tion diri, tion vi mem bone scias. Ĝi samtempe estas la monato, en kiu naskiĝis la plej elstara el ĉiuj esperantistoj, kaj ankaŭ la unua, nome

Lazaro Ludoviko Zamenhof, kies 149an naskiĝtagon ĉiuj esperantistoj baldaŭ festos diversmaniere en la tuta mondo. Li estis tiu granda homarano, kies ekzemplon ni ĉiuj sekvu. Ni ne forgesu tion, kaj ni ne forgesu, ke estante esperantistoj, ankaŭ ni klopodu por atingi similan pozicion.

Post januaro, sed bezonas rakonti januaro okazos de Aŭstralia kun espereble partoprenantoj,



decembro sekvos ankaŭ tion mi ne al vi, aŭ ĉu? En la 24a Somerkursaro Esperanto-Asocio inter 80 kaj 100 aŭ eĉ pli. Ni esperu,

ke la plej multaj el ili venos por lerni pli da Esperanto!

Espereble okazos tiu 24a Somerkursaro en etoso amika kaj helpema. Sed ne nur tio gravas. Gravas ke oni instigos la lernantojn uzadi nian lingvon. La anglan oni povas aŭdi hejme en la televido, kaj ofte multe pli bonan anglan ol tiu angla, kiun oni aŭdas i.a. sur la strato. Sed kompreneble ne ĉiam, ankaŭ en la televido oni aŭdadas malbonan anglan.

Sed, kaj tio estas tre grava, eĉ gravega, regu harmonio kaj amikeco inter ni. Tio estu la unua el niaj bondeziroj por la aŭstralia esperantistaro en 2009. Zamenhof kreis la lingvon por ke ni ĉiuj vivu pace kaj harmonie. Ni estu ne nur harmoniemaj kaj pacemaj, sed ankaŭ pardonemaj. Ŝajnas ke ni jam forgesis tion. Ni pardonu unu al la aliaj. Mi mem nun oficiale pardonas al tiuj, kiuj ofendis min, kvankam mi ne sentas min ofendita, ĉar mi ne estas ofendiĝemulo. Se ni opinias, ke iu ofendis nin, ni etendu al li la manon kaj pardonu lin. Se iuj demisiis el AEA, ni ĝentile invitu ilin realiĝi al AEA. Ni kuraĝigu ĉiujn kiel membrojn, ne gravas el kiuj landoj ili devenas, la tuta mondo estas nia patrujo. Ĉiuj bonvenu en AEA. Ni ne rifuzu al iu ajn membriĝon! Esperanto triumfu ne nur en nia granda lando, sed en la tuta mondo.

Unu el la celoj de AEA estas kreskigi la membronombron. Tial ni provu persvadi ĉiujn eksmembrojn remembriĝi. Kaj ni varme ilin bonvenigu! Ni

ne sentu malamon al iu ajn, ĉar tio kaŭzos al ni malbonan karmon, kaj vi ĉiuj scias kio estas karmo, ĉu ne? Se ne, mi certigas al vi, ke vi estontece lernos ankaŭ tion!

Estante nur homoj kaj tial ne tre perfektaj, ni emas de tempo al tempo fari erarojn. Ni estas eraremaj. Kelkaj el ni, ekzemple mi mem, en la pasinteco, sed nur por ke ni amike ridetu pri tiuj niaj eraroj, aperigis en nia gazetaro ŝercojn pri ni mem. Aliaj trovis tiujn ŝercojn ofendaj, kaj koleris. Mi scias ke la estraro de AEA nuntempe forte pripensas pligrandigon de sia membraro. Mi deziras al ĝi ĉion bonan kaj antaŭvidas venontjare revidi inter ĝiaj membroj ankaŭ tiujn, kiuj jam eksmembriĝis. Mi estas certa ke AEA prosperos kun tiuj siaj iamaj membroj.

Nu, nun estas tempo forgesi la malamon kaj malestimon de la pasintaj jaroj kaj etendi la manojn unu al la aliaj dezirante Prosperan Novan Jaron kaj amikecon dum 2009, ĉar, kiel diris al mi unu el miaj amikoj, ”se Esperanto iam venkos, ĝi venkos ne pro la esperantistoj, sed malgraŭ la esperantistoj”.

Dum la okupacio de Danujo montris kopenhaga kinejo germanan propagandofilmon. Dum momento la ekranon plenigis la lipharbeligita vizaĝo de Hitler. Subite tra la mallumo de la kinejo aŭdiĝis voĉo diranta: ”Kiu estis tiu?”

Tuj unu el la ĉeestantaj nazioj sin starigis kaj kolere kriis al la publiko: ”Kiu estis tiu?”

Respondis la sama voĉo: ”Nu, ĉu ankaŭ vi ne konas lin?”

Forpasis Bernard Golden

La fame konata esperantisto kaj dumviva membro de UEA, Bernard Golden, 19an de oktobro. Li forpasis dimanĉon la postlasis la vidvinon Eva Golden kaj la du filojn Daniel Lariko kaj David Alko. Ambaŭ filoj parolas Esperanton.



Bernard naskiĝis la 23an de novembro 1925 en Newark, Novĵerzejo, Usono. Li estis arkeologo kaj

verkinto de pli ol 1.800 artikoloj, recenzoj, beletraĵoj kaj tradukoj en Esperanto. Lia verkaro estas tiom abunda, precipe, sed ne nur, en la esperantologia kampo, ke iutempe oni uzis la neologismon (nova vorto) 'goldeni' en la signifo "abunde verki por ĉiaj periodaĵoj".

El liaj beletraj verkoj elstaras la rakontaroj *Hieraŭ – hodiaŭ – morgaŭ* (1982) kaj *Bestoj kaj homoj* (1987), la romanetoj *Infero en aŭtuno* (1993) kaj *Ŝamanoj en la kosmo* (1994), kaj la teatra volumo *Antaŭ la kulisoj* (1994).

Li lernis Esperanton en 1946, edziĝis al hungarino kaj ekloĝis en Hungarujo en 1971. Li estis multjara korespondanto de la internacia magazino *Monato* kaj ano de la Akademio de Esperanto.

En 1998, koincide kun la alveno de la reta epoko, Bernard Golden publike deklaris verkoĉeson, sed li ne kabeis. Ankoraŭ ne ekzistas kompleta biografio de lia vasta verkaro.

El Libera Folio

"La malsanulino havas dolorojn en la brusto, se ŝi kuŝas sur la maldekstra flanko pli ol unu jaron".

El kuracista raporto sendita de Peter Weide

Avo Frosto

Kristnasko 2008 alvenas kaj plurcentmiloj da infanoj en la tuta mondo skribos al Avo Frosto. Jam delonge Avo Frosto franca, la angla kaj en sed ekde 2002, la norda Esperanton.



Ni invitas ĉiujn esperantistojn, junaj kaj maljunaj, malkovri tiun tradicion, skribante al Avo Frosto.

Simple sendu manskribitan leteron al la jena adreso:

AVO FROSTO

NORDA POLUSO

KANADO, CANADA

HOH OHO

Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn, eĉ se skribitaj de etaj manoj, kiuj lernas skribi.

Ne forgesu ”klare skribi viajn nomon kaj adreson” por certigi ricevon de respondo. Krome, indiku klare ke la letero estas en Esperanto, ĉar la helpantaj koboldoj ne ĉiam rekonas la lingvon, en kiu vi skribis.

P.S. La poŝta kodo estas vera kaj grava parto de la adreso. Ĝi estas rezervita al Avo Frostoj.

Pretas respondi demandojn: Normando Fleury, koboldo por la Kanada Poŝta Servo. Esperanto-Societo Kebekia, 6358-A, rue de Bordeau, Montrealo, Kebekio, Kanado, H2G 2R8.

*La duan tagon lia genuo
fartis pli bone, kaj la trian
tagon ĝi estis malaperinta.*

El kuracista raporto. Sendis Peter Weide

La poŝtkartoj

Multaj el vi jam aŭdis la ĝojigan fakton, ĉu ne? ke eblas en Sudaŭstralio, fakte en Adelajdo, aĉeti tre belgajn, ho, pardonu, mi forgesis unu “e”, belegajn poŝtkartojn montrantajn la vizaĝojn de la plej konataj aŭstraliaj verkintoj kaj verkantoj.

Tiuj kartoj taŭgas eĉ tre bone kiel kristnaskodonacaĵoj al ĉiuj viaj geamikoj. Kaj ili uzeblas ankaŭ kiel kristnaskaj kartoj, precipe se vi mem surpentros kristnaskulan ĉapon al la kapo de Trevor, aŭ al iu el la aliaj geniuloj, kompreneble!

La kartoj aĉeteblas ĉe Audrey Felby,
audrey100@iprimus.com.au

*Ŝia haŭto estas humida kaj seka, kaj
ŝi povas senti nenion de la piedfingroj
malsupren.*

El kuracista raporto, sendis ĝin Peter Weide